
BUDHISMAJ TRADUKOJ
(4)

# LA VIVO DE LA BUDHO



Budhana Retejo Esperantista

# LA VIVO DE LA BUDHO

Esperantigis Miaohui

BUDHANA RETEJO ESPERANTISTA

http://www.budhano.cn

# LA VIVO DE LA BUDHO

## ENHAVO

1. LA SONĜO DE REĜINO MAHA MAJA 1
2. LA NASKIĜO DE LA REĜIDO 2
3. LA NOMDONA CEREMONIO 3
4. LA EDUKADO DE LA REĜIDO 4
5. BONKORECO DE REĜIDO SIDARTO 5
6. LA EDZIĜO DE REĜIDO SIDARTO 6
7. LA KVAR MENCIITAJ: MALJUNULO 7
8. LA KVAR MENCIITAJ: MALSANULO 9
9. LA KVAR MENCIITAJ: MORTINTO 11
10. LA KVAR MENCIITAJ: MONAĤO 12
11. LA REĜIDO FORLASIS SIAN HEJMON 13
12. LA OFERO DE REĜO BIMBISARO 15
13. LA UNUAJ INSTRUISTOJ DE LA BUDHO 16
14. KLOPODO EN SES JAROJ 17
15. LA ORA BOVLO 18
16. KLOPODO POR ILUMINIĜO 19
17. BRILAS LA SUNO DE ILUMINIĜO 20
18. SEP SEMAJNOJ POST LA ILUMINIĜO 22
19. LA UNUAJ KVIN MONAĤOJ 24
20. LA UNUA INSTRUADO DE LA BUDHO 25
21. SERPENTA REĜO 27
22. REVENI HEJMEN 28
23. LA RAKONTO PRI REĜIDINO JASODARA 29
24. LA RAKONTO PRI REĜIDO NANDO 30
25. LA RAKONTO PRI REĜIDO RAHULO 31
26. DU ĈEFAJ DISĈIPLOJ 32
27. LA RAKONTO PRI MALRIĈA ŜOPAKO 34
28. LA RAKONTO PRI SINJORINO PATAĈARA 35
29. ANGULIMALO, LA BANDITO 37
30. ŬAKALIO KAJ LA BUDHO 40
31. LA PURIGISTO SUNITO 41
32. LA BUDHO KAJ MALSANA MONAĤO 42

33. LA ĈIUTAGA RUTINO DE LA BUDHO 43
34. LA MONAĤIĜO DE JAŜO 44
35. LA PATRONO REĜO BIMBISARO 46
36. VISAKA, GRANDA SUBTENANTINO DE BUDHISMO 46
37. DEVADATO MALAMIKA AL LA BUDHO 48
38. LA BUDHO KAJ REĜINO KEMA 50
39. LA BUDHO KAJ MILIONULO 52
40. LA BUDHO KAJ FARMISTO 53
41. RANKORO DE MAGANDIĜA 54
42. LA DEMONO ALAVAKO 56
43. SUĜATA KAJ LA SEP SPECOJ DE EDZINOJ 59
44. ANANDO, LA LOJALA HELPANTO 61
45. LA TRAGEDIO DE REĜO BIMBISARO 63
46. PRI DOLORO DE AMO 65
47. EKSCIO PRI LA VERA KARAKTERO 67
48. KLOPODO KALUMNII LA BUDHON 68
49. KULTADO AL ĈIUJ DIREKTOJ 70
50. DONACO DE AMBAPALI 72
51. ĜIVAKO, KURACISTO DE LA BUDHO 74
52. LA KVERELADO ĈE KOSAMBIO 75
53. LA BUDHA SINTENO
KONTRAŬ ALIAJ RELIGIAJ INSTRUISTOJ 76
54. MONAĤO STREBANTA TRO PENE 77
55. MONAĤINA KOMUNUMO 79
56. BUDHA SINTENO PRI KASTISMO 81
57. LA SPEGULO DE LA DARMO 82
58. LA BUDHA SINTENO PRI MIRAKLOJ 83
59. LA LASTA MALSANO DE LA BUDHO 85
60. LA LASTAJ TAGOJ DE LA BUDHO 87
61. LA LASTA MANĜO DE LA BUDHO 88
62. SUBADO, LA LASTA DISĈIPLO DE LA BUDHO 90
63. LA LASTAJ VORTOJ DE LA BUDHO 91
64. LA UNUA KONSILIĜO PRI BUDHAJ INSTRUOJ 92
EKZERCOJ1~3 94
EKZERCOJ 4~5 95
EKZERCOJ 6~8 96
EKZERCOJ 9~11 97

EKZERCOJ 12~14 98
EKZERCOJ 13~18 99
EKZERCOJ 19~21 100
EKZERCOJ 22~24 101
EKZERCOJ 25~27 102
EKZERCOJ 28~31 103
EKZERCOJ 32~35 104
EKZERCOJ 36~37 105
EKZERCOJ 38~40 106
EKZERCOJ 41~43 107
EKZERCOJ 44~46 108
EKZERCOJ 47~50 109
EKZERCOJ 51~54 110
EKZERCOJ 55~58 111
EKZERCOJ 59~61 112
EKZERCOJ 62~64 113
NOMOJ DE LA PERSONOJ KAJ LOKOJ 114

## 1. LA SONĜO DE REĜINO MAHA MAJA

Antaŭ pli ol 2500 jaroj vivis reĝo nomata Sudodano. Li edziĝis al bela kolija reĝidino nomata Maha Maja. La geedza paro regis en la ŝakja regno, militista tribo tuj apud la kolija regno en la norda Hindio, kie estas Nepalo nun. La ĉefurbo de la ŝakja regno nomiĝis Kapilavasto kaj situis ĉe la montpiedo de Himalajo.

Reĝino Maha Maja estis filino de Reĝo Anĝano de Kolijo. Pro ŝia beleco oni nomis ŝin Maja, kiu signifas "vizion". Sed la plej mirindaj karakteroj de Maja estis ŝiaj virto kaj talento, ĉar ŝi estis naturdotita per la plej altaj inteligenteco kaj pieco. Reĝo Sudodano tute meritis havi tian amindan edzinon. Li mem estis nomata "Reĝo de la Leĝo" ĉar li regis en la regno tute laŭ la leĝo. Neniu el la ŝakjanoj estis pli honora kaj respektinda ol li. Lin admiris ne nur la nobeloj kaj korteganoj, sed ankaŭ la civitanoj kaj komercistoj. Ĝuste en tiu nobela familio naskiĝos la Budho.

La reĝino havis vivecan sonĝon kiam ŝi dormis en la palaco en plenluna nokto. Ŝi sentis, ke kvar ĉielanoj portis ŝin al Lago Anota en Himalajo. Post la banado al ŝi en la lago, la ĉielanoj ŝin vestis per ĉielaj vestaĵoj, ŝmiris per parfumoj kaj ornamis per ĉielaj floroj. Baldaŭ aperis blanka elefanto portanta blankan lotusfloron per sia rostro. Ĝi ĉirkaŭiris ŝin trifoje kaj eniris en ŝian uteron tra ŝia dekstra flanko. Poste la elefanto malaperis kaj la reĝino vekiĝis, konsciante, ke ŝi ricevis gravan mesaĝon, ĉar elefanto estas simbolo de honoro en Nepalo. La reĝino rakontis la sonĝon al la reĝo en la sekva frumateno. La reĝo miris kaj venigis kelkajn saĝulojn por diskuti pri la aludo de la sonĝo.

"Via Reĝa Moŝto," diris la saĝuloj, "vi estas feliĉa. La ĉielanoj elektis nian reĝinon kiel patrinon de la plej pura infano, kiu fariĝos grandulo." La reĝo kaj reĝino ekĝojis, aŭdinte tion.

Ili estis tiel ĝojaj, ke ili invitis multajn nobelojn en la regno al festeno en la palaco por informi ilin pri la bona novaĵo. Oni eĉ ne forgesis la homojn bezonantajn helpon kaj donacis manĝaĵojn kaj vestaĵojn al la malriĉuloj en la celebrado. La tuta regno senpacience atendis la naskiĝon de la nova reĝido, kaj Reĝino Maja ĝuis gravedecon feliĉan kaj bonfartan, havante puran vivadon por la naskiĝonto kaj si mem.

**Ekzerco 1 estas sur paĝo 94**

## 2. LA NASKIĜO DE LA REĜIDO

Ĉirkaŭ dek monatojn post sia sonĝo pri la blanka elefanto kaj la aŭguro, ke ŝi naskos grandulon, Reĝino Maja atendis la naskiĝon de sia infano. Iutage ŝi iris al la reĝo kaj diris: "Mia kara, mi devas reiri al miaj gepatroj. Baldaŭ naskiĝos nia bebo." Estis kutimo en Hindio, ke la edzino devas naski bebon en sia gepatra domo, do la reĝo konsentis, dirante: "Tre bone, mi faros necesan aranĝon por via vojaĝo."

La reĝo aranĝis, ke iuj soldatoj antaŭtempe purigu la vojon, kaj aliaj gardu la reĝinon kiam oni portis ŝin per ornamita palankeno. La reĝino forlasis Kapilavaston kaj ekvojaĝis al la ĉefurbo de sia patra regno en longa procesio de soldatoj kaj servistoj.

La granda procesio preteriris ĝardenon nomatan Parko Lumbinio sur la vojo al la regno Kolijo. La ĝardeno estis proksima al la reĝlando nomata Nepalo ĉe la piedo de la montaro Himalajo. La reĝino absorbiĝis de la bela parko kun sala-arboj, aromaj floroj, viglaj birdoj kaj laboremaj abeloj, ŝi do haltigis la portistojn de la palankeno por iom ripozi ĉar la parko estis bona loko por ripozo. Kiam ŝi estis sub sala-arbo, ŝi akuŝis belan bebon. Estis fortuna tago. La akuŝo de la reĝino okazis en plenluna tago de la jaro 623 a. K. Nun oni celebras la tagon kiel Vesakon, la festo de la tri gravaj eventoj, kiuj estas la naskiĝo, iluminiĝo kaj nirvano de la Budho.

Laŭ la legendoj pri la budha naskiĝo, la bebo faris sep paŝojn antaŭen kaj je ĉiu paŝo de li aperis lotusfloro sur la tero. Je la sepa paŝo, li haltis kaj kriis kun nobla voĉo:

"Mi estas la ĉefo de la mondo; mi estas la plej granda homo en la mondo; mi estas la plej eminenta homo en la mondo. Jen estas mia lasta naskiĝo kaj mi ne plu revenos."

Reĝino Maha Maja tuj revenis al Kapilavasto post la naskiĝo de sia filo. La reĝo ĝojegis pro la informo. La novaĵo pri la naskiĝo de la longe atendita bebo ankaŭ cirkulis en la tuta regno kaj ĝojigis ĉiujn homojn.

**Ekzerco 2 estas sur paĝo 94**

## 3. LA NOMDONA CEREMONIO

Reĝo Sudodano havis maljunan instruiston konatan kiel saĝulo. Oni nomis lin Asito la Saĝulo. Asito vivis ermite en ĝangalo. Iutage, kiam la ermito sidis meditante, li trovis, ke la ĉielanoj kantas kaj dancas ĝojplene. "Kial vi estas tiel ĝojaj?" li demandis. "Ĉar la plej granda eminentulo en la mondo jam naskiĝis al Reĝino Maha Maja en Parko Lumbinio," respondis la ĉielanoj. Informiĝinte pri tio, Asito tuj hastis al la reĝo, reĝino kaj novnaskita bebo.

Ĝojegis la reĝo, denove vidinte sian saĝan maljunan instruiston. Post kiam la saĝulo sidiĝis en la palaco, la reĝo portis la reĝidon al li kaj diris: "Instruisto, mia filo naskiĝis nur hieraŭ. Jen li estas. Bonvolu esplori, ĉu li havos brilan estontecon."

Dirinte tion, la reĝo mallevis la reĝidon antaŭ la saĝulo por ke ĉi lasta povu plibone rigardi la bebon, sed la bebo movis siajn piedojn sur la kapon de la saĝulo. Surprizite, Asito prenis la piedojn de la reĝido en la manojn kaj atente ekzamenis ilin. Rimarkinte kelkajn makulojn sur la plandoj de la reĝido, li stariĝis kaj diris: "La reĝido fariĝos tre granda instruisto en la mondo!" La saĝulo tiel plezuriĝis, ke li kunmetis la manplatojn kaj esprimis sian respekton al la eta reĝido. Vidinte tion, ankaŭ la reĝo faris la samon. Tio estis la unua saluto farita de la reĝo al la reĝido.

En la kvina tago post la naskiĝo de la reĝido, la reĝo invitis kvin saĝulojn al la nomdona ceremonio kaj petis ilin proponi bonan nomon por la reĝido. La saĝuloj esploris la denaskajn makulojn de la reĝido kaj konkludis: "La reĝido fariĝos la reĝo de reĝoj se li volos regi la mondon. Sed se li elektos religian vivon, li fariĝos la Budho, la plej granda saĝulo."

"La reĝido fariĝos nenio alia ol la Budho," diris Kondano, la plej juna el la kvin saĝuloj.

Tiam la saĝuloj nomis la reĝidon Sidarto kun la signifo "plenumita deziro" aŭ "tiu, kiu atingis sian celon".

**Ekzerco 3 estas sur paĝo 94**

## 4. LA EDUKADO DE LA REĜIDO

La patrino de Reĝido Sidarto forpasis en la sepa tago post sia akuŝo. La reĝo havis alian reĝinon, kiu nomiĝis Praĝapati Gotami. Ŝi estis la plijuna fratino de Reĝino Maha Maja kaj naskis filon en la sama tago, en kiu Reĝino Maha Maja forpasis. Praĝapati Gotami donis sian filon al vartistino kaj ŝi mem vartis Reĝidon Sidarto, kiun ŝi tiel amis kiel sian propran filon. Reĝido Sidarto havis nenian memoron pri sia propra patrino.

Kiam Reĝido Sidarto aĝis nur kelkajn jarojn, Reĝo Sudodano sendis lin al lernejo. Multaj infanoj lernis en la klaso, kaj ĉiuj el ili venis el nobelaj familioj. La instruisto de la reĝido nomiĝis Sarvo Mitro.

La reĝido lernis lingvojn, legadon, verkadon, matematikon, historion, geografion, sciencon kaj ankaŭ artojn de boksado, arkopafado, luktado kaj aliaj. Li lernis ĉiujn lecionojn pli rapide ol aliaj lernantoj en la klaso. Li estis la plej saĝa en la klaso kaj plej bona pri diversaj artoj. Li gajnis honoron en ĉiuj lecionoj kaj fariĝis pli saĝa ol siaj instruistoj. Li estis la plej saĝa kaj la sola lernanto, kiu faris multajn demandojn al siaj instruistoj kaj pliaĝuloj. Li estis la knabo plej forta, plej alta kaj plej bela en la klaso. Li neniam estis maldiligenta, neniam miskondutis kaj neniam malobeis la instruistojn. Li amis ĉiujn kaj ĉiuj amis lin reciproke. Li estis amiko por ĉiuj homoj.

**Ekzerco 4 estas sur paĝo 95**

## 5. BONKORECO DE REĜIDO SIDARTO

Reĝido Sidarto estis tre bonkora al homoj, bestoj kaj ĉiuj aliaj vivestaĵoj. Li ankaŭ estis tre brava ĉevalisto kaj gajnis multe da premioj de la regno. Kvankam li havis ĉion kaj ne bezonis travivi malfacilaĵojn kaj suferojn, li ĉiam pensis pri la malriĉuloj kaj vivestaĵoj, kiuj laboris pene por feliĉigi lin. Li bedaŭris por ili kaj ankaŭ volis fari ilin feliĉaj.

Iutage li piediris en la arbaro kun sia kuzo Devadato, kiu portis kun si pafarkon kaj sagojn. Devadato subite vidis cignon flugantan kaj tuj pafis ĝin. La sago trafis la cignon kaj faligis ĝin. Ambaŭ knaboj kuris al la birdo. Sidarto kuris pli rapide ol Devadato, do li atingis la vunditan cignon la unua kaj trovis ĝojplene, ke la birdo ankoraŭ vivas. Li tenere tiris la sagon el ĝia flugilo. Li elpremis sukon el malvarmetaj folioj, ŝmiris ĝin sur la vundon de la cigno por ĉesigi la sangadon kaj karesis la timigitan birdon per sia mola mano. Kiam Devadato venis postuli la cignon, Reĝido Sidarto rifuzis doni ĝin al li. Devadato koleriĝis vidante, ke lia kuzo tenis la cignon for de li. "Donu la birdon al mi! Estis mi, kiu faligis ĝin," diris Devadato.

"Ne, mi ne donos ĝin al vi," respondis la Reĝido, "se vi jam mortigus ĝin, ĝi estus via predo. Sed nun ĝi apartenas al mi ĉar ĝi nur vundiĝis kaj ankoraŭ vivas."

Devadato ne konsentis pri tio. Tiam Sidarto proponis: "Ni iru al la juĝejo de saĝulo kaj demandu lin, kiu rajtas posedi la cignon." Devadato konsentis. Tial ili iris al la juĝejo de saĝulo kaj rakontis pri sia kverelado.

Post kiam la du knaboj rakontis respektive sian version pri la okazaĵo, la saĝulo respondis: "Vivestaĵo certe apartenas al tiu, kiu volas ĝin savi; vivestaĵo ne povas aparteni al tiu, kiu volas ĝin detrui. Sidarto rajtas posedi la vunditan cignon."

**Ekzerco 5 estas sur paĝo 95**

## 6. LA EDZINO DE REĜIDO SIDARTO

La kvin saĝuloj, kiuj ĉeestis la ceremonion doni nomon al Reĝido Sidarto, ne nur antaŭdiris pri la granda perspektivo de la nova reĝido, sed ankaŭ atentigis al la reĝo: "Kiam via filo vidos malsanulon, maljunulon, mortinton kaj monaĥon, li ekdeziros forlasi la palacon kaj fariĝi monaĥo."

La reĝo ege maltrankviliĝis pro la atentigo. Li timis, ke lia filo renkontos tiujn kvar menciitajn kaj forlasos la palacon. Por ke Sidarto havu nenian ŝancon renkonti tiajn homojn, li dungis multajn junajn servistojn por distri kaj protekti la reĝidon, sed lasis neniun malsanulon, maljunulon aŭ monaĥon eniri la palacon. Li konstruigis por Sidarto enfermitajn parkojn, ĉasejojn, kaj ankaŭ tri palacojn: unu por vintro, alia por somero, kaj la tria por pluva sezono.

Sidarto vivis en la mondo de abundeco kaj beleco, kaj ankaŭ ludis en suna mondo de ĝardenoj kaj boskoj, akompanate de muzikistoj kaj dancistinoj, tamen li ankoraŭ ne sentis sin feliĉa kvankam li havis ĉion deziratan.

Iutage la reĝo demandis kelkajn saĝulojn: "Kion mi faru por ĝojigi mian filon? Ŝajne li ĉiam estas deprimita kaj malĝoja." Ili respondis: "Nun via filo jam aĝas dek ses jarojn. Kial ne trovi belan knabinon por lia edziĝo?"

La reĝo konsentis kaj tuj venigis ĉiujn belajn knabinojn de la regno en la palacon. Post kiam ili ĉiuj alvenis, li okazigis grandan paradon kaj proponis, ke la reĝido elektu unu el ili kiel sian edzinon.

Inter ili troviĝis iu knabino plej ĉarma kaj bonkora, nomata Jasodara. Kiam Reĝido Sidarto prezentis al ŝi donacon multe pli valoran ol tiujn al aliaj knabinoj, la reĝo konsciis, ke la reĝido jam trovis sian amatinon. La reĝo akceptis Jasodaran kaj permesis sian filon edziĝi al ŝi.

**Ekzerco 6 estas sur paĝo 96**

## 7. LA KVAR MENCIITAJ: MALJUNULO

La reĝo faris ĉion eblan por garantii, ke lia filo reĝido Sidarto kreskos bonfarte kaj estos preta por fariĝi reĝo sekvante liajn paŝojn. Li ordonis, ke oni konstruu altan muron ĉirkaŭ la palaco, inkluzive de ĝiaj parkoj kaj ĝardenoj. Sed la reĝido ĉiam estis malĝoja, vivante kiel malliberulo. Iutage li diris al sia patro: "Mi devas eliri el la palaco por vidi, kiel vivas aliaj homoj."

"Tre bone, mia filo," diris la reĝo, "iru eksteren por vidi, kiel vivas homoj en nia urbo. Sed antaŭ tio mi devas fari preparadon, por ke la vizito de mia nobla filo okazu bone kaj konvene."

La reĝo ordonis, ke oni pretigu la urbon, beligante la stratojn kaj domojn por la vizito de lia filo, kaj bonvenigu lin kiam li preteriros. Post kiam oni ornamis la urbon, la reĝo diris: "Nun vi povas iri, mia kara filo, por vidi la urbon laŭplaĉe."

Kiam la reĝido trapasis la stratojn, el malgranda domaĉo subite iris maljunulo kun haroj arĝente grizaj kaj en vestaĵoj tre malnovaj, disŝiritaj kaj malpuraj. La vizaĝo de la maljunulo sekiĝis kaj ŝrumpis. Liaj kaviĝintaj okuloj estis malklaraj, kaj li preskaŭ blindiĝis. En lia buŝo sin trovis neniu dento. Tremante tutkorpe, li staris tie arke kurbiĝinte kaj firme tenis ŝanceliĝantan bastonon per ambaŭ kurbaj kaj ostecaj manoj por sin deteni de falo.

La maljuna almozulo sin trenis laŭ la strato, ignorante la feliĉon de ĉiuj aliaj homoj. Li malforte petis manĝaĵon de ĉirkaŭaj homoj kvazaŭ li mortus de malsato tiutage se li trovus nenion por manĝi. Kiam la reĝido vidis la maljunulon, li tute ne sciis, kion li rigardas. Estis la unua fojo en la vivo, ke li vidis tian maljunulon.

"Kio estas tio, Ĉano?" li demandis sian ĉariston. "Tio efektive ne povas esti homo! Kial li fariĝis tiel kurba? Kial li tremegas? Kial liaj haroj estas arĝente grizaj, sed ne nigraj kiel la miaj? Kio okazis al liaj okuloj? Kie estas liaj dentoj? Ĉu iuj homoj naskiĝis tiaj? Diru al mi, bona Ĉano, kion tio signifas?"

Ĉano diris al la reĝido, ke tiu estas maljunulo kaj li ne naskiĝis tia. "Li similis al ni dum sia juneco, kaj nun li fariĝis tia pro sia maljuniĝo." Ĉano konsilis al la reĝido, ke li forgesu la viron. Sed la reĝido ne estis kontenta. "Ĉiu en tiu ĉi mondo fariĝas tia, kia tiu ĉi maljunulo, se li vivas sufiĉe longe. Neniu povas tion malhelpi," diris Ĉano.

La reĝido ordonis Ĉanon tuj veturi hejmen, ĉar li ege malĝojis kaj volis atente pensi pri la terura afero nomata maljuniĝo.

Grandioza festeno okazis tiunokte por la reĝido, sed li tute ne interesiĝis pri tio, nek sentis ĝojon dum la manĝado kaj dancado. Li ĉiam pensis: "Iutage vi ĉiuj maljuniĝos kaj fariĝos malfortaj kaj kurbaj! Neniu el vi tion evitos, eĉ la plej bela!"

Li ne povis endormiĝi nokte. Li pensadis kuŝante en la lito, ke ĉiu fariĝos maljuna, griza, ŝrumpa, sendenta kaj malbela kiel la maljuna almozulo. Li volis scii, ĉu oni jam trovis metodon por malhelpi la timigan maljuniĝon.

Informiĝinte pri la rakonto, la reĝo malĝojis kaj maltrankviliĝis, ke lia filo forlasos la palacon. Li ordonis siajn servantojn prezenti pli da dancoj kaj manĝaĵoj. Sed la reĝido petis, ke la patro permesu lin vidi Kapilavaston en ordinara tago sen scio de alaj homoj pri la vizito.

**Ekzerco 7 estas sur paĝo 96**

## 8. LA KVAR MENCIITAJ: MALSANULO

La reĝo, kvankam tre nevolonte, lasis la reĝidon viziti la urbon duafoje. Li opiniis, ke estas malbone haltigi lin ĉar tio nur pliigos liajn konfuziĝon kaj malĝojon. La reĝo ne ordonis, ke oni pretigu sin kaj la stratojn en la urbo por la dua vizito de la reĝido. La reĝido kaj Ĉano sin vestis kiel junuloj el nobelaj familioj, por ke neniu rekonu ilin.

Kiam la reĝido eliris, la urbo estis tute malsama ol dum lia antaŭa vizito. Ne plu troviĝis ĝojaj homoj lin salutantaj. Anstataŭ flagoj, ornamaĵoj, floroj kaj bone vestitaj popolanoj, troviĝis nur simplaj homoj farantaj ĉiutagajn laborojn por sin vivteni. Forĝisto martelis ŝvitante por fari tranĉilojn. Juvelistoj kaj oraĵistoj faris kolringojn, braceletojn, orelringojn kaj fingroringojn el diamanto, oro kaj arĝento. Tinkturistoj tinkturis tukojn buntkoloraj kaj pendigis ilin por sekigi. Bakistoj okupiĝis pri bakado de panoj, kukoj kaj dolĉaĵoj, kaj vendis ilin al klientoj, kiuj manĝis ilin ankoraŭ varmajn. La reĝido rigardis tiujn homojn simplajn kaj ordinarajn. Ili ĉiuj estis tre okupitaj, feliĉaj kaj kontentaj pri la laboro.

Kiam ambaŭ daŭre piediris, ili renkontis viron kuŝantan sur la tero. Li tordis sian korpon, premis sian stomakon per ambaŭ manoj kaj kriis plengorĝe pro sufero. Liaj vizaĝo kaj korpo estis kovritaj de purpuraj makuloj. Liaj okuloj turniĝadis kaj li anhelis malfacile por spiri.

Tio faris la reĝidon malĝoja duafoje en lia vivo. La bonkora reĝido ne povis toleri, ke suferas homoj. Li tuj alkuris, metis la kapon de la viro sur sian genuon kaj demandis: "Kio okazis al vi? Kio okazis?" Sed la malsanulo nur kriis anstataŭ respondi.

"Ĉano, diru al mi, kial la viro estas tia?" demandis la reĝido. "Kial li malfacile spiras? Kial li ne parolas?"

"Mia reĝido," respondis Ĉano, "ne tenu la viron tiel. Li estas malsana. Lia sango toksiĝis. Li suferas de pesta varmo kaj lia tuta korpo brulas. Jen kial li nur laŭte krias anstataŭ paroli."

"Sed ĉu iuj aliaj homoj tiel fartas?" demandis la reĝido.

"Jes, kaj eble ankaŭ vi tiel suferos, se vi tenas la viron tiel proksime. Bonvolu demeti lin kaj ne plu tuŝu lin. Alie, lia pesto venos al vi. Vi fariĝos tia, kia li estas nun."

"Ĉu troviĝas aliaj suferoj krom tiu ĉi pesto, Ĉano?"

"Jes, mia reĝido, troviĝas centoj da aliaj malsanoj tiel suferigaj kiel ĉi tio," respondis Ĉano.

"Ĉu neniu povas helpi? Ĉu ĉiuj homoj eble malsaniĝos? Ĉu malsano

venos iam ajn, neatendite?" demandis Sidarto.

"Jes, mia kara reĝido," respondis Ĉano, "ĉiu en la mondo eventuale malsaniĝos. Neniu povas eskapi de tio, kaj tio iam ajn okazos. Ĉiu homo malsaniĝos kaj suferos."

La reĝido despli malĝojis kiam li revenis al la palaco, ĉiam pensante pri la viro kaj lia malsano.

**Ekzerco 8 estas sur paĝo 96**

## 9. LA KVAR MENCIITAJ: MORTINTO

Sidarto ege deprimiĝis kaj korsuferis post kiam li revenis al la palaco vidinte la malsanulon. Li ofte enpensiĝis. La reĝo estis ege malĝoja, trovinte lian ŝanĝiĝon. Post nelonge la reĝido petis permeson de la reĝo, ke li forlasu la palacon por lerni pli multe pri homa vivo en la urbo. La reĝo konsentis ĉar li bone sciis, ke lia malpermeso alportos nenian bonon al la reĝido.

Ĉi-foje, denove en nobelaj vestaĵoj, Sidarto kaj Ĉano piediris el la palaco kaj vizitis multajn partojn de Kapilavasto. Post kiam ili vagis plejparte de la tago, la reĝido vidis, ke grupo da homoj venas laŭ la strato plorante kaj post ili kvar viroj portas tabulon, sur kiu senmove kuŝas maldika viro. La portato nenion parolis kiel ŝtono. La homoj haltis kaj metis la tabulon kun la kuŝanta viro sur amason da brulligno kaj estigis fajron. La viro restis senmova kiam la flamo englutis la tabulon kaj tuj poste lin de ĉiuj flankoj.

"Kio estas tio, Ĉano?" demandis Sidarto. "Kial tiu viro kuŝas tie senmova, lasante sin forbruligi? Ŝajnas, ke li scius nenion."

"Li mortis," respondis Ĉano.

"Mortis! Ĉano, ĉu ĉiuj homoj mortos?"

"Jes, mia kara reĝido, ĉiuj vivantoj mortos iutage. Neniu povas ĉesigi la alvenon de morto," respondis Ĉano.

La reĝido estis tiel terurigita, ke li diris nenion plu. Li opiniis tion ege terura, ke la afero nomata morto venos al ĉiuj homoj, eĉ al reĝoj kaj reĝinoj. Ĉu ne estas metodo por ĉesigi tion? Li revenis hejmen silenta. Li rekte iris al sia propra ĉambro en la palaco kaj sidis en profunda meditado dum la resta tempo de la tago. Li pensis malĝoje: "Iam ĉiu en la mondo devas morti; neniu eltrovis metodon por ĉesigi tion. Devas esti metodo por ĉesigi tion. Mi nepre eltrovu ĝin por helpi la mondon."

**Ekzerco 9 estas sur paĝo 97**

## 10. LA KVAR MENCIITAJ: MONAĤO

Post multaj tagoj de meditado kaj ĉagreno, Sidarto vizitis la urbon kvarafoje. Kiam li veturis al la ĝardeno li vidis feliĉan viron en oranĝa robo. Li demandis al Ĉano: "Kio estas tiu ĉi viro en oranĝa robo? Liaj haroj estas forrazitaj. Kial li aspektas tiel feliĉa? Kiel li vivas kaj per kio li sin vivtenas?"

"Li estas monaĥo," respondis Ĉano, "Li loĝas en monaĥejo kaj iras de domo al domo por peti manĝaĵon kaj de loko al loko por instrui homojn kiel posedi trankvilecon kaj konduti bone." Tiam la reĝido sentis sin tre feliĉa. Kiam li iris tra la parko, li pensis: "Tia homo mi devas fariĝi."

Li piediris ĝis laciĝo kaj sidiĝis sub arbo por pensi plue. Kiam li sidis en la refreŝiga ombro de arbo, novaĵo venis, ke lia edzino naskis belan filon. Aŭdinte tion, li diris: "Al mi naskiĝis malhelpo kaj obstaklo por forlaso de la hejmo." Do li nomis sian filon Rahulo, kiu signifas malhelpon.

Revenante al la palaco, li renkontis reĝidinon nomatan Kisagotami, kiu hazarde rigardis eksteren tra la palaca fenestro. La belaspekto de la reĝido tiel allogis ŝin, ke ŝi diris laŭte: "Kiel feliĉaj estas la patrino, patro kaj edzino de tiel bela juna reĝido!"

Preterpasante la virinon, Sidarto aŭdis tion kaj pensis en si: "La patrino, patro kaj edzino sentas feliĉon en bela figuro. Kiel oni eskapu la obstaklojn kaj suferojn por atingi nirvanon, kiu estas eterna libereco feliĉa kaj paca?" Pro la demando li ekkonsciis, kion li devas fari. "Mi devas forlasi la familian vivon kaj homan mondon por atingi iluminiĝon. Tiu virino donis al mi valoran lecionon. Mi donos al ŝi rekompencon pro la instruo." Preninte valoran perlan kolieron de sia kolo, Sidarto gardis sian promeson kaj dankeme ĝin donacis al Kisagotami.

**Ekzerco 10 estas sur paĝo 97**

## 11. LA REĜIDO FORLASIS SIAN HEJMON

La reĝo, patro de Sidarto, aranĝis grandan festenon kaj dancadon por celebri la naskiĝon de Rahulo. Li invitis la plej bonajn dancistojn, kantistojn kaj muzikistojn el la tuta regno. Fakte la reĝo aranĝis la celebradon ne nur pro ĝojo. Li rimarkis, ke la reĝido dronis en ĉagreno kaj la nova bebo ne savis lin el la malĝojo. La reĝo timis, ke Sidarto forlasos la palacon por monaĥiĝi, do li faris sian eblon por distri la reĝidon el malĝojo kaj logi lin al la luksa palaca vivo.

La reĝido partoprenis en la balo nur por plezurigi la patron. Dum la festeno oni servis la plej bongustajn manĝaĵojn; la knabinoj el la tuta regno prezentis la plej sorĉajn kaj belajn dancojn; la plej sensivaj muzkistoj ludis, kaj la plej bonaj pupludistoj kaj magiistoj prezentis nekredeblajn mirindaĵojn. Sed Sidarto tiel laciĝis de la pensado, ke li baldaŭ dronis en profunda dormo.

Kiam la kantistoj kaj dancistoj vidis tion, ankaŭ ili haltis kaj endormiĝis. Post iom da tempo tiu nokte, la reĝido vekiĝis kaj surpriziĝis. Kion li vidis! Sur la planko dise kuŝis ĉiuj plej belaj kaj ĉarmaj dancistinoj, plej bonaj kantistoj, plej lertaj muzikistoj kaj plej inteligentaj aktoroj en la plej malbelaj, hontindaj kaj abomenindaj pozoj. Ili ĉiuj klopodis por plezurigi la reĝidon antaŭ horoj, sed nun iuj ronkis kiel porkoj kun la buŝo malfermita, kaj iuj grincis la dentojn kaj maĉis kiel malsataj demonoj. Iliaj ŝanĝiĝintaj aspektoj des pli naŭzis kaj malĝojigis la reĝidon. "Kiel subprema kaj sufoka ĉio ĉi estas," li pensis kaj turnis sian penson al la ideo forlasi la palacon. Li stariĝis kviete en la ĉambro, vekis Ĉanon kaj petis, ke li selu lian ĉevalon Kantako.

Kiam Ĉano pretigis la ĉevalon, Sidarto kviete iris al la novnaskita bebo por vidi lin unuafoje. Lia edzino dormis ĉe la bebo kun sia mano sur ĝia kapo. La reĝido diris al si mem: "Se mi movos ŝian manon por ĉirkaŭpreni la bebon lastafoje, mi timas, ke mi vekos ŝin, kaj ŝi malhelpos min de la foriro. Ne! Mi devas foriri, sed post kiam mi trovos tion, por kio mi strebas, mi revenos por denove vidi lin kaj lian patrinon."

Do Sidarto kviete forlasis la palacon. Estis nokotmezo. La reĝido rajdis sur sia blanka ĉevalo Kantako akompanate de sia fidela servisto Ĉano, kiu tenis la ĉevalan voston. Neniu haltigis lin kiam li rajdis for de ĉiuj, kiuj lin konis, respektis kaj amis. Li fiksis sian lastan rigardon al la urbo Kapilavasto, kiu tiel kviete dormis en la lunlumo. Li forlasis por lerni scion pri maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto. Li deĉevaliĝis post kiam li rajdis al la bordo de la rivero Anomo, kiu signifas “famegon”. Li deprenis siajn juvelajn ornamaĵojn, demetis la reĝidajn kostumojn, kaj donis ilin al Ĉano,

por ke tiu reiru al la reĝo. Poste, la reĝido eltiris sian spadon, tranĉis siajn longajn harojn, surmetis simplajn vestojn, elprenis almozan bovlon, kaj petis, ke Ĉano reiru kun Kantako.

"Estas senutile por mi vivi en la palaco sen vi, mia mastro," diris Ĉano malĝoje, "Mi volas sekvi vin." Sed Sidarto malpermesis lin resti kvankam li petegis trifoje.

Finfine Ĉano ekiris, sed Kantako rifuzis sin movi. La reĝido diris al sia ĉevalo tre ĝentile: "Bonvolu reiri kun mia amiko, Kantako. Ne plu atendu min." Sed Kantako pensis: "Mi ne plu revidos mian mastron." Larmoj fluadis el ĝiaj okuloj kiam ĝi senĉese najlis sian rigardon al la reĝido ĝis li sin turnis kaj foriris el la vido. Kiam Sidarto malaperis el la horizonto, disrompiĝis la koro de Kantako kaj ĝi falis morte pro malĝojo.

**Ekzerco 11 estas sur paĝo 97**

## 12. LA OFERO DE REĜO BIMBISARO

De la rivero Anoma, la juna reĝido vagis de loko al loko sin vestinte kiel almozulon. Li hazarde vagis al la urbo Raĝagaho, kie vivis la reĝo Bimbisaro. Kun almozbovlo en la manoj, Sidarto iris sur la stratoj kolektante manĝaĵon de domo al domo kiel ĉiuj aliaj religiaj monaĥoj. Oni eknomis lin "Ŝakjamunio" aŭ la Saĝulo de Ŝakja Klano. Aliaj nomis lin "Asketo" aŭ "Asketo Gotamo", sed neniu plu nomis lin Reĝido Sidarto.

Li estis tre bela, juna, sana, pura kaj diskreta. Li parolis tre sincere kaj ĝentile. Li ne petis, ke oni donu ion al li, sed estis feliĉo kaj plezuro por homoj meti iom da manĝaĵo en lian bovlon.

Iuj homoj iris al la reĝo kaj raportis: "Via Reĝa Moŝto, venis junulo, kiun oni nomas 'Asketo Gotamo'. Li estas tre pura, diskreta, bonkora, ĝentila kaj tute ne similas al almozulo."

Apenaŭ Reĝo Bimbisaro aŭdis la nomon "Gotamo", li tuj sciis, ke tiu reĝido estas la filo de lia amiko Reĝo Sudodano. Li do iris al la reĝido kaj demandis: "Kial vi tiel faras? Ĉu vi kverelis kun via patro? Kial vi tiel vagas? Restu ĉi tie kaj mi donos al vi duonon de mia regno."

"Grandan dankon al vi, sinjoro. Mi amas miajn gepatrojn, edzinon, filon, kaj vin kaj ĉiujn homojn. Mi volas trovi metodon por ĉesigi maljuniĝon, malsaniĝon, maltrankvilecon kaj morton. Do mi daŭre klopodos por tio," dirinte, Asketo Gotamo foriris.

**Ekzerco 12 estas sur paĝo 98**

## 13. LA UNUAJ INSTRUISTOJ DE LA BUDHO

Tiam en Hindio troviĝis multaj religiaj instruistoj. Unu el la instruistoj plej bonaj kaj famaj estis Alaro Kalamo. Asketo Gotamo iris lerni ĉe li. Li restis ĉe la instruisto kaj lernis de li multajn sciojn inkluzive de meditado. Fine, Alaro Kalamo diris, ke li ne plu kapablas instrui lin: "Nun vi jam estas same erudicia kiel mi mem. Troviĝas nenia diferenco inter vi kaj mi. Restu ĉi tie, akceptu mian pozicion kaj kune kun mi instruu miajn lernantojn."

Sed Gotamo tute ne interesiĝis pri la restado. Kvankam li lernis multe, tamen li sciis bone, ke li ankoraŭ estas viktimo de maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto, kaj ke lia klopodo ankoraŭ ne sukcesis.

Do Gotamo forlasis Alaron Kalamon kaj klopodis por serĉi novan instruiston. Finfine li trovis alian grandan instruiston Udako, kiu famiĝis pro sia inteligenteco. Gotamo denove lernis tre rapide kaj baldaŭ sciis tiel multe kiel sia instruisto. Li trovis, ke Udako ne povas instrui al li kiel ĉesigi suferon, maljuniĝon kaj morton, kaj krome, li aŭdis neniun, kiu povas solvi tiujn problemojn. Asketo Gotamo malesperiĝis refoje kaj forlasis Udakon kun firma decido, ke li klopodu per si mem ĝis li eltrovos la kaŭzon de ĉiuj suferoj en la homa vivo.

**Ekzerco 13 estas sur paĝo 98**

## 14. KLOPODO EN SES JAROJ

Forlasinte sian duan instruiston Udako, Reĝido Sidarto famiĝis kiel Asketo Gotamo. Li renkontis siajn kvin amikojn Kondano, Badijo, Vapo, Mahanamo kaj Asaĝio. Rezigninte la palacon kaj luksan vivon, ili fariĝis asketoj aŭ lernantoj pri la vivo kaj ekvivis mallukse. Ili iris al Uruvelo, kie Gotamo klopodis kaj torturis sian korpon ses jarojn dum liaj kvin amikoj subtenis kaj prizorgis lin.

"Mi praktikos asketismon ĝis la plej alta grado," decidis Gotamo, "ĉar tio estas la vojo por atingi saĝon." Li praktikis fastadon, kion oni opiniis unu el la plej bonaj metodoj por atingi saĝon. Li sin vivtenis per nur grajno da rizo ĉiutage, kaj poste per nenio. Lia korpo tiel maldikiĝis, ke liaj kruroj similis al bambuaj bastonoj; lia spino similis al ŝnuro; lia brusto similis al nefinita domsupro kaj liaj okuloj profunde kaviĝis kiel ŝtonoj en profunda puto. Lia haŭto perdis sian oran koloron kaj tute nigriĝis. Fakte li aspektis kiel senkarna ostaro vivanta. Li persistis en la meditado malgraŭ la sufero de teruraj doloro kaj malsato.

Lia alia metodo por torturi la korpon estis, ke li sin detenis de spirado por longa tempo ĝis li perceptis grandan doloron en la oreloj, kapo kaj tuta korpo. Li povus fali sur la teron perdinte sian konscion. Dum la periodoj de la plena luno kaj nova luno, li iris en arbaron aŭ tombejon por mediti surportante malnovajn ĉifonaĵojn kolektitajn de tombejo kaj rubejo. Li havis timon en la komenco, precipe kiam alvenis sovaĝaj bestoj, sed li neniam provis forkuri. Li restis kuraĝe en tiuj timindaj lokoj meditante tutan tempon.

Li faris tiujn praktikadojn dum ses jaroj. Kvankam li longe klopodis spite al grandaj doloro kaj sufero, tamen li trovis nek saĝon nek respondon al siaj demandoj. Li fine pensis: "Tiuj troaj rigorecoj ne kondukas al iluminiĝo." Li ekiris almozpeti manĝaĵon en la vilaĝo por sin resanigi. Kiam liaj kvin amikoj vidis tion, ili forlasis lin senesperiĝinte. Ili foriris de li kun siaj bovloj kaj roboj kaj volis fari nenion plu por li.

**Ekzerco 14 estas sur paĝo 98**

## 15. LA ORA BOVLO

Ĝuste tiam en la najbara vilaĝo Senanio vivis juna, bela kaj riĉa knabino Suĝata, kiu deziris samklasan edzon kaj filon. Ŝi atendis longajn jarojn sed ŝia deziro ne realiĝis. Oni proponis, ke ŝi iru al iu banjanarbo ĉe la rivero Neranĝaro kaj preĝu al la arba feo por havi edzon kaj filon. Ŝi agis laŭ la propono, edziniĝis al junulo poste kaj ili havis amindan filon. Ŝi estis tiel feliĉa, ke ŝi decidis plenumi sian promeson al la arba feo pro la realiĝo de siaj deziroj.

Suĝata havis mil bovinojn. Ŝi bredis ilin per dolĉa plektokreskaĵo nomata Valmio, por ke la bovina lakto estu dolĉa. Ŝi melkis tiujn mil bovinojn kaj per la lakto nutris kvin cent bovinojn, per kies lakto ŝi nutris ducent kvindek bovinojn, ĝis ŝi bredis nur ok bovinojn siavice per la lakto. Ŝi faris tion nur por akiri la plej dolĉan kaj nutroriĉan lakton, per kiu ŝi faros bongustan laktan rizon kiel oferaĵon al la arba feo.

Kiam ŝi okupiĝis pri la lakta rizo, ŝi surpriziĝis vidinte, ke al ŝi kuris ŝia servistino, kiu iris purigi kaj pretigi la spacon sub la banjanarbo. Kun granda ĝojo kaj ekscitiĝo, la servistino diris: "Mastrino! La banjana feo estas meditanta sub la arbo. Kiel feliĉa vi estos, ke la feo persone akceptos vian manĝaĵon."

Suĝata ankaŭ tiel ekscitiĝis kaj ĝojis, ke ŝi dancis kune kun la servistino. Ili des pli bone pretigis la laktan rizon kaj metis ĝin en oran bovlon.

Portante la bongustan laktan rizon, ili ambaŭ iris al la banjanarbo. Suĝata vidis la meditanton kaj tuj konsciis, ke tiu estas sanktulo. Estante bela kaj orkolora, la meditanto sidis trankvile. Ŝi ne sciis, ke li fakte estas Asketo Gotamo. Ŝi riverencis kun respekto kaj diris: "Sinjoro, bonvolu akcepti mian donacon de lakta rizo. Vi sukcesos en viaj klopodoj kiel mi jam faris."

Asketo Gotamo manĝis la dolĉan densan laktan rizon, kaj poste sin banis en la rivero Neranĝaro. Tio estis la sola manĝaĵo, kiun li prenis, kaj la sola baniĝo, kiun li havis, en la lastaj sep semajnoj. Kiam li finis tion, li forĵetis la oran bovlon en la riveron, dirante: "La bovlo iru kontraŭ la fluo se mi baldaŭ sukcesos fariĝi Budho hodiaŭ. Se ne, ĝi drivu laŭ la akvofluo." La ora bovlo iris kontraŭ la fluo kaj ĉiam restis en la mezo de la rivero.

**Ekzerco 15 estas sur paĝo 99**

## 16. KLOPODO POR ILUMINIĜO

Post kiam Gotamo manĝis la bongustan rizon oferitan de Suĝata en la nokto, li iris al Gajao kaj ekserĉis taŭgan lokon por sidi kaj mediti. Li trovis banjanarbon kaj sidiĝis ĉe ĝia orienta flanko, kiun oni kutime kredis stabila kaj libera de tremo kaj skuado. Sidiĝinte kun la kruroj krucitaj kaj la dorso al la arbo, Gotamo faris firman decidon: "Eĉ se detruiĝos miaj haŭto, nervoj kaj ostoj, kaj sekiĝos mia sango, mi neniel forlasos la sidejon antaŭ ol atingi la perfektan saĝon, kiu estas la plej supera iluminiĝo kaj kondukas al eterna feliĉo."

Li meditis per la atentado pri la spiroj. Estis la antaŭnokto de la plenluno. Frunokte trudiĝis en lian menson multaj malbonaj pensoj, priskribitaj kiel la malica dio Marao kaj ties armeo. En lia koro aperis pensoj pri deziro, avido, timo kaj alkroĉiĝo, sed li ne permesis tiujn pensojn perturbi lian koncentradon. Li sidis pli firme ol antaŭe. Li ekperceptis trankvilecon kaj sentimecon kiam li lasis la pensojn aperi kaj malaperi per si mem. En la unua periodo de la nokto, li ekhavis povon travidi siajn pasintajn vivojn.

En la dua periodo de la nokto Gotamo komprenis la efemerecon de la vivo, kaj kiel vivestaĵoj mortas nur por denove renaskiĝi. En la tria periodo de la nokto, li eksciis la kaŭzon de ĉiuj malbonoj kaj suferoj, kaj kiel liberiĝi de tio. Li komprenis kiel ĉesigi malĝojon, malfeliĉon, suferon, maljuniĝon kaj morton.

**Ekzerco 16 estas sur paĝo 99**

## 17. BRILAS LA SUNO DE ILUMINIĜO

La Budho rezistis kontraŭ la atako de Marao. Fine retiriĝis la maliculo kaj kvietiĝis la terura ŝtormo okazigita de li. Nun la menso de la Honorulo trankviliĝis. Malaperis la densa mallumo kaj reaperis la plena luno kaj steloj.

La Sinjoro iris en profundan meditadon trapasinte la komprenan limon de ordinaraj homoj. Li vidis la realecon anstataŭ la ŝajnon de la vera mondo. Lia menso moviĝis rapide antaŭen kaj supren kiel aglo ŝvebis senpene al la suno.

Li vidis siajn pasintajn vivojn kaj ĉiujn siajn antaŭajn naskiĝojn kun bonaj aŭ malbonaj kondutoj kaj iliaj gajnoj kaj perdoj. Kiam lia menso leviĝis supren, li vidis la vivcirklon de homaj naskiĝo kaj morto. Li vidis, ke la vivestaĵoj naskiĝas kaj mortas ripete laŭ sia karmo.

Tiuj, kiuj faras bonan konduton, naskiĝas en ĉieloj. Kvankam ilia vivo daŭras pli longe ol tiuj sur la tero, tamen ĝi ankaŭ finiĝas en morto ĉar ankaŭ ili estas viktimoj de la leĝo de efemereco. Tiuj, kiuj suferas en la inferaj statoj ankaŭ povos daŭri en la vivcirklo de renaskiĝoj. Do ĉiuj vivestaĵoj escepte de budhoj kaj aliaj sanktuloj estas katenitaj en la sama vivcirklo pro la senscieco.

Kiam lia vidpovo fariĝis pli klara, li vidis, ke la tiel nomata homa animo, kiun oni asertas kiel sin mem, disrompiĝis en erojn kaj kuŝiĝis antaŭ li kiel neinterkrucigitaj fadenoj de vesto. Li vidis la kaŭzon de la vivĉeno, kiu estas senscieco. La senscia homo, kiu alkroĉiĝas al senvaloraj kaj efemeraj aferoj, kreas en si mem pli kaj pli da danĝeraj iluzioj. Sed kiam oni rezignas la deziron, iliaj iluzioj finiĝas kaj senscieco malaperas kiel la nokto. Tiam ekbrilas la suno de iluminiĝo.

Kompreninte la realecon de la mondo, la Budho perfektiĝis en la saĝo kaj ne plu renaskiĝos denove. Liaj avido kaj pereiga deziro tute elradikiĝis kiel fajro estingiĝis pro manko de brulligno.

La Budho, la perfektulo, sidis baniĝante en la brila lumo de la Saĝo kaj Vero. La mondo ĉirkaŭ li restis kvieta kaj brila, kaj milda brizo blove levetis la foliojn de la bodhiarbo.

Plene de kompatemo, la Sinjoro sidis sub la arbo en profunda kontemplado de la Darmo, restante en la perfekta paco de nirvano.

Je la tagiĝo post sia iluminiĝo, la Budho eldiris versaĵon:

"Vi vagis tra multaj naskiĝoj en metempsikozo,

Serĉante, sed trovante nenion, la konstruinto de tiu ĉi domo.

Malfeliĉa estas la ripeta naskiĝo.
Domkonstruinto, Vi jam vidis.
Vi ne plu konstruos domon.
Ĉiuj viaj ĉevronoj disrompiĝis;
Viaj traboj frakasiĝis.
La menso atingis absolutecon.
Senavido jam realiĝis."

**Ekzerco 17 estas sur paĝo 99**

## 18. SEP SEMAJNOJ POST LA ILUMINIĜO

**Sub la bodhiarbo**

En la unua semajno post sia ilumiĝo, la Budho sidis sub la bodhiarbo spertante la feliĉon de libereco kaj trankvileco. Li estis trankvila kaj feliĉa, sin liberiginte de ĝenaj pensoj.

**Fiksrigardi al la arbo**

En la dua semajno, la Budho staris pro dankemo fiksrigardante al la arbo, kiu ŝirmis lin dum lia klopodo por budhiĝo, kiel li meditis ĉe la bodhi-arbo.

Pro la ekzemplo, ĝis nun ankoraŭ furoras la kutimo, ke oni respektas ne nur al la originala bodhi-arbo, sed ankaŭ al ĉiuj postaj bodhi-arboj.

**La ora ponto**

En la tria semajno, la Budho vidis per sia mensa rigardo, ke la ĉielanoj en la ĉieloj dubas, ĉu li jam atingis iluminiĝon. Por provi sian iluminiĝon, la Budho kreis oran ponton en la aero kaj iris supren kaj malsupren dum la tuta semajno.

**La juvela ĉambro**

En la kvara semajno, li kreis belan juvelan ĉambron kaj sidis en ĝi meditante pri tio, kio estas konata kiel Abidarmo, alinome, "la detala instruado". Liaj menso kaj korpo estis tiel purigitaj, ke el lia korpo radiis ses-koloraj lumoj blua, flava, ruĝa, blanka, oranĝa kaj miksa el la kvin koloroj. Hodiaŭ la budhisma standardo estas farita el la ses koloroj. Ĉiu koloro prezentis apartan noblan kvaliton de la Budho: la flava por sankteco, blank por pureco, blua por konfido, ruĝa por saĝo kaj oranĝa por senavido. La miksa koloro prezentis ĉiujn tiujn noblajn kvalitojn.

**Tri knabinoj**

En la kvina semajno, kiam la Budho meditis sub la banjanarbo, tri plej ĉarmaj knabinoj nomataj Tanha, Rati kaj Raga venis por ĝeni lian meditadon. Ili dancis sorĉe kaj tente, kaj faris ĉion eblan por logi la Budhon rigardi iliajn dancojn. Sed li persistis en la meditado senĝenite, kaj ili baldaŭ enuiĝis kaj forlasis lin sola.

**La Mucalindo-arbo**

La Budho iris al la mucalindo-arbo kaj meditis sub ĝi. Ekpluvegis, kaj la giganta kobra reĝo nomata Mucalindo eliris, volvis sian korpon en sep rondoj ĉirkaŭ la Budho por teni lin varma, kaj tenis sian kapon super lia kapo por protekti lin de la pluvo. Post sep tagoj la pluvo ĉesis, kaj la serpento sin ŝanĝis en junulon, kaj esprimis sian respekton al la Budho. La Budho diris:

"Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas kontentaj. Feliĉaj estas tiuj, kiuj aŭdas kaj scias la Veron. Feliĉaj estas tiuj, kiuj havas bonan volon al ĉiuj vivestaĵoj en la mondo. Feliĉaj estas tiuj, kiuj ne havas kroĉiĝojn kaj jam rezignis sensajn dezirojn. La malapero de la vortoj

"Mi estas" estas vere plej granda feliĉo."

**La Raĝajatano-arbo**

En la sepa semajno, la Budho meditis sub raĝajatano-arbo. En la kvindeka mateno, post liaj sep semajnoj de fastado, du komercistoj Tapuso kaj Baliko iris al li. Ili oferis al li rizajn kukojn kaj mielon, kaj ĉesigis lian fastadon. La Budho diris al ili pri iom da scio, kion li trovis en sia iluminiĝo.

Ambaŭ komercistoj fariĝis la unuaj laikaj disĉiploj post la rifuĝo en la Budho kaj la Darmo, kiu estas la instruo de la Budho. Ili petis ion sanktan de la Budho por konservi kiel memoraĵon. La Budho palpis sian kapon per la dekstra mano, eltiris iom da haroj kaj donis al ili. Sur la vojo al sia hejmo, la komercistoj oferis tiujn harajn relikvojn nomatajn "Kesa Datu" en la Swedagon-pagodo de la nuna birma urbo Ranguno.

**Ekzerco 18 estas sur paĝo 99**

**Ekzerco 19 estas sur paĝo 100**

## 19. LA UNUAJ KVIN MONAĤOJ

Nun la Budho volis sciigi al aliuloj, kiel atingi saĝon, konduti bone kaj servi al la aliaj. Li pensis: "Nun jam mortis Asito, Aklaro kaj Udako, sed miaj amikoj Kondano, Badijo, Vapo, Mahanamo kaj Asaĝio ankoraŭ restas en Benareso. Mi devas iri tien por diri al ili."

Do li foriris al Benareso ĝis fine li atingis la arbaron, kie liaj kvin amikoj praktikis asketismon. La arbaro ĉe Sarnato estis nomata Cerva Parko. Kiam ili vidis lin aliranta, ili diris unu al alia: "Rigardu tien! Jen estas la luksama Gotamo, kiu rezignis fastadon kaj dronas en vivo facila kaj komforta. Ni nek parolu nek montru respekton al li. Neniu iru transpreni lian bovlon aŭ robon. Ni nur lasu maton tie por li sidi se li volas, kaj se li ne volas, li do staru. Kiu prizorgos sentaŭgan asketon kiel lin!"

Sed kiam la Budho iris pli kaj pli proksimen, ili ekrimarkis, ke li ŝanĝiĝis. Ĉirkaŭ li estis io nobla kaj majesta, kian ili neniam vidis antaŭe. Antaŭ ol ekscii kion fari, ili pretervole forgesis sian interkonsenton. Iu hastis antaŭen por bonvenigi lin kaj respekte transprenis liajn bovlon kaj robon, alia pretigis sidejon por li, kaj la tria eliris preni akvon por li lavi siajn piedojn.

Sidiĝinte, la Budho ekparolis: "Aŭskultu, asketoj. Mi havas metodon al senmortiĝo. Mi sciigos al vi. Lasu min instrui al vi. Se vi aŭskultos, lernos kaj praktikos laŭ mia instruo, anstataŭ en la estonta vivo, nur ĉi tie en la nuna tempo vi mem povos scii, ke mia diro estas ĝusta. Vi mem spertos la staton tute super la vivo kaj morto."

Kompreneble la kvin asketoj ege miris, aŭdinte tian parolon de ilia malnova kamarado. Ili kredis, ke li jam rezignis ĉiujn klopodojn serĉantajn la Veron, ĉar ili propraokule vidis lin rezigninta malfacilan asketismon. En la komenco ili tute ne povis kredi lin, do ili diris tion al li.

Sed la Budho respondis: "Vi eraris, Asketoj. Mi nek rezignis ĉiujn klopodojn, nek prenis vivon senbridan, komfortan kaj facilan. Aŭskultu min. Mi vere atingis la plej superajn saĝon kaj vidon, pri kiuj mi povas instrui al vi, tiel ke vi povas atingi per vi mem."

Fine la kvin asketoj volonte aŭskultis lin, kaj li faris sian unuan instruadon. Li konsilis al siaj sekvantoj, ke ili sekvu la mezan vojon, evitu du ekstremojn de senbrideco kaj asketismo. Unuafoje li instruis pri la Kvar Noblaj Veroj kaj la metodo kiel praktiki la Noblan Okeran Vojon, kiu estas la vojo al la iluminiĝo, kaj kondukas al liberiĝo de suferoj. La komunumo de monaĥoj establiĝis per la konversacio de la kvin asketoj en Cerva Parko ĉe Sarnato.

## 20. LA UNUA INSTRUADO DE LA BUDHO

La unua instruado de la Budho estas nomata "Sutro pri Turnado de Darma Rado" (Dhammacakkap Pavaottana Sutta", kiu signifas turnadon de Darma rado). Ĝi okazis en la dekkvina de julio, nomata Asalho.

La Budho donis la instruadon al la kvin asketoj, kiuj estis liaj antaŭaj kamaradoj en Cerva Parko en Isipatano, la nuna Sarnato, proksime al Benareso de Hindio. Multaj anĝeloj kaj dioj ĉeestis por aŭskulti la predikadon.

La Budho komencis la predikadon konsilante al la kvin asketoj rezigni du ekstremojn, kiuj estas senbrideco kaj asketismo.

Li admonis ilin kontraŭ tro multe da voluptaj plezuroj, ĉar tiaj plezuroj estas mondaj fundamentaĵoj ne noblaj kaj malhelpas en spirita disvolviĝo. Aliflanke, turmento al korpo estas dolora, ne nobla kaj ankaŭ malhelpas en spirita disvolviĝo. Li konsilis ilin sekvi la Mezan Vojon, kiu helpas klare vidi la realecon de aferoj, kaj atingi la scion, pli altan saĝon, trankvilecon kaj iluminiĝon aŭ nirvanon.

Poste, la Budho instruis al la kvin asketoj la Kvar Noblajn Verojn, kiuj estas la Veroj de sufero, ĝia kaŭzo, ĝia finiĝo kaj la metodo por ĉesigi ĝin. Ĉio en la mondo estas plena de suferoj, kaj la kaŭzo de suferoj estas avido. La finiĝo de suferoj estas nirvano. La metodo por ĉesigi suferojn estas la Nobla Okera Vojo.

La Budho diris, ke li iluminiĝis nur post kiam li komprenis la Kvar Noblajn Verojn.

La Nobla Okera Vojo havas ok partojn aŭ faktorojn:

1. Ĝusta kompreno signifas scii kaj kompreni la Kvar Noblajn Verojn.

2. Ĝusta sinteno signifas havi tri specajn pensojn aŭ sintenojn.

(1) Pensoj de rezigneco aŭ sinteno de "forlaso".

(2) Pensoj de bona deziro al aliaj, kontraŭ malbona deziro.

(3) Pensoj de senmalhelpo, kiu estas kontraŭ krueleco.

3. Ĝusta parolo rilatas al sindeteno de malvero, inkluzive de mensogo aŭ diro de malvero, malpacigo aŭ malbonaj diroj pri aliaj homoj, krudaj vortoj kaj sensencaj babiloj.

4. Ĝusta konduto rilatas al sindeteno de mortigo, ŝtelo kaj seksa miskonduto.

5. Ĝusta vivtenado rilatas al kvin specoj da aferoj, de kiuj oni devas sindeteni por havi noblan vivon. La evitindaj aferoj estas komercoj de

armiloj, vivantaj bestoj bredataj por mortigi, malsobriiga trinkaĵo kaj veneno.

6. Ĝusta klopodo havas kvar partojn uzantajn meditadon.

Klopodo ĉesigi la aperintajn malbonajn pensojn.

Klopodo preventi la aperon de la malbonaj pensoj.

Klopodo disvolvi la bonajn pensojn.

Klopodo teni la aperintajn bonajn pensojn.

7. Ĝusta atento konsistas el la kvaropo de la atentoj al korpo, sento, menso kaj Darmo respektive.

8. Ĝusta koncentrado estas koncentriĝo de menso disvolviĝinta en meditado.

Tiuj ok faktoroj povas grupiĝi en jenajn tri subgrupojn:

silao,kiu estas moraleco

ĝusta parolo, ĝusta konduto kaj ĝusta vivtenado

samadio, kiu estas stato de koncentrita menso en meditado

ĝusta klopodo, ĝusta atento kaj ĝusta koncentrado

saĝo

ĝusta sinteno kaj ĝusta kompreno

Tiuj moraleco, koncentrado kaj saĝo estas la tri ŝtupoj sur vojo al mensa pureco, kies celo estas nirvano. Tiuj ŝtupoj estas priskribitaj en jena bela versaĵo:

Ĉesigu la malbonan konduton,

Faru la bonan konduton,

Purigu la menson

Jen la konsilo de ĉiuj Budhoj.

**Ekzerco 20 estas sur paĝo 100**

## 21. SERPENTA REĜO

Tuj kiam la Budho havis 60 disĉiplojn, li forsendis ilin por instrui homojn en diversaj lokoj. Li mem forlasis Cervan Parkon kaj sin turnis suden al Magadho.

Tri fratoj, kies nomoj estis Uruvelo Kasapo, Nadio Kasapo kaj Gajo Kasapo, loĝis ĉe la vojo sur la rivera bordo. Ĉiu el ili vivis respektive kun 500, 300 kaj 200 sekvantoj.

Iuvespere, la Budho vizitis la kabanon de Uruvelo Kasapo kaj petis: "Se ne estas maloportune al vi, ĉu mi rajtus tranokti en via kuirejo?"

"Mi ne rifuzas, Granda Gotamo, sed en la kuirejo vivas feroca serpento. Mi timas, ke ĝi malutilos al vi," diris Uruvelo Kasapo.

"Mi ne timas," respondis la Budho, "kaj se vi ne rifuzas, mi tranoktos tie."

La Budho iris en la kuirejon, metis iom da herboj sur la plankon kiel liton kaj sidiĝis. Aŭdinte bruon, la feroca serpenta reĝo alrampis el murtruo kaj malfermis sian faŭkon por mordi la Budhon. "Mi ne malutilos al la serpenta reĝo. Mi konkeros ĝin per miaj amo kaj bonkoreco," pensis la Budho. Ju pli koleriĝis la serpenta reĝo, des pli bonkora kaj amema fariĝis la Budho. La serpenta reĝo ne povis damaĝi lin.

Uruvelo Kasapo iris al la Budho frumatene kaj trovis, ke li sidas en profunda meditado. La asketo surpriziĝis kaj demandis al li, ĉu la serpenta reĝo faris ion malbonan al li. "Ĉi tie, rigardu per viaj okuloj," diris la Budho kaj malkovris sian almozbovlon. La feroca serpenta reĝo elrampis kaj la asketo ekkuris pro timo. Sed la Budho haltigis lin, dirante, ke li havas metodon por dresi ĉiujn ferocajn serpentojn.

"Ĉu mi povas lerni?" demandis la asketo. La Budho do donis sian instruon. Uruvelo Kasapo, la fratoj de Uruvelo Kasapo konvertiĝis al la Budha Darmo kune kun ĉiuj siaj sekvantoj.

**Ekzerco 21 estas sur paĝo 100**

## 22. REVENI HEJMEN

Kiam Reĝo Sudodano sciis, ke la Budho instruas en Raĝagaho, li sendis naŭ subulojn sinsekve por inviti la Budhon al Kapilavasto. Tamen ĉiuj senditoj fariĝis monaĥoj. Aŭdinte la instruon de la Budho, ili estis tiel allogitaj, ke ili forgesis la ordonon de la reĝo.

La reĝo volis restigi la Budhon en parko nomata Nigrodo. Sed ĉar la Budho ankoraŭ ne venis, la reĝo sendis Kaludajon, la deinfanecan amikon de la Budho, por inviti la lastan reveni al Kapilavasto.

Kiam homoj de Kapilavasto trovis, ke la Budho jam venis al ilia urbo, ili svarmis por vidi lin. Ankaŭ la parencoj de Reĝido Sidarto venis kaj diris: "Li estas nia plijuna frato, nia nevo, nia nepo."

Tiam la Budho konsciis, ke eĉ en tiu tempo iuj homoj ankoraŭ ne komprenas, ke li jam iluminiĝis, sed opinias, ke ili estas liaj pliaĝuloj. Li montris al ili miraklon nomatan "ĝemela miraklo". Vidinte tion, eĉ la reĝo adoris lin.

La Budho portis sian almozbovlon kaj kolektis manĝaĵon de domo al domo en la sekva tago. Vidinte tion, la reĝo ege ĉagreniĝis. "Kial vi malhonorigas min, mia filo? Kial vi tiel ruinigas min? Kial vi ne prenas manĝon en la palaco? Ĉu estas dece por vi almozi manĝaĵon en tiu ĉi urbo, kie vi kutime veturis en orita portseĝo? Kial vi humiligas min, mia kara?"

"Mi ne humiligas vin, Granda Reĝo. Tio estas nia kutimo," respondis la Budho trankvile.

"Kiel vi povas tiel agi? Neniu en nia familio tiel almozpetis. Kiel vi povas diri, ke tio estas via kutimo?" demandis la konfuzita reĝo.

"Granda Reĝo, tio ne estas la kutimo de la reĝa familio, sed de la budhoj. Ĉiuj antaŭaj budhoj sin vivitenis per akceptado de manĝaĵoj en tiu ĉi maniero."

Sed kiam la reĝo petis la Budhon manĝi en la palaco, la Budho akceptis la peton bonkore.

**Ekzerco 22 estas sur paĝo 101**

## 23. LA RAKONTO PRI REĜIDINO JASODARA

Post la vespermanĝo, ĉiuj, kiuj rekonis la Budhon kiel Reĝidon Sidarto, venis vidi lin, krom Jasodara. Ili ĉiuj surpriziĝis sed sentis ĝojon revidi sian reĝidon en monaĥa robo.

Jasodara restis en sia ĉambro, pensante: "Reĝido Sidarto jam iluminiĝis kaj fariĝis la Budho nun. Li apartenas al la klano de Budhoj. Ĉu estas dece por mi iri al li? Li ne bezonas min, kaj ankaŭ ne povas bezoni min. Mi opinias, ke estas pli bone resti kaj atendi"

Post momento, la Budho demandis: "Kie estas Jasodara?"

"Ŝi restas en sia ĉambro," respondis lia patro. "Mi iros tien," diris la Budho, kaj doninte sian bovlon al la reĝo, li iris al ŝia ĉambro. Kiam li eniris, li diris al la reĝo: "Lasu ŝin esprimi sian respekton al mi laŭplaĉe. Nenion diru."

Apenaŭ la Budho iris en la ĉambron, Jasodara hastis al li eĉ antaŭ ol li sidiĝis. Ŝi falis sur la plankon, prenis liajn piedojn, metis sian kapon ĉe liajn maleolojn kaj ploradis ĝis liaj piedfingroj malsekiĝis. La Budho restis kviete kaj neniu haltigis ŝin ĝis ŝi laciĝis de la plorado. Tiam Reĝo Sudodano diris: "Sinjoro, kiam mia bofilino aŭdis, ke vi portas flavan robon, ŝi ankaŭ ekvestis sin per la flava. Kiam ŝi aŭdis, ke vi manĝas nur unu fojon ĉiutage, ŝi ankaŭ tiel ekfaris. Kiam ŝi aŭdis, ke vi jam rezignis altegan liton, ŝi ekdormis sur malalta lito, kaj kiam ŝi aŭdis, ke vi rezignis florkronojn kaj parfumojn, ŝi ankaŭ rezignis ilin. Kiel virta estas mia bofilino!"

La Budho kapjesis kaj diris: "Jasodara estis tiel pia kaj fidela al mi ne nur en tiu ĉi vivo sed ankaŭ en la antaŭaj vivoj, Reĝo."

**Ekzerco 23 estas sur paĝo 101**

## 24. LA RAKONTO PRI REĜIDO NANDO

En la tria tago post la hejmenreveno de la Budho al Kapilavasto, oni invitis lin al la geedziĝa festo de lia plijuna duonfrato Reĝido Nando kaj ties nova edzino Reĝidino Ĝanapada Kaljani. La Budho ĉeestis la geedziĝajn ceremonion kaj celebradon, benis ilin, kaj foriris lasante sian almozbovlon ĉe Nando.

Nando pensis: "Mi iros al la monaĥejo por redoni la bovlon." Post kiam Nando iris en la monaĥejon, la Budho subite demandis al li post iom da interbabilo kun li: "Nando, ĉu vi volas fariĝi monaĥo?"

"Jes, Sinjoro," respondis Nando kaj la Budho ordinis lin kiel monaĥon.

Poste, Nando estis tre malĝoja kaj malfeliĉa pro sopiro al sia bela edzino. "Kial vi estas tiel malĝoja, Nando?" demandis aliaj monaĥoj.

"Fratoj, mi estas ege malkontenta. Mi tute ne volas havi la nunan vivon. Mi volas forlasi por reiri hejmen."

La Budho iris al Nando por babili kun li. Unue la Budho montris al li simiinon. Ĝiaj nazo kaj vosto forbruliĝis; ĝia korpo vundiĝis de brulo kaj sangis. "Ĉu vi vidis tiun ĉi simiinon, Nando? Tenu ĝin en vian memoron," diris la Budho.

Poste la Budho montris al Nando 500 ĉielajn feinojn. "Nando, ĉu vi vidis tiujn feinojn?"

"Jes," respondis Nando.

"Kiu estas pli bela, feino aŭ Ĝanapada Kaljani?"

"Sinjoro, same kiel mia edzino multe plibelas ol la bruligita simiino, tiel la feinoj estas pli superaj ol ŝi."

"Bone, Nando, kion vi faros poste?"

"Honora Sinjoro, per kio oni povas havi ĉielan feliĉon?"

"Per plenumo de monaĥa devo."

"Do estas granda plezuro por mi havi monaĥan vivon," diris Nando, kaj li eksekvis la instruon de la Budho tre atente.

**Ekzerco 24 estas sur paĝo 101**

## 25. LA RAKONTO PRI REĜIDO RAHULO

En la sepa tago post la hejmenreveno de la Budho, Reĝidino Jasodara bone vestis la junan Rahulon. Vartite de siaj patrino kaj avo, Rahulo jam aĝis sep jarojn. Ŝi montris la Budhon kaj diris: "Jen via patro, Rahulo. Iru kaj petu vian heredaĵon."

Naiva Rahulo iris al la Budho. Li fiksrigardis la vizaĝon de la Budho, ripetis la vortojn de sia patrino kaj aldonis: "Patro, plaĉas al mi eĉ via ombro."

Kiam la Budho forlasis la palacon, Rahulo sekvis lin dirante, "Donu al mi la heredaĵon." Irante al la parko, la Budho pensis: "Li deziras la valoraĵon de la patro, sed tio nur akompanas la homan vivon, kaj la homa vivo estas plena de malfacilo kaj suferado. Anstataŭe mi heredigos al li tion, kion mi scias, kaj tiel mi donos al li bonegan heredaĵon." La Budho do petis sian disĉiplon Ŝariputo, ke li ordinu Rahulon.

Reĝo Sudodano ege ĉagreniĝis pro la informo, ke lia aminda nepo fariĝis monaĥo. Li diris al la Budho: "Kiam vi forlasis hejmon, mi tristiĝis. Kiam Nando forlasis hejmon, mia koro doloris. Mi koncentris mian amon al mia nepo, sed ankaŭ mia nura trezoro forlasis min. Bonvolu ne plu ordini junulojn sen konsento de iliaj gepatroj." La Budho konsentis pri tio kaj ekde tiam ne plu ordinis junulojn sen konsento de iliaj gepatroj.

**EKZERCO 25 ESTAS SUR PAĜO 102**

## 26. DU ĈEFAJ DISĈIPLOJ

Proksime al Raĝagaho situis du vilaĝoj nomataj Upatiso kaj Kolito. La estroj de ambaŭ vilaĝoj ankaŭ estis konataj respektive kiel Upatiso kaj Kolito. Ili estis tre intimaj amikoj.

Iutage Ŝari, la edzino de Upatiso, naskis filon nomatan Ŝariputo. En la sama tago Mogali, la edzino de Kolito, ankaŭ naskis filon nomatan Mogalano. Poste, iliaj filoj fariĝis bonaj amikoj.

Kreskinte, ambaŭ knaboj ŝatis rigardi dramon. Iutage kiam ili spektis dramon nomatan Girago Samapuĝo, kiu signifas la montan feston, ili decidis forlasi hejmon por trovi pli grandajn feliĉon kaj komprenon pri la vivo ol tion, kion ili lernis de la teatraĵoj.

Tiam ĉe Raĝagaho vivis fama religia instruisto nomata Ŝanĝajo. Ambaŭ amikoj iris por lerni de li, sed post nelonge ili forlasis lin, sentante, ke lia instruado estas ne kontentiga. Ili promesis reciproke, ke ili daŭrigu la serĉadon, studon kaj meditadon por klopodi al la Vero de la vivo, kaj se unu el ili sukcesos trovi ĝin unue, tuj informu la alian.

Iumatene, Ŝariputo vidis asketon Asaĝio kolektanta almozon en la ĉefa strato de Raĝagaho. Li iris de domo al domo kun mieno modesta kaj paca. Kiam Ŝariputo pli proksimiĝis, li rimarkis sur la vizaĝo de Asaĝio perfekte trankvilan mienon kiel glatan lagon sub la kvieta klara ĉielo. Ŝariputo aliris kaj diris modeste: "Via mieno estas serena, Amiko. Viaj okuloj estas tre klaraj kaj brilaj. Kiu estas via instruisto kaj kion li instruas, Sinjoro?"

"Mi tuj diros al vi pri tio, frato," respondis Asaĝio, "Li estas la granda asketo de Ŝakja klano. Li forlasis siajn hejmon kaj landon por sekvi senhejman vivon. Li estas mia instruisto. Lian instruon mi sekvas kaj praktikas."

"Bonvolu informi min pli."

"Mi nur estas novulo sur la vojo de la Budho," respondis la asketo modeste, "Mi ankoraŭ ne scias tre multe. Sed mi diros al vi koncize."

"Tion mi deziras, frato," diris Ŝariputo rapide, "Bonvolu diri al mi la signifon de la instruoj sen superfluaj vortoj!"

"Bonege," respondis la asketo, "Aŭskultu! La Budho instruas, ke ĉio estiĝas kaj malestiĝas laŭ koncernaj kaŭzoj."

Post kiam Honora Asaĝio finis tiujn vortojn, Ŝariputo tuj komprenis la signifon per sia saĝo. Li komprenis la veron, ke ĉio ekzistanta aŭ ekzistonta devas malestiĝi. Li diris: "Se tio estas la budha instruo, vi jam trovis la staton liberan de malĝojo kaj sufero, kaj plenan de paco kaj

feliĉo." Dankinte al Asaĝio, Ŝariputo tuj trovis sian amikon Mogalano por informi lin pri la grava novaĵo.

Antaŭ ol li ekparolis, Mogalano kriis, "Ha, frato! Kiel klara kaj brila estas via vizaĝo! Ĉu vi finfine trovis tion, kion ni serĉas?"

"Jes, frato, vi pravas," ĝojplene respondis Ŝariputo. Li tuj eksplikis al Mogalano la instruon de la Budho.

Tiel Ŝariputo kaj Mogalano aliĝis al la Budho kaj fariĝis du el liaj ĉefaj disĉiploj tuj post nelonge. Ŝariputo famiĝis pro sia saĝo dum Mogalano pro la magia povo.

**Ekzerco 26 estas sur paĝo 102**

## 27. LA RAKONTO PRI MALRIĈA ŜOPAKO

Iam en tre malriĉa familio naskiĝis knabo nomata Ŝopako. Kiam li estis sepjara, lia patro mortis kaj lia patrino edziniĝis al alia viro, kiu estis tre malica kaj kruela. La nova duonpatro ĉiam batis kaj insultis malgrandan Ŝopakon, kiu estis tre bonkora, senkulpa kaj bona.

La duonpatro pensis: "Tiu ĉi knabaĉo estas abomeninda sentaŭgulo, sed mi povas fari nenion kontraŭ li ĉar lia patrino tre amas lin. Kion mi faru kontraŭ li?"

Iun vesperon li diris: "Kara filo, ni eliru por iom promeni."

La knabo surpriziĝis kaj pensis: "La duonpatro neniam tiel bonkore parolis al mi. Eble mia patrino petis, ke li estu bonkora al mi." Do li ĝojplene eliris kun la duonpatro.

Ili iris al tombejo, kie estis multaj putraj kadavroj. La duonpatro ligis Ŝopakon al unu el ili kaj forlasis la knabon solecan kaj plorantan.

Ju pli mallumiĝis, des pli timiĝis Ŝopako. Restante sola en la tombejo, li tiel teruriĝis, ke liaj haroj stariĝis kaj ŝvitoj fluis de lia korpo. La bruo de ŝakaloj, tigroj, leopardoj kaj aliaj sovaĝaj bestoj despli teruris lin. Kiam li preskaŭ paraliziĝis pro timo, li vidis, ke homo kun nobla mieno kaj brila lumo iris al li kaj diris: "Ne ploru, Ŝopako. Mi venis helpi vin, do ne plu timu." Tiam Ŝopako rompis sian ligilon kaj trovis sin staranta antaŭ la Budho en Ĝetavana Monaĥejo. La Budho banis lin, donis al li manĝaĵon kaj veston, komfortigis kaj konsolis lin.

Samtempe la patrino demandis la malican duonpatron ĵus revenintan. "Kie estas mia filo?" Ŝi demandis. "Mi ne scias," li respondis, "li revenis hejmen antaŭ ol mi." La patrino ne povis endormiĝi la tutan nokton pro maltrankviliĝo.

Frumatene en la sekva tago ŝi iris peti helpon de la Budho. "Kial vi ploras, fratino?" demandis la Budho.

"Sinjoro," respondis la virino, "mi havas solan filon Ŝopako kaj li perdiĝis lastanokte. Mia edzo promenis kun li kaj la malgranda knabo neniam revenis hejmen."

"Ne maltrankviliĝu, fratino. Via filo estas sekura. Jen li estas." Dirante, la Budho montris al ŝi Ŝopakon, kiu jam fariĝis monaĥo. La patrino ĝojegis vidinte denove sian karan filon. Aŭdinte la instruon de la Budho, ankaŭ ŝi fariĝis lia sekvantino.

**Ekzerco 27 estas sur paĝo 102**

## 28. LA RAKONTO PRI SINJORINO PATAĈARA

Dum la vivperiodo de la Budho, estis riĉulo, kiu havis ĉarman filinon Pataĉara. Ŝiaj gepatroj tiel amis ŝin, ke ili tenis ŝin en la sepa etaĝo de la domo kaj ne permesis ŝin eliri.

Kiam Pataĉara estis deksesjara, ŝiaj gepatroj volis, ke ŝi edziniĝu al filo de alia riĉulo. Sed ŝi enamiĝis al sia servanto kaj deziris vivi kun li.

Do Pataĉara sin vestis kiel servanton kaj fuĝis el la etaĝdomo frumatene antaŭ la geedziĝa ceremonio. Ŝi renkontis sian amaton en certa loko kaj ili kune forkuris.

La paro iris al malproksima loko kaj geedziĝis. Post iom da tempo Pataĉara estis preta por akuŝo. "Ĉi tie neniu helpos min," ŝi diris al sia kara edzo, "sed la gepatroj ĉiam havas molan lokon en la koro por sia infano. Bonvolu konduki min al la hejmo de miaj gepatroj, por ke mi nasku nian infanon."

Sed ŝia edzo diris: "Kion vi diras, mia kara? Se viaj gepatroj vidos min, ili torturos min ĝismorte. Estas tute neeble por mi iri tien." Ŝi petegis lin multfoje, sed li rifuzis ĉiufoje.

Iutage, dum la foresto de la edzo, Pataĉara iris al siaj najbaroj kaj diris al ili: "Se mia edzo demandos al vi, kien mi iris, bonvolu informi lin, ke mi jam iris al miaj gepatroj." Kiam la edzo revenis hejmen, li trovis, ke la edzino jam foriris. Li kuratingis ŝin kaj petegis ŝin reveni hejmen, sed ŝi rifuzis. Ĝuste tiam okazis ŝiaj naskdoloroj kaj baldaŭ ŝi naskis filon. Ŝi pensis: "Nun ne plu necesas por mi iri al miaj gepatroj," do ŝi revenis hejmen kun la edzo.

Post iom da tempo ŝi estis naskonta la duan bebon. Ŝi forlasis la hejmon kaj ekiris al siaj gepatroj refoje dum la edzo laboris ekstere. La edzo kuratingis ŝin kaj petegis kiel antaŭe, ke ŝi revenu kun li, sed ŝi rifuzis.

Subite okazis terura ŝtormo. Pataĉara diris al la edzo: "Mi eksentis ne elteneblajn naskdolorojn, mia kara. Bonvolu trovi lokon por ŝirmi nin kontraŭ la pluvego."

La edzo iris tien kaj reen kun hakilo en la pluvego, kolektante branĉojn kaj foliojn por fari kabanon. Vidinte arbuston kreskantan sur formikejo, li tuj aliris por haki ĝin. Ĝuste tiam elrampis venena serpento kaj mordis lin je la mano. Li tuj perdis la vivon.

Dum Pataĉara atendis la edzon, pli kaj pli grandaj doloroj atakis ŝin, kaj baldaŭ ŝi naskis alian filon. Estante senforta, malvarma kaj malseka, ŝi povis fari nenion pli ol teni siajn infanojn en la sino kaj tranokti

laŭeble sintiriĝinte sur la tero por sin ŝirmi kontraŭ la pluvego. Ŝi ege maltrankviliĝis pri la edzo.

Kun la novnaskita bebo en la sino kaj la alia infano je la mano, Pataĉara ekiris frumatene laŭ la vojo, kiun prenis ŝia edzo, kaj eksteratende trovis lin morta. "Mia edzo mortis sur la vojo nur pro mi!" ŝi ekploregis.

Poste ŝi daŭrigis la iradon laŭ la vojo ĝis rivero Aciraŭati, kiu estis akvofluo de la ŝtormo. Ĉar ŝi malfortiĝis pro la nokta okazaĵo, ŝi ne havis sufiĉan forton por porti ambaŭ infanojn kune. Ŝi do lasis la pli grandan infanon sur la bordo kaj portis la pli junan tra la rivero. Poste, ŝi metis la bebon sur foliojn kaj revenis por la pli granda infano.

Apenaŭ ŝi atingis la rivermezon kiam aglo subite plonĝis de la ĉielo kaj forprenis la novnaskitan bebon. Vidinte tion, Pataĉara ekkriis plengorĝe: "Huŝ! Huŝ!" Kiam la pligranda infano aŭdis ŝian krion trans la rivero, ĝi pensis: "Panjo vokas min." Por proksimiĝi al ŝi, ĝi glitis de sur la bordo kaj fordrivis en la torento.

Nun Pataĉara ege malĝojis kaj senĉese ploregis dirante, "Unu el miaj filoj estis forportita de aglo, la alia dronis en la rivero, kaj ĉe la vojo mortis mia edzo." Ŝia ploro daŭris ĝis ŝi renkontis viron kaj demandis lin: "Sinjoro, kie vi vivas?"

"En Sravastio," li respondis.

"Vivas iu familio en iu strato de la urbo Sravastio. Ĉu vi konas ilin, sinjoro?"

"Jes, sinjorino, sed ne plu demandu pri tiu familio. Demandu min pri alia laŭ via scio."

"Sinjoro bonkora, mi nur konas tiun familion. Bonvolu informi min pri ili," ŝi petis.

"Se vi insistas, mi ne plu povas kaŝi la veron," respondis la viro, "En forta pluvo lastanokte, falis la domo de la familio kaj ĉiuj en la domo mortis pro la fatalaĵo."

"Ne!" ekkriis Pataĉara.

"Jes, ĉu vi povas vidi la fajron tie?" li demandis, montrante iom da flamo, "Jen ilia funebra fajro."

Tuj kiam Pataĉara aŭdis tion, ŝi falis sur la teron kaj sin rulis tien kaj reen pro malĝojo. Kelkaj vilaĝanoj alvenis kaj portis ŝin al Ĝetavana Monaĥejo, kie la Budho estis instruanta. La Budho petis kelkajn virinojn ŝin lavi, vesti, manĝigi kaj poste konsoli per la plej dolĉaj kaj orelplaĉaj vortoj. Kiam ŝi rekonsciiĝis, ŝi atingis rememoron pri siaj antaŭaj vivoj. Ŝi petis, ke la Budho ordinu ŝin, kaj tiel ŝi fariĝis monaĥino.

## 29. ANGULIMALO, LA BANDITO

La reĝo de Kosalo havis konsilanton nomatan Bagaŭo. Bagaŭo vivis kun siaj edzino Mantani kaj filo Ahinsako.

Kiam Ahinsako naskiĝis, ĉiuj armiloj de la lando glimbrilis. La reĝo maltrankviliĝis pri tio kaj venigis sian konsilanton en la sekva mateno por trovi la kaŭzon, kial la armiloj glimbrilis. La konsilanto respondis: "Mia edzino naskis filon, Via Reĝa Moŝto."

"Sed kial la armiloj tiel glimis?" demandis la reĝo.

"Mia filo estos bandito, Via Reĝa Moŝto."

"Ĉu li prirabos sola aŭ kun bando?" demandis la reĝo.

"Li agos sola, Via Reĝa Moŝto."

"Do ni devas tuj mortigi lin," diris la reĝo.

"Ne!" ekkriis Bagaŭo, "kiam li estos sola, ni povos kapti lin facile."

Kiam Ahinsako sufiĉe kreskis, lia patro sendis lin al lernejo en Takasilo. Ahinsako estis la knabo plej forta, saĝa kaj obeema en la tuta lernejo. Aliaj infanoj enviis lin, kaj kaŭzis malamon de la instruisto al li. Tiel, kiam li finis sian lernadon, la instruisto diris: "Nun vi devas pagi kotizon por mia instruado."

"Kiom mi devas pagi, sinjoro?" demandis Ahinsako.

"Anstataŭ monon, mi volas mil fingrojn de homaj dekstraj manoj. Sed memoru, ke vi ne prenu pli ol unu fingron de ĉiu homo."

Kvankam tio estas la plej malfacila tasko, Ahinsako promesis al sia instruisto plenumi tion. Li do iris ĝis Kosalo prenante glavon.

Sin kaŝinte ĉe ĝangala vojo, li atendis pasaĝerojn preterpasantaj. Vidinte homojn, li tuj elkuris, mortigis ilin, trancis fingron de iliaj dekstraj manoj kaj pendigis la kadavrojn sur arbojn por bredi vulturojn kaj korvojn. Li faris girlandon el fingraj ostoj kaj baldaŭ famiĝis kiel "Agulimalo", kiu signifas girlandon de fingroj.

Angulimalo iris al alia regno kaj denove komencis la mortigon. La reĝo de Kosalo decidis gvidi fortan armeon por kapti lin ĉar li mortigis tre multajn homojn. Kiam Mantani aŭdis tion, ŝi iris al la edzo, por ke li savu la filon.

"Mia kara, li estas tre feroca nun," diris Bagaŭo. "Eble li povus tute ŝanĝi sian konduton poste, sed li eĉ mortigus min se nun mi irus tien." Sed la patrino estis tre bonkora kaj multe amis sian filon pli ol sian vivon. Ŝi pensis, "Mi devas iri al la ĝangalo por savi lin."

Nun Angulimalo jam mortigis 999 homojn. Li pasigis monaton post monato en la ĝangalo sen sufiĉaj manĝaĵo, dormo kaj konsolo, do li malpacienciĝis pri pago al la ŝuldo kaj reveno al normala vivo. Li pensis, "Hodiaŭ mi mortigus eĉ mian patrinon kaj tranĉus ŝian fingron por kompletigi mil fingrojn se ŝi venus al mi."

Tiutage, kiam la Budho rigardis tra la tuta mondo por vidi, ĉu iu bezonas helpon, li vidis Angulimalon kaj lian patrinon. "Mi devas savi ilin," li pensis kiam li ekiris al la ĝangalo.

Vidinte la Budhon, la vilaĝanoj kriis, " Ne iru laŭ tiu vojo, Sinjoro! Ege danĝere! Tuj revenu hejmen!" Ili atentigis lin trifoje, sed la Budho daŭrigis la iradon pensante pri la farinda afero.

Nun la patrino de Angulimalo jam iris en la ĝangalon. Vidinte ŝian alvenon, Angulimalo pensis: "Kompatinda virino. Ŝi venas sola. Mi kompatas ŝin, tamen tio neniel helpas. Mi devas teni mian promeson kaj mortigi ŝin." La Budho subite aperis inter ili. Angulimalo pensis, "Bonege! Tiu ĉi monaĥo venas antaŭ mia patrino. Kiel mi rajtas mortigi ŝin? Mi forlasu ŝin kaj mortigu la fremdulon." Do li ekkuris al la Budho kun glavo en la mano. La Budho iris malrapide antaŭ li, pensante: "Lasu la junulon vidi min kuradi." Do Angulimalo kuregis al la Budho, sed neniel povis atingi lin. Li kriis al la Budho: "Haltu! Kaj staru senmove!"

"Mi staras senmove, Angulimalo! Ĉu vi ankaŭ staras senmove?" diris la Budho.

Angulimalo ne povis kompreni, kion signifas la Budho, do li demandis: "Kiel vi povas diri, ke vi staras senmove, dum vi kuras pli rapide ol mi?"

"Mi ĉiam staras senmove, Angulimalo, ĉar mi estas kompatema al ĉiuj vivestaĵoj. Sed vi estas kruela al vivestaĵoj. Do mi staras senmove dum vi ne."

Angulimalo ege plezuriĝis pro la diro de la Budho kaj tuj genuiĝis antaŭ li forĵetinte sian glavon. La Budho benis lin kaj kondukis lin al la monaĥejo, kie li fariĝis monaĥo.

Samtempe, la reĝo atendis kun sia armeo en la palaco por ricevi benon de la Budho antaŭ la ekiro al la ĝangalo. Ĉar la Budho ne venis, li iris al la monaĥejo kun kvincent paroj da ĉevaloj kaj soldatoj. La Budho demandis, "Kio okazas al vi, majesta Reĝo?"

"Aperis la plej feroca hombuĉisto Angulimalo, kaj mi iros kapti lin."

"Sed, majesta Reĝo, kion vi faros al Angulimalo se vi vidos, ke li jam havas razitan kapon kaj flavan robon?"

"Mi adoros al li," respondis la reĝo.

La Budho venigis Angulimalon, kaj la soldatoj ekkuris dise pro timo. Sed la Budho haltigis ilin kaj instruis la Darmon al ĉiuj el ili.

**Ekzerco 28 estas sur paĝo 103**

**Ekzerco 29 estas sur paĝo 103**

## 30. ŬAKALIO KAJ LA BUDHO

En Sravastio vivis junulo Ŭakalio, kiu admiris la belecon de la Budho. Iutage li pensis: "Restante hejme, mi ne povas vidi la Budhon, sed se mi fariĝos monaĥo, mi povos vidi lin ĉiutage." Do li iris al monaĥejo kaj ordiniĝis ĉe la Budho.

Ekde tiam, li havis oportunon por ĉiam admiri la aspekton de la Budho. Li faris nenion ĉiutage krom nur sekvi la Budhon kiel ombro. La Budho atendis la maturiĝon de Ŭakalio, kaj diris nenion pri tio. Sed anstataŭ legi, lerni kaj mediti, Ŭakalio nur admiris la Budhon. La Budho pensis: "Tiu monaĥo neniam atingos sian komprenon se li ne estos afliktita".

Do iutage la Budho akceptis inviton restadi en Raĝagaho dum tri pluvaj monatoj kaj forlasis Ŭakalion.

Ŭakalio tristiĝis kaj ekpensis: "Tri monatoj estas tempo tro longa. Kian mizeran tempon mi devas pasigi! Kian utilecon mi havas vivante pli longe? Mi min ĵetos de sur la Vultura Montpinto."

Restante en Raĝagaho, la Budho vidis per sia mensa rigardo, ke Ŭakalio pretos sin ĵeti de sur Vultura Montpinto. "Sen miaj helpo kaj konsolo, tiu monaĥo sin mortigos," li pensis. La Budho tuj elsendis sian transformiĝon sur la randon de la Vultura Montpinto, kaj la malĝojo de Ŭakalio tuj malaperis kiam li ekvidis la Budhon antaŭ si. La menso de Ŭakalio pleniĝis de ĝojo kaj li pensis, "La homo, kiu havas perfektan fidon en la Budho, pleniĝos de ĝojo kaj kontenteco. La homo, kiu havas perfektan fidon en la Budho, atingos staton de paco kaj feliĉo."

**Ekzerco 30 estas sur paĝo 103**

## 31. LA PURIGISTO SUNITO

En Sravastio vivis purigisto Sunito. Li laboris diligente, sed lia enspezo sufiĉis nur por plenigi lian stomakon. Li devis dormi ĉe la vojo pro manko de loĝejo. Li ofte vidis aliajn homojn amuziĝantaj, sed ne rajtis sin miksi en ilian rondon, ĉar tiuj homoj nomis lin forĵetito. Kiam iuj el superaj klasoj iris sur la vojo, Sunito devis tuj forkuri kaj sin kaŝi, por ke lia ombro ne tuŝu ilin. Se li forlasis ne sufiĉe rapide, li ricevis riproĉon kaj eĉ baton. Kompatinda Sunito havis ege mizeran vivon.

Iutage, kiam Sunito okupiĝis pri purigado de malpurega vojo, li vidis, ke la Budho alvenas kun miloj da sekvantoj. Li tuj pleniĝis de ĝojo kaj timo, sed povis trovi neniun lokon por sin kaŝi. Li do nur staris respektoplene kun siaj manplatoj kunmetitaj ĉe la brusto. La Budho haltis kaj diris al la kompatinda Sunito per dolĉa kaj ĝentila voĉo: "Mia kara amiko, ĉu vi volontas forlasi la laboron kaj sekvi min?"

Antaŭe, neniu parolis tiel amike al Sunito. Lia koro tuj pleniĝis de ĝojo kaj liaj okuloj malsekiĝis de larmoj. Li diris: "Plej honora Sinjoro! Mi ricevis ĉiam ordonojn, sed neniam afablajn vortojn. Se vi akceptos malpuran kaj mizeran purigiston kiel min, mi sekvos vin."

Do la Budho ordinis Suniton kaj ĉi lasta ricevis budhajn instruojn kune kun aliaj monaĥoj. Ekde tiam, neniu sciis, el kiu kasto devenis Sunito, kaj neniu traktis lin kun malŝato kaj krueleco. Lin respektis ĉiuj homoj, eĉ reĝoj, ministroj kaj generaloj.

**Ekzerco 31 estas sur paĝo 103**

## 32. LA BUDHO KAJ MALSANA MONAĤO

Iutage, la Budho vizitis monaĥejon kaj preterpasis ĉambron, en kiu kuŝis monaĥo suferanta de terura malsano. Kvankam la aliaj monaĥoj loĝis en la monaĥejo, tamen neniu el ili zorgis pri sia malsana frato. Vidinte la bedaŭrindan situacion, la Budho ekprizorgis la suferanton. Li alvenigis Anandon kaj ili kune banis la monaĥon, ŝanĝis lian malpuran litaĵon kaj mildigis lian doloron.

Poste la Budho deadmonis la monaĥojn de ilia senhelpemo kaj kuraĝigis ilin prizorgi malsanulojn kaj suferantojn. Li konkludis per diro: "Kiu ajn servas al malsanuloj kaj suferantoj, tiu servas simile al mi."

**Ekzerco 32 estas sur paĝo 104**

## 33. LA ĈIUTAGA RUTINO DE LA BUDHO

La ĉiutaga rutino de la Budho konsistis el kvin partoj: la matena aktivado, la posttagmeza aktivado, la frua periodo, la meza periodo kaj la lasta periodo.

La matena aktivado daŭris de la kvara matene ĝis la dekdua tagmeze.

La Budho ellitiĝis je la kvara matene, kaj tuj post kiam li sin lavis, li sidiĝis por mediti dum unu horo. De la kvina ĝis la sesa li rigardis tra la mondo per sia mensa rigardo por vidi, ĉu iu bezonas helpon. Je la sesa li surmetis sian robon kaj eliris por helpi la bezonantojn aŭ almozpeti manĝaĵon.

Dum almozpetado la Budho kutime iris de domo al domo kun rigardo fiksita al la tero, silente akceptante ĉiun manĝaĵon metitan en la bovlon. Fojfoje li iris kun siaj disĉiploj, kiuj sekvis lin en vico. Oni ofte invitis lin al sia domo por manĝi, kaj li kutime faris predikadon al ili kaj siaj sekvantoj.

La posttagmeza aktivado daŭris de la dekdua tagmeze ĝis la sesa posttagmeze.

La monaĥoj kutime iris al la Budho posttagmeze por fari demandojn kaj ricevi instruon kaj konsilojn. Poste la Budho kutime retiriĝis en sian ĉambron kaj rigardis la tutan mondon per sia mensa rigardo por vidi, ĉu iu bezonas lian helpon. Li instruis ilin en la maniero, ke ĉiu trovas la Budhon speciale instruanta al tiu per la metodo doni ĝojon al saĝuloj, pliigi saĝon al ordinaruloj kaj forigi nescion de malsaĝuloj.

La frua periodo daŭris de la sesa posttagmeze ĝis la deka posttagmeze.

En la frua periodo la sekvantoj kutime iris al la Budho aŭskulti lin aŭ fari demandojn al li por solvi siajn dubojn.

La meza periodo daŭris de la deka posttagmeze ĝis la dua frumatene.

En la meza periodo la ĉielanoj kutime kaptis ŝancon por viziti la Budhon kaj lerni pri la Vero de la vivo. La Budho pasigis la mezan periodon en la nokto respondante iliajn demandojn.

La lasta periodo daŭris de la dua matene ĝis la kvara.

La Budho kutime iris tien kaj reen por unu horo meditante aŭ sin vigligante el malkomforteco de la tuttaga sidado. Poste li dormis por unu horo. Tiel ni povas vidi, ke la Budho okupiĝis la tutan tagon. Fakte li nur dormis unu horon ĉiutage dum la 45 jaroj de la instruado. En la fruaj horoj de la tago li rigardis la tutan universon, kaj benis kaj feliĉigis milionojn da vivestaĵoj per sia senlima amo.

## 34. LA MONAĤIĜO DE JAŜO

Kiam la Budho restis ĉe Cerva Parko en Benareso, riĉa junulo nomata Jaŝo venis vidi lin. Jaŝo aŭskultis la instruon de la Budho kaj tiel absorbiĝis en la instruo, ke li tuj fariĝis monaĥo.

Vespere, maljunulo venis al la Budho kaj diris, ke lia filo forlasis hejmon matene kun diro, ke li vizitos la Budhon sed ne plu revenis. Ambaŭ li kaj lia edzino maltrankviliĝis opiniante, ke eble la filo estis mortigita de rabistoj. La Budho diris al la patro, ke li ne maltrankviliĝu pri tio kaj lia filo jam fariĝis monaĥo. Poste la Budho eksplikis siajn instruojn al la patro de Jaŝo, kaj tiu ankaŭ fariĝis lia sekvanto.

Jaŝo havis 54 amikojn. Ili venis al la Budho por aŭskulti liajn instruojn kaj ankaŭ fariĝis monaĥoj. Tiel en mallonga tempo aperis 60 sekvantoj de la Budho.

**Ekzerco 33 estas sur paĝo 104**

**Ekzerco 34 estas sur paĝo 104**

## 35. LA PATRONO REĜO BIMBISARO

Reĝo Bimbisaro iam proponis duonon de sia regno al la asketo Gotamo, sed la lasta fordankis ĉar li volis klopodi por iluminiĝo. Poste Reĝo Bimbisaro petis promeson de Gotamo reveni al Raĝagaho por ilumini lin post la atingo de iluminiĝo.

Gotamo iluminiĝis kaj fariĝis la Budho, sed li ne forgesis la promeson reveni al Raĝagaho. Li decidis viziti Raĝagahon kun granda nombro da disĉiploj. Lia famo kiel religia instruisto cirkulis en la urbo kaj ankaŭ atingis la orelojn de Reĝo Bimbisaro.

Aŭdinte, ke la Budho jam atingis la urban pordon, la reĝo eliris kun multaj korteganoj por bonvenigi lin kaj liajn disĉiplojn. La reĝo proksimiĝis al la Budho kaj esprimis sian estimon, sed iuj el la korteganoj ne sciis bone, al kiu el la Budho kaj Kasapo ili devas esprimi sian estimon. Ili konfuziĝis, ĉu la Budho havas sanktan vivon sub Kasapo aŭ inverse, ĉar ambaŭ estis ege respektindaj religiaj instruistoj.

La Budho vidis iliajn pensojn kaj demandis la respektindan Kasapon, kial li rezignis sian adoradon de la fajro. Kompreninte la motivon de la demando, la respektinda Kasapo eksplikis, ke li preferas la pacan staton de nirvano al la senutilaj sensaj plezuroj. Post tio, li genuiĝis ĉe la piedoj de la Budho kaj diris: "Mia instruisto, la Sinjoro, estas Sanktulo. Mi estas lia disĉiplo."

La piaj homoj ekĝojis aŭdinte la konversacion. La Budho predikis pri la Darmo kaj Reĝo Bimbisaro atingis la unuan ŝtupon de sankteco kaj fariĝis sotapano, sanktulo en la unua ŝtupo. Kompreninte la doktrinon, Reĝo Bimbisaro diris al la Budho: "Estimata Sinjoro, antaŭe, kiam mi estis reĝido, mi havis kvin dezirojn. Nun ili ĉiuj realiĝis. La unua deziro estis fariĝi reĝo. La dua deziro estis, ke iluminiĝinto vizitu mian landon. La tria deziro estis, ke mi konatiĝu kun iluminiĝinto. La kvara deziro estis, ke li prediku la doktrinon al mi. La kvina deziro estis, ke mi povos kompreni la doktrinon. Nun tute realiĝis ĉiuj kvin deziroj."

Pro sia dankemo por la spirita donaco fare de la Budho, Reĝo Bimbisaro donacis parkon kun kvieta bambuaro al la Budho kaj liaj disĉiploj. La parko estis nomita Bambuaro. La Budho restis tie dum tri sinsekvaj pluvsezonoj kaj aliaj tri pluvsezonoj poste.

Aŭdinte la Darmon, la reĝo fariĝis reganto bona kaj pia, sed poste, li mortis mizere kaj antaŭtempe pro sia estinta malbona karmo kaj la malbona konduto de sia filo.

**EKZERCO 35 ESTAS SUR PAĜO 104**

## 36. VISAKA, GRANDA SUBTENANTINO DE BUDHISMO

Visaka estis pia kaj malavara filino de milionulo. La Budho vizitis ŝian hejmlokon kiam ŝi estis nur sep-jara. Aŭdinte la viziton de la Budho, ŝia avo ordonis ŝin eliri por bonvenigi lin. Kvankam ŝi estis infano, ŝi estis pia kaj virta. Do tuj aŭdinte la Budhan Darmon, ŝi atingis la unuan ŝtupon de sankteco.

Kiam ŝi estis dekkvin-jara, kelkaj bramanoj vidis ŝin kaj pensis, ke ŝi estos ideala edzino por ilia mastro Punavadano, la filo de milionulo nomata Migaro. Visaka posedis kvin virinajn belecojn: juneco, belaj haroj, bela haŭto glata kaj ora, bela figuro kaj bela oststrukturo. Do ili edzinigis ŝin al Punavadano.

En la tago de ŝia edziniĝo, ŝia saĝa patro donis al ŝi dek konsilojn:

1. Edzino nek rajtas kritiki siajn bogepatrojn kaj edzon publike nek rajtas diskonigi iliajn mankojn aŭ familiajn kverelojn ekstere.

2. Edzino ne rajtas aŭskulti rakontojn aŭ onidirojn pri aliaj familioj.

3. Ŝi rajtas pruntedoni objektojn al tiuj, kiuj redonos ilin.

4. Ŝi ne rajtas pruntedoni objektojn al tiuj, kiuj ne redonos ilin.

5. Ŝi devas helpi malriĉajn parencojn kaj amikojn eĉ se ili ne povos rekompenci ŝin.

6. Edzino devas sidi gracie. Vidinte siajn bogepatrojn aŭ edzon, ŝi devas stariĝi de sur la sidejo por montri sian respekton al ili.

7. Antaŭ la manĝo, edzino devas unue certiĝi, ke ŝiaj bogepatroj kaj edzo jam havas manĝaĵon, kaj ke iliaj servistoj estas bone prizorgitaj.

8. Antaŭ la enlitiĝo, edzino devas esti certa, ke ĉiuj pordoj jam fermiĝis, mebloj estis sekurigitaj, servistoj jam plenumis sian devon kaj la bogepatroj jam ripozis. Edzino devas kutime ellitiĝi frue en la mateno se ŝi ne estas malsana. Ŝi ne rajtas dormi dum la tago.

9. Ŝi devas prizorgi siajn bogepatrojn kaj edzon tiel bone kiel fajron.

10. Ŝi devas respekti siajn bogepatrojn kaj edzon kiel ĉielanojn.

Ekde kiam Visaka atingis Sravastion, la urbo de sia edzo, ŝi restis bonkora kaj malavara al ĉiuj en la urbo, kaj ankaŭ ĉiuj homoj amis ŝin.

Iutage, dum ŝia bopatro estis manĝanta dolĉan rizkaĉon el ora bovlo, monaĥo eniris la domon por peti almozon. Kvankam la bopatro vidis la monaĥon, li daŭre manĝis kvazaŭ li tute ne vidus lin. Visaka ĝentile diris al la monaĥo: "Bonvolu iri al alia domo, estimata sinjoro. Mia bopatro manĝas putran manĝaĵon."

La bopatro de Visaka malŝatis ŝin delonge ĉar ŝi estis pia sekvantino de la Budho kaj subtenis Budhismon, sed li kontraŭe. Li ĉiam volis trovi ŝancon por rompi la geedzecon inter sia filo kaj Visaka kvankam ŝia konduto estis tute senmakula. Nun li trovis la ŝancon. Kun miskompreno pri ŝiaj vortoj, li pensis, ke ŝi humiligis lian familion.

Li ordonis, ke oni forpelu Visakan el la domo, sed ŝi atentigis lin pri la postulo de sia patro al la ok samgentanoj. Ŝia patro iam diris al ili: "Se mia filino havas iun ajn kulpon, faru enketon pri tio."

La milionulo konsentis pri ŝia postulo kaj kunvenigis la ok samgentanojn por enketi, ĉu Visaka kulpis pri krudeco. Kiam ili alvenis, li ŝtele diris al ili: "Trovu ŝian pekon el tiu ĉi konduto kaj forpelu ŝin el la familio."

Visaka pruvis sian senkulpecon per eksplikado: "Sinjoroj, kiam mia bopatro ignoris la monaĥon kaj daŭre manĝis sian kaĉon el lakto kaj rizo, li faris neniun meriton en sia nuna vivo. Li nur ĝuis la meritojn de siaj antaŭaj kondutoj. Ĉu tio ne similas al manĝado de putra manĝaĵo?"

Ŝia bopatro povis fari nenion alian ol konsenti, ke ŝi ne estas kulpa pri krudeco.

Estiĝis aliaj miskomprenoj post tio, sed Visaka povis ekspliki je la kontenteco de la bopatro. Post tiuj okazaĵoj, ŝia bopatro konsciis sian eraron kaj rimarkis la grandan saĝon de Visaka. Li invitis la Budhon al sia domo laŭ ŝia propono por peti instruojn. Aŭdinte la predikon de la Budho, li fariĝis sotapano, kiu estas la unua ŝtupo de sankteco.

Kun saĝo kaj pacienco ŝi sukcese konvertis la edzan familion en feliĉan budhisman familion. Visaka estis ankoraŭ tre oferema kaj helpema al monaĥoj. Ŝi konstruigis Pubaraman Monaĥejon por monaĥoj per granda elspezo. Ŝi tre ĝojis kiam la Budho pasigis ses pluvajn sezonojn tie.

En unu el la predikadoj al Visaka, la Budho parolis pri la ok virinaj kvalitoj kondukantaj al riĉiĝo kaj feliĉo en tiu ĉi vivo kaj la sekvaj. Li diris: "Visaka, tio estas, ke virino bone faru sian laboron, administru servantojn, respektu sian edzon kaj gardu lian havaĵon. Tio estas, ke virino havu virtecon (sila), bonfaremon (caga), saĝon (panna) kaj kredon (saddha) je la Budho, Darmo kaj Samgo."

Kiel talenta virino, Visaka ludis gravan rolon en diversaj aktivadoj kun la Budho kaj ties sekvantoj. La Budho donis al ŝi specialan rajton por solvi disputojn inter la monaĥinoj. Kiam oni invitis ŝin por solvi la problemojn de kverelado, kelkaj disciplinaj reguloj estis estigitaj por monaĥinoj.

Visaka forpasis nature en la aĝo de cent dudek jaroj.

**Ekzerco 36 estas sur paĝo 105**

## 37. DEVADATO MALAMIKA AL LA BUDHO

Devadato estis filo de Reĝo Supabudo kaj ties edzino Pamita, kiu estis onklino de la Budho. Fratino de Devadato estis Jasodara, do li estis kuzo kaj samtempe bofrato de la Budho. Kune kun Anando kaj aliaj ŝakjaj reĝidoj, li aliĝis al la monaĥa komunumo administrata de la Budho en la frua periodo, sed atingis nenian sanktecon, tiel li eklaboregis por supernaturaj povoj en la mondo.

En la frua periodo li estis bona monaĥo fama pro siaj gracieco kaj supernaturaj povoj. Poste li fariĝis tro fiera pri siaj famo kaj povo. Pliintensiĝis liaj ĵaluzo kaj malbona deziro kontraŭ la Budho kaj li malamegis la Budhon.

Iutage en granda kunveno, kiun ĉeestis reĝoj kaj princoj, Devadato iris al la Budho kaj petis, ke la lasta faru lin gvidanto de la monaĥa komunumo. La Budho rifuzis lian postulon ĉar li ne estis kapabla kaj sufiĉe taŭga por tio. Devadato ege koleriĝis kaj ĵuris sin venĝi kontraŭ la Budho.

Kvankam Devadato estis malbona monaĥo, li havis multajn adorantojn kaj sekvantojn. Unu el liaj ĉefaj subtenantoj estis Reĝo Aĝatasato, kun kiu li diskutis pri siaj kolero kaj intrigo por sin venĝi. Ili kune planis mortigi Reĝon Bimbisaro, la patro kaj rivalo de Aĝatasato, kaj la Budhon, la malamiko de Devadato. Aĝatasato sukcese mortigis sian patron, sed Devadato malsukcesis tion fari al la Budho.

La unua provo de Devadato por mortigi la Budhon estis, ke li dungis viron por tion fari. Lia plano estis, ke post la sukceso, la viro estos mortigita de aliaj du viroj, kiuj sinsekve estos mortigitaj de aliaj kvar viroj. Poste la kvar viroj estos mortigitaj de aliaj ok viroj. Sed la unua viro ektimis pri sia ago kiam li proksimiĝis al la Budho. Li demetis siajn armilojn kaj konvertiĝis al la Budho. Fine, ĉiuj viroj dungitaj por mortigi unu alian fariĝis disĉiploj de la Budho, kaj fiaskis la ruza plano de Devadato.

Poste Devadato provis mortigi la Budhon per propra mano. Kiam la Budho iris preter Vultura Monto, Devadato grimpis sur la montpinton kaj puŝe faligis grandan ŝtonon al la Budho. Ruliĝante malsupren, la granda ŝtono frapiĝis kontraŭ alia roko, kaj disiĝinta peceto vundis la Budhon je la piedo. Tio kaŭzis lian sangfluon. La Budho suprenrigardis, vidis Devadaton, kaj diris kun kompatemo: "Malsaĝulo, vi jam faris multe da malbonaj kondutoj por mortigi la Budhon."

La tria provo de Devadato por mortigi la Budhon estis, ke li ebriigis per alkoholaĵo la ferocan hommortigan elefanton nomatan Nalagirio. Kiam Nalagirio vidis la Budhon alvenanta de malproksime, ĝi sin ĵetis por ataki

lin kun siaj levitaj oreloj, vosto kaj rostro. Kiam proksimiĝis la elefanto, la Budho koncentris sian amon al la elefanto. La amo de la Budho estis tiel vasta kaj profunda, ke la elefanto haltis, kvietiĝis kaj staris senmove post kiam ĝi proksimiĝis al li. La Budho karesis la rostron de la elefanto, kaj parolis al ĝi ĝentile. La elefanto respekte formovis la polvon de sur la piedoj de la Budho per sia rostro, kaj metis la polvon sur sian propran kapon. Poste ĝi retiriĝis kun la kapo al la Budho ĝis la elefantejo kaj fariĝis tute milda. Oni kutime dresis elefantojn per vipoj kaj armiloj, sed la Honorulo tion faris per sia amo.

Ankoraŭ dezirante fariĝi gvidanto de la monaĥa komunumo, Devadato provis alian insidan planon. Kun helpo de kvincent misgviditaj monaĥoj, li planis disigi la monaĥan komunumon.

Li postulis, ke la Budho devigu al la monaĥoj observi jenajn kvin aldonajn regulojn:

1. Vivi en la arbaro dum la tuta vivo.

2. Teni la vivon nur per almozpeto.

3. Sin vesti per roboj faritaj el ĉifonaĵoj kolektitaj el rubejoj kaj tombejoj.

4. Vivi sub la arboj.

5. Abstini de manĝado de fiŝoj kaj viando dum la tuta vivo.

Devadato faris tiun ĉi postulon, bone sciante, ke la Budho rifuzos ĝin. Devadato ĝojis, ke la Budho ne aprobis la kvin regulojn, kaj li uzis tion por kolekti subtenantojn kaj sekvantojn. Novaj monaĥoj, kiuj ne bone sciis la Darmon, forlasis la Budhon kaj prenis Devadaton kiel sian gvidanton. Fine post kiam estimataj Ŝariputo kaj Mogalano eksplikis la Darmon al ili, ili revenis al la Budho.

Post tio, malbona tempo trafis Devadaton. Li grave malsaniĝis je la malsukceso de liaj planoj, tamen antaŭ la morto li sincere pentis pri siaj malbonaj kondutoj, kaj volis vidi la Budhon. Sed la fruktoj de lia malbona karmo jam maturiĝis kaj malhelpis lin de tio. Lia malsano graviĝis ĉe la pordo de Ĝetavana Monaĥejo sur lia vojo al la Budho, sed li konvertiĝis al la Budho antaŭ ol li mortis.

Kvankam li suferis en mizera stato pro siaj krimoj, lia sankta monaĥa vivo en la frua periodo rezultis, ke li fariĝos Paceka Budho nomata Atisaro en la malproksima estonteco. Kiel Paceka Budho li povos atingi iluminiĝon per siaj propraj klopodoj.

**Ekzerco 37 estas sur paĝo 105**

## 38. LA BUDHO KAJ REĜINO KEMA

La Budho komisiis por la monaĥa komunumo du ĉefajn disĉiplojn, kiuj estis estimataj Ŝariputo kaj Mogalano. Li ankaŭ komisiis du ĉefajn disĉiplinojn por la monaĥina komunumo. Ili estis estimataj Kema kaj Upalavana.

Kema estis unu el la belaj reĝinoj de Reĝo Bimbisaro. La budhaniĝo de Kema estis unu el la raraj okazoj, ke la Budho ŝanĝis la menson de aliuloj per sia magia povo. Antaŭe la Budho neniam uzis sian povon por regi la menson de aliuloj, sed nur por veki ilian komprenon kaj estigi ilian saĝon.

Kema estis tiel bela kiel plena luno reflektita en trankvila lago je la noktmezo. Ŝiaj vangoj estis glataj kiel lotusaj petaloj kaj ŝiaj okuloj brilis kiel gemoj. Ŝi tute ne volis vidi la Budhon ĉar ŝi aŭdis, ke li neniam parolis pri la korpa beleco.

En malvarmeta kaj briza mateno, Kema decidis viziti la monaĥejon, kiun Reĝo Bimbisaro konstruigis por la Budho en la Bambuaro. Sciuroj sin amuzis en la fruktoplenaj arboj, kiuj sternis siajn ombrojn sur la herbejo. La lageto estis kovrita de akvolilioj kaj delikata aromo de jasmeno plenigis la aeron.

Keman tuj altiris profunda kaj klara voĉo venanta el la predikejo. Ĝi similis nenion, kion ŝi aŭdis antaŭe. Ĝi estis pli bela ol birdaj kantoj je la mateniĝo. La voĉo estis varma, komfortiga kaj plena de amo kaj prizorgemo. Ĝiaj vortoj estis tiuj de saĝo.

Kiel abelo al aroma floro, Kema sin movis al la halo, kie la Budho estis predikanta. Ŝi kovris sian vizaĝon per la skarpo kaj sidiĝis en la malantaŭo de la halo, por ke la Budho ne rekonu ŝin. Ŝi tute ne imagis, ke la Budho scias bone, kiu ŝi estas kaj pri kio ŝi pensas.

Per sia magia povo la Budho kreis figuron de la plej bela knabino ĉirkaŭ dekses-jara staranta ĉe li kaj ventumanta lin. Kema raviĝis pro la beleco de la knabino kaj fiksis sian rigardon al ŝi.

"Jen, rigardu ŝian belan nazon, ŝian buŝon, ŝiajn brakojn kaj fingrojn," pensis Kema, "Kaj kun sia perfekta aspekto ŝi similas al pompe disfloranta floro en printempo. Ŝi estas multe pli bela ol ĉiuj, kiujn mi vidis antaŭe, kaj eĉ multe pli bela ol mi mem."

Post nur momento Kema pensis, ke ŝiaj okuloj mistifikis ŝin. Ĉu ŝi vidis la junan knabinon maljuniĝanta? Jes. Kaj la beleco forlasis la belulinon. Ŝia vizaĝo ŝrumpiĝis. La rideto sur ŝiaj lipoj similaj al lotuspetaloj ŝanĝiĝis en sendentan grimacon. Ŝiaj haroj griziĝis kaj poste

blankiĝis. La sveltaj kaj fortaj kruroj maldikiĝis kaj malfortiĝis, kaj ŝi falis sur la plankon. La juna knabino ŝanĝiĝis en okdek-jaran maljunulinon.

Kema vidis, ke tiu ĉi maljunulino mortis kaj putris ĝis ŝiaj ostoj fariĝis polvo. Ŝi komprenis, ke simile al la aminda figuro, iutage ankaŭ ŝi mem maljuniĝos kaj mortos. Ŝia vanteco de korpa beleco tute forlasis ŝin kaj ŝi subite komprenis la efemerecon de la fizika korpo kaj homa vivo.

Ŝi fariĝis arahanto kaj iris en la monaĥinan komunumon konsentite de Reĝo Bimbisaro. Ŝi famiĝis en la monaĥina komunumo pro sia interna scio.

**Ekzerco 38 estas sur paĝo 106**

## 39. LA BUDHO KAJ MILIONULO

Milionulo Anatapindiko havis nomon Sadario, sed pro lia granda malavareco oni nomis lin Anatapindiko, kiu signifas helpemulon al bezonantoj.

Anatapindiko volis aĉeti parkon grandan kaj belan por la Budho, sed ĝi apartenis al Reĝido Ĝeto, kiu ne volis vendi ĝin. Li finfine sukcesis akiri ĝin de la reĝido per tiom da mono, ke li kovris la tutan spacon de la parko per ormoneroj. Li konstruigis la faman Ĝetavanan Monaĥejon, en kiu la Budho pasigis multajn pluvsezonojn. La Budho pasigis plejparton de sia vivo en tiuj kvietaj cirkonstancoj kaj faris plej multajn predikadojn tie. Finfine, la Budho pasigis dudek kvar pluvsezonojn en Ĝetavana Monaĥejo.

La Budho faris al li kelkajn predikadojn kun intenco fari tion por laikaj homoj. Du el la predikadoj estis pri malavareco kaj kvar feliĉoj. En la predikado pri malavareco, la Budho diris, ke la unua ŝtupo de la Budhiĝo estas praktikado de malavareco kiaj almozdono al monaĥoj kaj kostruado de monaĥejoj. La afero pli grava ol malavareco estas rifuĝo en la Tri Juveloj, kiuj estas la Budho, Darmo kaj Samgo, kaj observado al la Kvin Maksimoj, kiuj estas la kvin reguloj helpantaj al homoj disciplini siajn parolojn kaj kondutojn. La afero pli grava ol observado de la Kvin Maksimoj estas konstanta praktikado de meditado pri bonkoreco. Sed la plej meritoplena konduto laŭ la Budho estas disvolvi enrigardon en la efemeran naturon de ĉiuj aferoj.

En la predikado pri la kvar feliĉoj haveblaj por ordinaraj homoj, la Budho menciis la feliĉojn pri posedo, riĉaĵo, senŝuldo kaj senkulpo.

La feliĉo pri posedo signifas homan kontentecon pri gajno de riĉaĵo per honestaj metodoj kaj diligenta laborado. La feliĉo pri riĉaĵo estas homa kontenteco en elspezo de la propra riĉaĵo dum la devoplenumado.

La feliĉo pri senŝuldo estas homa kontenteco, kiun homo ĝuas kiam li scias bone, ke li havas nenian ŝuldon grandan aŭ malgrandan al aliaj.

La feliĉo pri senkulpo estas kontenteco de homo, kies kondutoj korpa, parola kaj pensa ne kaŭzis malutilon al aliaj, kaj kiu estas libera de ĉiuj kulpoj.

Kiam Anatapindiko unuafoje renkontis la Budhon ĉe arbaro Sitavano proksima al Raĝagaho, lia fido al la Budho estis tiel forta, ke aŭroro aperis el lia korpo. Aŭdinte la Darmon unuafoje Anatapindiko fariĝis sotapano, kiu estas la unua ŝtupo de sankteco.

**Ekzerco 39 estas sur paĝo 106**

## 40. LA BUDHO KAJ FARMISTO

Iam la Budho estis en la vilaĝo Ekanalo en Magadho. Pluvis kaj estis tempo por semado. Kiam la folioj ankoraŭ estis malsekaj pro roso en la frua mateno, la Budho iris al la kampo, kie laboris bramano kaj farmisto Kasibaradvaĝo kun laborantoj de kvincent plugiloj. La Budho atingis je la tempo kiam la bramano disdonis manĝaĵojn al siaj laborantoj. La Budho atendis, ke iu donos al li manĝaĵon. Sed kiam la bramano vidis la Budhon, li mokis lin kaj diris: "Mi plugas kaj semas, kaj jam plugis kaj semis, do mi manĝas. Asketo, vi ankaŭ devis kaj devas plugi kaj semi por manĝi."

"Bramano, ankaŭ mi plugas kaj semas," respondis la Budho. "kaj mi jam plugis kaj semis, do mi manĝas."

La konfuzita bramano diris: "Vi asertis, ke vi plugas kaj semas, sed mi neniam vidis vin pluganta."

La Budho respondis: "Mi semas kredon kiel semojn. Mia disciplino estas la pluvo. Mia saĝo estas la jugo kaj plugilo. Mia modesteco estas la koltro. La menso estas la ŝnuro. Atentemo estas la soko kaj vipo. Mi estas sindetenema en miaj kondutoj, paroloj kaj manĝaĵoj. Mi semis kun vereco. La feliĉo gajnita de mi estas liberiĝo el suferado. Kun persisteco mi portis mian jugon ĝis la atingo de nirvano. Mi jam tiel plugadis. La laboro donis rikolton de senmorteco. Tiel plugante oni fuĝas el ĉiuj suferoj."

Aŭdinte la klarigon de la Budho, la bramano konsciis sian eraron kaj diris: "Bonvolu manĝi laktan rizon, Estimata Gotamo! La estimata Gotamo estas vera farmisto ĉar liaj plantaĵoj donos frukton de senmorteco!" Dirante, la bramano plenigis grandan bovlon per lakta rizo kaj oferis ĝin al la Budho.

La Budho rifuzis la manĝaĵon, dirante, ke li ne akceptas manĝaĵon interŝanĝitan per siaj instruoj.

La bramano genuiĝis ĉe la piedoj de la Budho kaj petis, ke tiu ordinu lin kiel monaĥon. Post nelonge, Kasibaradvaĝo fariĝis arahanto.

**Ekzerco 40 estas sur paĝo 106**

## 41. RANKORO DE MAGANDIĜA

Magandiĝa estis knabino tiel ĉarma, ke multaj riĉuloj deziris edziĝi al ŝi. Ŝiaj bramanaj gepatroj ĉiam rifuzis svatadojn, trovinte neniun svataton taŭga por ŝi. Eĉ se ŝiaj gepatroj trovis konvenan viron por la filino, la filino ne konsentis, dirante, ke ŝi edziniĝos al neniu krom reĝo. Magandiĝa deziris bonan edziniĝon per sia ĉarmo.

Iutage, kiam la Budho vivis en la mondo, li rimarkis, ke la gepatroj de Magandiĝa estas sufiĉe disvolvitaj spirite. Ili nur bezonis lian helpon por malfermi siajn okulojn al la Vero. La Budho iris al la loko, kie la bramano plenumis fajran oferadon ekster la vilaĝo.

Kiam la patro de Magandiĝa vidis la alvenon de la Budho, li estis tuj absorbita de liaj beleco, trankvileco kaj gracia maniero. La bramano pensis, ke estas neniu viro pli bona por edziĝi al lia filino. "Ne foriru, monaĥo," li kriis ekscitite. "Atendu ĉi tie ĝis mi venigos mian filinon por vidi vin. Vi estas la ideala vivkunulo por ŝi, kaj ankaŭ ŝi estas tute konvena al vi."

La Budho diris nenion kaj restis silenta. Anstataŭ atendi, li lasis sian piedsignon sur la teron kaj foriris. La bramano hastis hejmen kun plezuro pri la okazonta afero en la imago kaj diris al la edzino: "Tuj beligu nian filinon, mia kara. Mi vidis viron tute konvenan al ŝi." Kiam ili tri hastis al la loko, la Budho jam ne plu vidiĝis, kaj ili nur povis vidi la piedsignon, kiun li lasis sur la tero.

La edzino bone konis signojn. Ŝi pririgardis la signon kaj diris: "Mi ne opinias, ke tiu, kiu lasis la signon, povos edziĝi al nia filino. Ĝi apartenas al homo, kiu jam rezignis la mondajn plezurojn."

"Jen denove pri viaj signaĉoj," grumblis la bramano, "kaj vi eĉ povas vidi krokodilojn en akva kaveto kaj rabistojn en la mezo de la domo. Jen li sidas tie sub la arbo. Ĉu vi iam vidis tiel belan viron, mia kara? Venu, mia filino. Ĉifoje via edziĝonto estas tiel perfekta, ke vi ne plu povos plendi."

La familio hastis al la Budho kaj la patro vokis lin: "Monaĥo, mi edzinigos mian filinon al vi." La Budho rifuzis la proponon, klarigante, ke li jam rezignis ĉiujn mondajn plezurojn. Li diris al ili, kiel li sin detenis eĉ de la allogo farita de la filinoj de Marao. Li diris, ke homa korpo estas plena de malpuraĵoj kiel ajn bela ĝi estas.

Aŭdinte tion, la bramano kaj lia edzino tuj komprenis, ke homa vivo en la mondo estas mizera kaj ne alkroĉiĝinda kiel ajn ĝi ŝajnas.Ili ambaŭ atingis aganamon, kiu estas la tria ŝtupo de sankteco.

Malfeliĉe, la aroganta Magandiĝa, kiu ankoraŭ ne estis spirite disvolviĝinta, ne kapablis kompreni la veran signifon de tiuj vortoj. Ŝi

opiniis, ke la Budho insultis ŝin pro ŝia beleco. "Kiel tiu ĉi monaĥo kuraĝas insulti min kiam tiel multaj viroj dronas en mia beleco eĉ je la unua vido! Eĉ se li ne volas edziĝi al mi, li ne rajtas aserti, ke mia korpo estas plena de malpuraĵoj." Firme pugniginte siajn manojn, ŝi murmuris detenante sian spiradon: "Atendu, monaĥaĉo. Mi edziniĝos al potenca edzo kaj donos al vi lecionon."

Poste Magandiĝa edziniĝis al la reĝo de Regno Udeno. Kiam ŝi aŭdis, ke la Budho jam eniris la urbon, ŝia malamo al li leviĝis en ŝi kaj ŝi instigis per subaĉeto, ke oni insultu kaj forpelu la Budhon.

Anando, kiu akompanis la Budhon, ne volis resti kaj toleri la insultadon, sed la Budho admonis lin praktiki toleremon kaj paciencon. La Budho diris: "Kiel elefanto en la batalejo kontraŭstaras la sagojn elpafitajn, mi eĉ toleros la insulton de senreligiaj homoj." La Budho diris, ke pro la povo de la Budho, la kaluminioj ne restos longe. La Budho kaj Anando restis daŭre en Udeno, kaj ĉiuj kaluminioj finiĝis post nelonge.

**Ekzerco 41 estas sur paĝo 107**

## 42. LA DEMONO ALAVAKO

Alavako vivis proksime al Urbo Alavio per manĝado de homa karno. Li estis tiel ruza, feroca kaj potenca, ke oni rigardis lin kiel demonon.

Iutage, kiam la reĝo de Alavio ĉasis cervon en la ĝangalo, li estis kaptita de Alavako. La reĝo petis por sin liberigi, sed la demono postulis per interŝanĝo de lia vivo, ke la reĝo sendu unu homon ĉiutage en la ĝangalon kiel oferaĵon.

La reĝo konsentis pro la timo perdi sian vivon. Post tio, oni ĉiutage sendis unu malliberulon el la palaca malliberejo en la arbaron kun plado da rizo. Oni informis la viktimon, ke li gajnos sian liberecon post kiam li atingos iun certan arbon kaj metos la pladon tie. Poste, li povos foriri kien ajn laŭplaĉe. En la komenco multaj malliberuloj volontis plenumi la "simplan" mision. Sed poste neniu revenis por informi la aliajn, kio okazis en la arbaro, do la malliberuloj baldaŭ eksuspektis kaj oni devis peli ilin al la arbaro per forto.

Post nelonge tute malpleniĝis la malliberejo. Kiel la reĝo plenumos sian promeson sendi homon ĉiutage por nutri la demonon? Liaj ministroj proponis, ke li faligu pakaĵojn de oro sur la stratojn. Se oni trovis tiun, kiu levis la pakaĵojn, ili tuj kaptis lin kiel ŝteliston kaj sendis lin al Alavako. Kiam oni informiĝis pri tio, neniu kuraĝis preni la pakaĵojn. Kiel lasta metodo, la reĝo ekkaptis infanojn kiel oferaĵojn. La timigitaj familioj en la urbo ekfuĝis, lasante la stratojn dezertitaj kaj la reĝon tute malesperiĝinta. Restis nur unu knabo, kaj li estis neniu alia ol la propra filo de la reĝo. La reĝo ordonis kontraŭvole, ke oni sendu la reĝidon al Alavako en la sekva mateno.

La Budho hazarde estis proksima al la urbo tiutage. Kiam li esploris la mondon per sia magia rigardo matene, li vidis, kio okazos. Pro kompatemo al la reĝo, reĝido kaj Alavako, la Budho vojaĝis tutan tagon al la kaverno de la demono kaj atingis la enirejon vespere.

La demono estis en la montaro, kaj la Budho demandis la pordiston, ĉu li rajtas tranokti en la kaverno. Kiam la gardisto forlasis por informi sian mastron pri la peto, la Budho rekte iris en la kavernon, sidiĝis sur la sidejon de la demono kaj ekinstruis Darmon al liaj edzinoj.

Kiam la demono sciis, kio okazas, li hastis hejmen kun granda kolero. Kun eksterordinara potenco, li estigis timigan tondran ŝtormon, kiu tremigis kaj trafis la arbaron per tondro, fulmo, ventego kaj pluvo. Sed la Budho tute ne timis tion.

Alavako atakis la Budhon ĵetante siajn pikilon kaj klabon al li, sed

antaŭ ol la armiloj trafis la Budhon, ili falis ĉe la piedoj de la Honorulo.

Vidinte, ke li ne povas fortimigi la Budhon, Alavako demandis: "Ĉu estas prave, ke sanktulo kiel vi eniris kaj sidis inter la edzinoj de la mastro, kiam li forestis?" Je tio, la Budho stariĝis kaj forlasis la kavernon.

Alavako pensis: "Kiel malsaĝa mi estas, ke mi eĉ elspezis tiel grandan energion por fortimigi la asketon!" Do li petis, ke la Budho revenu en la kavernon. La demono ordonis la Budhon iri el la kaverno kaj en la kavernon trifoje esperante mortigi lin per lacigo. Ĉiufoje la Budho agis laŭ lia ordono. Sed kiam la demono petis la Budhon forlasi por la kvara fojo, la Budho rifuzis tion fari, dirante: "Mi ne plu obeos vin, Alavako. Faru kion ajn vi povas, sed mi restos ĉi tie."

Ne povante devigi la Budhon fari laŭ lia ordono, Alavako ŝanĝis sian metodon kaj diris: "Mi starigos kelkajn demandojn. Se vi ne povos respondi, mi elfosos vian koron, mortigos vin kaj ĵetos vin al la transa bordo de la rivero."

La Budho diris al li trankvile: "Neniu el homo, ĉielano, asketo, bramo aŭ bramano povas fari tion al mi, sed se vi volas demandi pri io ajn, vi rajtas tion fari."

Alavako prezentis iom da saĝaj demandoj lernitaj de siaj gepatroj, kiuj, siavice, lernis ilin de siaj gepatroj. La demono jam forgesis la respondojn, sed li memoris la demandojn skribinte ilin sur oraj folioj. La demandoj estis:

"Kio estas la plej granda riĉaĵo por homo?

Kio alportos la plej grandan feliĉon kiam oni bone mastras ĝin?

Kio estas la plej dolĉa el ĉiuj gustoj?

Kio estas la plej bona maniero de homa vivo?"

La Budho respondis:

"La plej granda riĉaĵo por homo estas fido.

La vera doktrino donos la plej grandan feliĉon kiam oni bone mastras ĝin.

La plej dolĉa gusto estas vero.

Saĝa vivado estas la deca metodo de homa vivo."

Alavako faris multajn pliajn demandojn, kaj la Budho respondis ĉiujn el ili.

La lasta demando estis: "Kiel homo ne bedaŭras pasante de la nuna vivo al la sekva?"

La Budho respondis: "Tiu, kiu posedas la kvar virtojn, kiuj estas

vereco, moralo, kuraĝo kaj malavareco, pentos nenion post la forpaso."

Kompreninte la parolojn de la Budho, Alavako diris: "Nun mi scias, kio estas la sekreto de mia estonta bona feliĉo. Estas granda bono al mi, ke la Budho venis." Alavako sin klinis antaŭ la Budho kaj petis, ke la Budho akceptu lin kiel disĉiplon.

En la sekva mateno, kiam la oficistoj de Alavio venis kun la juna filo de la reĝo, ili surpriziĝis je la vido, ke la Budho predikas al Alavako, kiu aŭskultas la instruon tre atente. Kiam la knabo estis transdonita al Alavako, tiu hontis pri sia estinta konduto. Anstataŭ preni la knabon kiel sian manĝaĵon, li lin karesis je la kapo, kisis kaj redonis al la oficistoj. Post tio, la Budho benis la infanon kaj Alavakon.

La konvertiĝo de la hommanĝulo Avalako bone montris, kiel la Budho konvertis sovaĝulon kaj ŝanĝis lin en ĝentilan disĉiplon per siaj grandaj saĝo kaj kompatemo.

**Ekzerco 42 estas sur paĝo 107**

## 43. SUĜATA KAJ LA SEP SPECOJ DE EDZINOJ

Suĝata venis el riĉa familio kaj edziniĝis al la filo de Anatapindiko. Kiel aroganta virino, ŝi nek respektis la aliajn, nek obeis al siaj edzo kaj bogepatroj. Ŝi kaŭzis malagrablaĵojn en la familio ĉiutage.

Iutage, kiam la Budho vizitis Anatapindikon, li aŭdis neordinaran kriegon en la domo kaj demandis, kio okazis.

Anatapindiko respondis: "Sinjoro, jen mia bofilino Suĝata. Ŝi ne obeas siajn edzon kaj bogepatrojn. Ŝi eĉ nek honoras nek esprimas sian respekton al la Honorulo."

La Budho alvenigis Suĝatan kaj parolis al ŝi afable: "Suĝata, estas sepspecaj edzinoj por viroj. Al kiu speco vi apartenas?"

"Kio estas la sep specoj, Estimata Sinjoro?" demandis Suĝata.

"Suĝata, estas malbonaj kaj abomenindaj edzinoj. Estas malpaciga edzino. Ŝi estas malica, malbonhumora, senkompatema kaj malfidela al sia edzo."

"Estas edzino simila al ŝtelisto. Ŝi malŝparas la monon gajnitan de la edzo."

"Estas edzino simila al mastro. Ŝi estas maldiligenta kaj ĉiam pensas nur pri si mem. Ŝi estas kruela, malkompatema kaj ĉiam insultas sian edzon aŭ klaĉas pri li."

"Suĝata, estas bonaj kaj laŭdindaj edzinoj. Estas edzino simila al patrino. Kun bonkoreco kaj kompatemo, ŝi prizorgas sian edzon kiel sian filon kaj estas atentema pri lia mono."

"Estas edzino simila al fratino. Ŝi respektas sian edzon, kiel plijuna fratino respektas la pliaĝan fraton. Ŝi estas modesta kaj obeema al la deziroj de sia edzo."

"Estas edzino simila al amiko. Ŝi ĝojas je la vido de sia edzo kiel amiko, kiu ne vidis sian amikon dum longa tempo. Ŝi estas virta, fidinda kaj el nobla naskiĝo."

"Estas edzino simila al servistino. Ŝi kondutas kiel komprenema edzino kiam oni montras ŝian mankon. Ŝi restas kvieta kaj montras nenian koleron eĉ se ŝia edzo uzas iom da krudaj vortoj. Ŝi estas obeema al la deziroj de la edzo."

La Honorulo demandis: "Suĝata, al kiu speco de edzinoj vi similas aŭ deziras simili?"

Aŭdinte la vortojn de la Honorulo, Suĝata hontiĝis pri sia estinta

konduto. Ŝi respondis: "Mi promesos al vi, Honorulo, ke ekde nun mi estos tiu en la lasta ekzemplo, ĉar mi fariĝos edzino bona kaj komprenema." Ŝi ŝanĝis sian antaŭan konduton, fariĝis helpantino de sia edzo, kaj ili kune klopodis por iluminiĝo.

**Ekzerco 43 estas sur paĝo 107**

## 44. ANANDO, LA LOJALA HELPANTO

La Budho ne havis regulan helpanton dum fruaj dudek jaroj ekde sia iluminiĝo. Sep monaĥoj kutime prizorgis la Budhon. Ili akompanis lin en almozpetado kaj portis liajn bovlon kaj kromajn robojn. La monaĥoj, kiuj iam asistis lin, estis Nagasamalo, Nagito, Upavano, Sunakato, Cundo, Sagato, Radao kaj Megijo.

Tiuj monaĥoj ne ĉiam obeis la instruon de la Budho. Kiel ekzemple, iutage kiam la Budho kaj Nagasamalo iris al vojkruco, Nagasamalo decidis iri laŭ iu vojo kvankam la Budho proponis, ke ili prenu la alian. La monaĥo iris sola laŭ la vojo elektita de si mem kaj suferis baton kaj prirabon de rabistoj. Li revenis al la Budho, kaj la Budho atentigis lin pri lia malobeemo kaj konsolis lin.

En alia tago, kiam la Budho iris al la vilaĝo Ĝanto, Megijo, kiu akompanis lin, volis resti ĉe mangoarbaro por praktiki asketismon. La Budho admonis lin trifoje kontraŭ lia decido, sed Megijo foriris sola. Fine li revenis al la Budho kaj konfesis, ke li malsukcesis en la praktikado ĉar lin ĉiam ĝenis diversaj malbonaj pensoj de krueleco, sensaj deziroj kaj malbonaj voloj kiam li estis en la arbaro.

Kiam la Budho venis al Ĝetavana Monaĥejo en Sravastio, li diris: "Nun mi estas maljuna, Bikŝuoj. Kiam mi diris: 'Ni iru laŭ tiu ĉi vojo', iuj el vi iris laŭ alia; iuj faligis miajn bovlon kaj robojn sur la teron. Elektu iun por ĉiam helpi min." Tiam la Budho aĝis kvindek du jarojn.

Ambaŭ Ŝariputo kaj Mogalano volontis servi al la Budho, sed la Budho ne konsentis ĉar ili havis aliajn gravajn taskojn por plenumi en la mondo. Oni prezentis aliajn disĉiplojn, sed la Budho rifuzis. Anando restis silenta kun deziro, ke li estu elektita de la Budho. Aliaj monaĥoj admonis, ke Anando akceptu la devon.

La Budho diris: "Ne necesas konsili al Anando tion fari. Li helpos min laŭ sia propra volo."

Anando konsentis regule servi la Budhon laŭ jenaj ok kondiĉoj:

1. Li ne akceptos robojn ricevitajn de la Budho.

2. Li ne akceptos manĝaĵon ricevitan de la Budho.

3. Li ne dormos en la aroma ĉambro de la Budho.

4. Li ne devas laŭpete akompani la Budhon al almozdono, al kiu oni invitis la lastan.

5. La Budho devas konsenti pri la invitoj, kiujn Anando akceptis.6. La Budho devas permesi lin prezenti vizitantojn, kiuj venis de malproksime

por vidi la Budhon.

7. La Budho devas permesi lin peti helpon kiam li havas dubon por solvi.

8. La Budho devas ripeti al li la predikojn faritajn dum lia foresto.

Post kiam la Budho konsentis pri tiuj ok kondiĉoj, Anando fariĝis regula helpanto de la Budho kaj restis ĉe li dum dudek kvin jaroj.

Anando estis filo de la malpliaĝa frato de Reĝo Sudodano, do li estis kuzo de la Budho. Li monaĥiĝis en la dua jaro post la iluminiĝo de la Budho kaj aŭdinte la predikadon fare de Punao Mantaniputo, li atingis sotapanon, la unuan ŝtupon de sankteco.

Ekde kiam Anando fariĝis helpanto de la Budho, li tagnokte servis al la Budho memvole kaj zorgeme ĝis lia lasta momento. Li estis fidela kaj sindediĉema. Kiel ekzemple, li kutime gardis la lokon, kie ripozis la Budho, por protekti lin kontraŭ ĝenado en la nokta dormo.

Parolante pri la kvalitoj de siaj disĉiploj, la Budho diris, ke Anando estas la unua el monaĥoj erudiciaj, atentemaj, firmvolaj kaj bonkondutaj. Anando faris multe por estigi monaĥinan komunumon. Kaj estas konate, ke li plantis Anandan Bodiarbon, kiu vivas ĝis nun proksime al la Ĝetavana Monaĥejo.

Kvankam Anando havis specialan rajton por aŭskulti ĉiun predikadon de la Budho, li fariĝis arahanto nur post la forpaso de la Budho.

Anando vivis ĝis la aĝo de cent dudek jaroj.

**Ekzerco 44 estas sur paĝo 108**

## 45. LA TRAGEDIO DE REĜO BIMBISARO

Reĝo Bimbisaro havis filon Reĝido Aĝatasato, kiu estis bona amiko de Devadato malamika al la Budho. Ili kune pasigis multe da tempo kaj post nelonge Devadato konvinkis la junan reĝidon mortigi sian patron.

En nokto silenta kaj malluma, Reĝido Aĝatasato glitis en la ĉambron de la reĝo kun tranĉilo ligita al sia kruro. Apenaŭ li grimpis al la dormanta patro kiam la palaca gardisto kaptis lin, do la reĝo trovis lian fiintencon. Reĝo Bimbisaro pensis: "Mi jam restas reĝo dum tro longa tempo. Estas tempo por mi rezigni kaj transdoni la tronon al Aĝatasato, por ke li regu la regnon en paco. Mi povos retiriĝi en religian vivon." Reĝo Bimbisaro indulgis Aĝatasaton pri lia malbona intenco kaj faris lin nova reĝo.

Tuj kiam Aĝatasato sidis sur la trono, li surprizis ĉiujn, inkluzive de sia patro. Li sin ĵetis al la patro tiel rapide kiel vipero kaptita je la vosto, kaj tenis lin en la plej malluma kaj malvarma subtera malliberejo de la palaco. "Neniu vizitu lin krom mia patrino," ordonis Aĝatasato, "kaj donu al li neniom da manĝaĵo, por ke li mortu de malsato."

Sed Reĝo Bimbisaro ne mortis laŭ la deziro de Aĝatasato. Lia lojala edzino ŝtele portis al li manĝaĵon kaŝitan en la vestaĵoj. Post kiam Aĝatasato trovis kaj ĉesigis tion, ŝi portis manĝaĵon en sia hartubero. Aĝatasato denove trovis tion. Fine la reĝino baniĝis, kaj ŝminkis sian korpon per miksaĵo de mielo, butero kaj sukero. La reĝo daŭrigis sian vivon forlekante la manĝaĵon de sur ŝia korpo. Fine Aĝatasato trovis la agon de la patrino kaj tute malpermesis ŝin viziti la patron. Do la reĝo havis nenion plu por daŭrigi la vivon kaj estis mortanta pro malsato.

Tagoj pasis, sed la reĝo ankoraŭ ne mortis. Aĝatasato malpacienciĝis kaj kriis kolere tra la tuta palaco: "Alvenigu barbiron."

Tuj post kiam la barbiro alvenis, la reĝo diris al li furioze: "Mi ordonas, ke vi iru al la ĉelo de Bimbisaro, fendigu liajn plandojn per razilo, disŝiru la haŭton de liaj plandoj kaj ŝminku salon kaj oleon sur la karnon. Poste faru lin piediri sur brulanta karbo ĝis lia morto!"

Kiam Reĝo Bimbisaro vidis la palacan barbiron, liaj larmoj de ĝojo malsekigis liajn vangojn. Li pensis: "Mia filo finfine konsciis pri sia malsaĝo. Nun li sendis barbiron ordigi miajn barbon kaj harojn por liberigi min el la malliberejo." Sed anstataŭe, la barbiro plenumis la ordonon de la nova reĝo Aĝatasato per helpo de du soldatoj, kaj la bonkora reĝo mortis en granda doloro.

Tiutage Aĝatasato informiĝis, ke lia edzino naskis filon. La patriĝo ege ĝojigis lin kaj subita penso aperis en lia menso. Li hastis al sia patrino kaj

demandis: "Diru al mi, Panjo, ĉu mia patro amis min kiel mi amas mian filon?"

Lia patrino sin turnis al li, fiksrigardis lin silente per siaj okuloj plenaj de malĝojo kaj murmuris nekredeme: "Kion vi diris, Aĝatasato? Vi demandis, ĉu via patro amis vin?"

"Aĝatasato, kiam vi estis en mia utero, mi volis trinki sangon el la mano de via patro. Kiam li aŭdis tion, li ĝojplene faris tranĉon sur sian manradikon, ke mi trinku lian sangon por vi. Kiam aŭguristo antaŭdiris, ke vi estos malamika al via patro, mi volis ĉesigi la gravedon, sed li deadmonis min de tio. Mi provis mortigi vin dum mia nasko, sed li haltigis min eĉ kiam li bone sciis, ke iutage vi mortigos lin. Ĉu tio ne estas amo?"

"Ĉu vi ne vidas la cikatron sur via dikfingro? Ĝi estis furunko kiam vi estis juna. Pro doloro vi tiel ploregis, ke neniu povis endormigi vin. Kiam via patro aŭdis tion, li ĉesigis sian deĵoron kaj kuris al vi. Li ĝentile metis vin sur siajn femurojn kaj suĉis la furunkon ĝis ĝi eksplodis en lia buŝo. Mia filo, via patro englutis la sangan puson pro amo al vi. Kiel vi povus diri, ke li ne amis vin, Aĝatasato? Diru al mi, Aĝatasato, ĉu vi faros por via filo tion, kion via patro faris por vi? Vi jam mortigis vian patron, kiu vere amis vin."

Kiam Aĝatasato aŭdis tion, li eksplodis de plorego. Li tuj ordonis siajn gardistojn: "Kuru, kuru por liberigi mian patron antaŭ lia morto." Sed neniu el ili sin movis. "Iru, mi ordonas vin! Liberigu mian patron antaŭ lia morto!" Aĝatasato kriegis.

Tiam lia konsilanto alpaŝis kaj diris malrapide: "Granda reĝo, via patro jam mortis matene." Aĝatasato genuiĝis kaj ploregis ĝis tordiĝo de la tuta korpo. Li diris senĉese: "Indulgu min, Paĉjo. Bonvolu indulgi min."

Aĝatasato konsciis pri la amo de sia patro nur kiam li mem fariĝis patro. Reĝo Bimbisaro naskiĝis kiel ĉielano en Ĉielo Catumaharaĝiko.

**Ekzerco 45 estas sur paĝo 108**

## 46. PRI DOLORO DE AMO

Reĝo Pasenadio regis Kosalon, kiu situis norde de Magadho regata de Reĝo Bimbisaro. La ĉefurbo de la regno Kosalo nomiĝis Sravastio. Unu el la fratinoj de Reĝo Pasenadio estis la ĉefa reĝino de Reĝo Bimbisaro, do li estis bofrato de Reĝo Bimbisaro.

Reĝo Pasenadio fariĝis budha sekvanto en tre frua periodo de la Budho, kaj restis lojala subtenanto ekde tiam. Lia ĉefa reĝino estis Malika. Estante saĝa kaj pia, ŝi bone konis la Darmon kaj agis kiel lia religia gvidistino en kelkaj okazoj.

Kiam la reĝo unuafoje vidis la Budhon, li demandis: "Kiel tio povas esti, ke Sinjoro Gotamo deklaras, ke li jam atingis la plenan iluminighon? Sinjoro Gomato estas juna ambaŭ je la aĝo kaj kiel monaĥo."

La Budho respondis: "Granda Reĝo, estas kvar aferoj, kiujn oni rajtas nek subtaksi nek malestimi pro ilia juneco. Ili estas nobla militisto, serpento, fajro kaj bikŝuo. Koleriĝinta juna militisto povus kruele kaŭzi damaĝon al aliaj. Mordo de eĉ malgranda serpento mortigus homojn. Eta fajrero povus kaŭzi grandan incendion, kiu detruas konstruaĵojn kaj arbarojn. Eĉ juna monaĥo povus esti sanktulo."

Aŭdinte tion, Reĝo Pasenadio komprenis, ke la Budho vere estas saĝa instruisto, kaj decidis fariĝi lia sekvanto.

Reĝo Pasenadio ŝatis viziti la Budhon por peti lian konsilon. Eĉ dum sia ofica deĵoro li laŭeble trovis tempon por interparoli kun la Budho. Kiam li babilis kun la Budho iutage, li ricevis raporton, ke lia edzino Reĝino Malika naskis filinon. La reĝo malplezuriĝis pro la raporto ĉar li deziris filon.

Malsame de aliaj religiaj instruistoj, la Budho parolis pri boneco de la virinoj. Li diris: "Iuj virinoj estas pli bonaj ol viroj, Reĝo. Estas virinoj saĝaj kaj bonaj. Ili prenas sian bopatrinon kiel diinon, kaj sin tenas puraj en la parolo, penso kaj konduto. Iutage ili povus naski bravan filon, kiu regos la landon."

Tiam la reĝo rememoris, ke li iam aŭdis de la Budho: "Malĝojon, ploradon, doloron, kaj malesperon donas tiuj, kiujn ni amas." La reĝo demandis Reĝinon Malika, ĉu ŝi konsentas kun la Budho. Ŝi diris, ke tio devas esti vero se la Budho tiel diris. Sed la reĝo ne kontentiĝis pri la respondo. "Kiel nia amato povas doni al ni malĝojon?" la reĝo volis scii.

Reĝino Malika proksimiĝis al bramano por peti la Budhon ekspliki tion. Aŭdinte multajn rakontojn de la Budho por ekspliki la problemon, la bramano rakontis ilin al la reĝino. Ŝi demandis al la reĝo: "Sinjoro, ĉu nia

filino Reĝidino Vaĝira plaĉas al vi laŭ via opinio?"

"Jes, Malika. Ŝi tre plaĉas al mi," diris la Reĝo.

"Se iu fatalaĵo okazus al Reĝidino Vaĝira, ĉu tio ne donus al vi malĝojon, ploradon, doloron kaj malesperon?"

"Jes," diris la Reĝo.

"Sinjoro, ĝuste pro tio la Honorulo diris, ke malĝojon, ploradon, doloron kaj malesperon al ni donas tiuj, kiujn ni amas."

"Malika," diris la Reĝo, "mirinde, ege mirinde! Kiel malproksimen la Honorulo vidas kun komprenemo."

Kiam Reĝo Pasenadio poste malvenkis en la batalo kun sia nevo kaj retiriĝis al sia ĉefurbo en Sravastio, la Budho komentis al siaj disĉiploj, ke nek venkinto nek venkito spertas pacon:

"Venko nutras malamon.

La venkito vivas en doloro.

Rezigninte venkon kaj malvenkon,

la pacamuloj vivas feliĉe."

En la posta milito, ambaŭ reĝoj denove batalis, kaj Reĝo Pasenadio ne nur venkis, sed ankaŭ kaptis sian nevon Reĝo Aĝatasato kun ĉiuj liaj elefantoj, militĉaroj, ĉevaloj kaj soldatoj. Reĝo Pasenadio decidis malliberigi la novan reĝon sed teni ĉe si liajn ĉevalojn, elefantojn kaj aliajn. Li volis posedi tiujn havaĵojn kiel premion de venko por sin kontentigi .

Informiĝinte pri tio, la Budho diris al siaj disĉiploj, ke estus pli saĝe por Reĝo Pasenadio teni nenion por si. La vero de tiu diro ankaŭ utilas en la moderna mondo:

"Homo povus rabi laŭ sia volo. Kiam iuj rabas, la prirabitoj rabos refoje. La rado de konduto turnas kaj faras prirabitojn prirabantoj."

Reĝo Pasenadio forpasis en la aĝo de okdek jaroj kiam lia filo Vidudabo ribelis kontraŭ li.

**Ekzerco 46 estas sur paĝo 108**

## 47. EKSCIO PRI LA VERA KARAKTERO

Iuvespere, kiam Reĝo Pasenadio de Kosalo babilis kun la Budho, sur la vojo paŝis vico da asketoj kun nodiĝintaj haroj, harkovrita korpo kaj longaj ungoj. Ili preterpasis malrapide kun la kapo malalte klinita. La reĝo tuj stariĝis kaj genuiĝis por fari adoron al ili, prononcante sian nomon trifoje.

La reĝo revenis al la Budho kaj diris: "Sinjoro, certe ekzistas sanktuloj inter tiuj asketoj. Rigardu, kiel trankvile ili paŝas kun la kapo klinita." La Budho vidis per siaj magiaj okuloj, ke tiuj viroj ne estas sanktuloj, sed spionoj, kiuj eliris por kolekti informojn.

"Via Reĝa Moŝto," diris la Budho, "estas neeble travidi la veran naturon de aliuloj nur laŭ ties aspekto por tiu, kiu havas komfortan vivon. Se ni volas koni la veran naturon de aliulo kaj liajn bonajn aŭ malbonajn kvalitojn, ni devas konatiĝi kun li almenaŭ dum iom da tempo. Ni devas esti saĝaj kaj akramensaj."

"Ni povas koni homan purecon per interparolo kun li, observado al lia kuraĝo antaŭ la misfortuno, kaj kompreno al lia saĝo dum diskutado. Reĝo, la malbonaj homoj kutime sin ŝajnigas kiel la bonajn, kaj estas malfacile por vi juĝi ilian moralecon. "

**Ekzerco 47 estas sur paĝo 109**

## 48. KLOPODO KALUMNII LA BUDHON

Du gravaj aferoj okazis en la dudeka jaro ekde la iluminiĝo de la Budho. Unu el ili estis konvertiĝo de la bandito Angulimalo. La alia okazis en Sravastio, kie iuj ĵaluzaj asketoj de aliaj religioj provis kalumnii la Budhon. Jen la dua afero.

La Budho kaj liaj disĉiploj estis famaj kaj respektindaj religiaj instruistoj en Sravastio. Multaj homoj en la regiono kutime vizitadis por aŭskulti iliajn instruojn kaj doni almozon al ili.

Sed ne ĉiuj homoj en Sravastio estis sekvantoj de la Budho. En la regiono multaj asketoj de aliaj religioj kredis, ke iliaj propraj instruoj estas pli superaj. Tiuj religiaj estroj sentis ĵaluzon kiam ili vidis, ke pli kaj pli da homoj iras al la Budho kaj liaj disĉiploj por doni almozon kaj oferi robojn kaj medicinaĵojn. Post nelonge ili estis venkitaj de sia ĵaluzo kaj decidis ion fari kontraŭ la Budho kaj liaj disĉiploj.

En Sravastio vivis asketino nomata Sundari. Ŝi estis juna kaj malbona. La asketoj decidis malutili la honoron kaj famon de la Budho kaj la monaĥoj per tiu asketino.

"Fratino, vi devas fari ion kontraŭ la Budho por helpi nin," ili diris al ŝi, "ĉar li ĉiam allogas subtenantojn for de ni."

"Kion mi faru por vi?" demandis Sundari.

"Helpu nin per vizitado al Ĝeta Arbaro por trovi tiom da informoj pri la Budho kiom vi povas. Trovu metodon, por ke ni povu revenigi al ni la subtenantojn."

Sundari regule vizitadis Ĝetan Arbaron por spioni la Budhon. Ŝi tute ne sciis la veran intencon de la asketoj, kiuj petis ŝin iri tien. Post iom da tempo, la asketoj certiĝis, ke multaj homoj jam vidis, ke Sundari frekventas Ĝetan Arbaron. Ili ŝin mortigis kaj enterigis en proksima defluilo. Poste ili iris al Reĝo Pasenadio de Kosalo kaj raportis, ke Sundari perdiĝis, kaj iuj homoj vidis ŝin lastafoje ĉe la Budho.

"Kie ŝi estas laŭ via supozo?" demandis la reĝo.

"Eble ŝi ankoraŭ estas en Ĝeta Arbaro, Granda Reĝo," ili respondis. "Ni maltrankviliĝas, ĉar ni scias bone, ke ŝi neniam restis tiel longe post kiam la Budho faris al ŝi predikadon."

La reĝo diris: "Do vi devas iri tien senprokraste por serĉi ŝin."

La asketoj afekteme ekserĉis Sundari en Ĝeta Arbaro. Post iom da tempo, ili iris al la loko, kie ili enterigis ŝin, kaj elfosis ŝin. Metinte la kadavron de Sundari sur brankardon, ili portis ĝin al Sravastio. Sur la

tuta vojo ili plengorĝe kriegis kolere: "Vidu, sinjoroj, vidu, kion faris tiuj monaĥoj, kiuj sin ŝajnigas kiel sanktajn homojn. Ili estas senhontaj kaj malicaj mensogistoj. Rigardu, kion ili faris. Ili havis seksan rilaton kun kompatinda Sundari kaj poste mortigis ŝin por kaŝi la krimojn."

La disĉiploj de la Budho teruriĝis pro tiuj akuzoj kaj ne sciis kion fari, sed la Budho diris al ili trankvile, ke ili sin detenu de siaj timoj, kaj estas nenio timinda ĉar ili estas senkulpaj de la krimo.

La Budho admonis ilin: "Tiuj homoj akuzos kaj insultos vin, sed faru nenion krom reciti tiujn vortojn: 'Mensogantoj kaj neantoj pri sia malbona konduto kulpas kaj suferas same.' Poste estu paciencaj. La homoj vidos, kiel kvietaj vi estas, kaj enuiĝos de la insultado al vi. La krioj kaj akuzoj malaperos dum sep tagoj."

La disĉiploj vere obeis la admonon de la Budho kaj post nelonge oni ekdemandis unu al alia, kial la Budho kaj liaj disĉiploj estis tiel trankvilaj. Tiam ili rememoris, ke la Budho kaj liaj disĉiploj estas virtaj kaj neniam faras malbonan konduton. "Eble iuj aliaj murdis kompatindan Sundari!" ili kriis, "Estas tute neeble, ke tion faris tiel kompatemaj religiaj instruistoj!" En la fino, la insultado ĉesis kaj la Budho per tiu ĉi okazaĵo konsilis siajn disĉiplojn kiel pacience toleri kalumniion: "Kiam oni ĵetas krudajn vortojn al bikŝuo, li toleru kun trankvila menso."

Post iom da tempo la reĝo trovis, ke la krimon faris la asketoj, kiuj raportis pri tio. Post kiam oni kondukis ilin al la reĝo, ili konfesis siajn krimojn publike kaj ricevis indan punon laŭ la leĝo. Post tio la Budho kaj liaj disĉiploj fariĝis pli honoraj kaj respektindaj en Sravastio.

**Ekzerco 48 estas sur paĝo 109**

## 49. KULTADO AL ĈIUJ DIREKTOJ

Instruo pri la homa devo

Iumatene la Budho forlasis Monaĥejon Bambuaro kaj iris en Urbon Raĝagaho. Dum sia almozpetado li vidis, ke junulo nomata Sigalo tute malsekiĝis kvazaŭ li ĵus sin banus. Sigalo faris kulton en ĉiuj kvar direktoj al la oriento, sudo, okcidento kaj nordo. Li faris kulton al la ĉielo supre kaj tero sube. Vidinte tion, la Budho haltis kaj demandis, kion li faras.

"Tio estas la lasta volo de mia patro antaŭ lia forpaso," respondis Sigalo, "Mia patro konsilis min adori al ĉiuj direktoj por forteni min de malbonaj aferoj el la kvar direktoj kaj el la supro kaj malsupro." La Budho pensis pri tio kaj diris: "Estas prave tion fari por plenumi la lastan volon de via patro, sed ne provu kompreni la konsilon de via patro nur laŭvorte. Via patro tute ne intencis, ke vi vere faru kultadon laŭ tiu ĉi maniero." Poste, la Budho eksplikis la veran signifon pri la kultado al ĉiuj direktoj:

"Kultado al la oriento signifas respekti kaj honori viajn gepatrojn.

Kultado al la sudo signifas respekti kaj obei viajn instruistojn.

Kultado al la okcidento signifas esti fidela kaj sindediĉema al via edzino.

Kultado al la nordo signifas esti afabla kaj helpema al viaj amikoj, parencoj kaj najbaroj.

Kultado al la ĉielo signifas prizorgi la materian bezonon de religiuloj kiaj monaĥoj kaj asketoj.

Kultado al la tero signifas esti justa al viaj servistoj, donante al ili laboron laŭ ilia kapablo, pagante al ili justan salajron kaj oferante al ili medicinan helpon kiam ili estas malsanaj.

Tion farante, vi povas vin deteni de malbono".

La Budho ankaŭ admonis al Sigalo eviti kvar malbonajn kondutojn.

"Estas kvar malbonaj kondutoj evitindaj," li diris, "kaj ili estas mortigo, ŝtelado, seksa miskonduto kaj mensogo."

La Budho daŭre parolis al Sigalo: "Estas kvar malbonaj motivoj, pro kies kaŭzo oni faras malbonajn kondutojn. Ili estas partieco, malamo, malsaĝo kaj malkuraĝo."

"Kaj fine, Sigalo, vi devas eviti ses manierojn malŝpari vian havaĵon. Ili estas drinkado, toksiĝemo, maldiligenteco, vagado ĝis profunda nokto, malŝparo de tempo ĉe foiro kaj penso pri amuziĝo, vetludo kaj kunestado kun malbonaj amikoj."

Juna Sigalo aŭskultis la konsilon respektoplene kaj subite rememoris, ke lia patro ofte diris al li, kiel bona instruisto estas la Budho. Kvankam la maljunulo ofte klopodis, ke Sigalo iru kaj aŭskultu la instruon de la Budho, Sigalo ĉiam rifuzis per diversaj pretekstoj, ke tio estas tro malfacila, ke li okupiĝas pri io alia, ke li estas tro laca aŭ ke li ne havas monon por doni al monaĥoj.

La junulo konfesis tion al la Budho kaj petis, ke la Budho akceptu lin kiel sian sekvanton. Li promesis, ke ekde tiam li ne nur tenos la volon de sia patro en la memoro sed ankaŭ plenumos ĝin en la ĝusta maniero instruita de la Budho.

**Ekzerco 49 estas sur paĝo 109**

## 50. DONACO DE AMBAPALI

Homoj el ĉiuj kastoj altaj kaj malaltaj serĉis la instruon de la Budho kaj li akceptis ĉiujn ĝojplene.

Kiam la Budho kaj liaj disĉiploj restis en Vesalio, iutage virino nomata Ambapali provizis al ili sian ĝardenon de mangarboj ekster la urbo, por ke ili ripozu en la malvarmeta ombro de ŝiaj arboj.

Ambapali estis tiel aminda kiel la ora suno leviĝanta el la oceano, sed ŝi estis tre malĉasta. Ŝi tute ne havis intencon viziti la Budhon, sed ŝia servistino diris al ŝi: "Sinjorino, ĉiuj nobeloj kaj ordinaruloj iris al la ĝardeno de mangarboj hieraŭ. Kiam mi demandis, kial ili iras tien, ili respondis, ke ili tion faras por viziti la viron restantan tie. Neniu estas komparebla kun li. Li estas la filo de reĝo kaj rezignis sian regnon por trovi la veron."

Estante ĉiam preta por nova vidaĵo, Sinjorino Ambapali tuj ekmovis siajn piedojn, kuris al unu el siaj ĉaroj kaj ekveturis al la ĝardeno, ĵetante fierajn rigardojn ĉirkaŭ si. Kiam ŝi atingis la pordon de la ĝardeno, ŝi deĉariĝis kaj iris preter palmarboj kaj mangarboj. Estis kviete, kaj eĉ la arbaj folioj ne tremetis. Ŝi leĝere paŝis tra la ĝardeno ĝis ŝi vidis viron sidantan kun kunmetitaj manoj kaj krucitaj kruroj sub la densa ombro de alta arbo. Ĉirkaŭ la kapo de la viro glimbrilis lumo kiel la meznokta luno. Li estis neniu alia ol la Budho.

Ambapali staris tie mirigite. Ŝi forgesis sian belecon, forgesis sin mem kaj forgesis ĉion alian krom la Honorulo. Ĝuste tie ŝia tuta koro fandiĝis kaj forfluis en la riveron de ŝiaj larmoj. Ŝi malrapide proksimiĝis al la Budho kaj sin klinis antaŭ liaj piedoj, metante sian vizaĝon sur la teron.

La Budho petis ŝin stariĝi kaj sidiĝi. Li parolis al ŝi pri la Darmo. Aŭskultante atente, ŝi sorbis la sanktajn vortojn kvazaŭ seka tero, sur kiu ne pluvis dum longa tempo. Akceptinte la Darmon, sinjorino Ambapali genue riverencis ĉe la piedoj de la Budho kaj invitis lin kaj liajn disĉiplojn al manĝo en la sekva tago. La Budho akceptis ŝian inviton.

Tiam nobeloj de Vesalio ankaŭ venis por viziti la Sanktulon. Sur la vojo al la ĝardeno de mangarboj ili renkontis Ambapali kaj aŭdis, ke la Budho jam akceptis ŝian inviton al manĝo en la sekva tago. Ili proponis al ŝi: "Sinjorino Ambapali. Ni faru negocon kun vi. Vendu al ni la honoron regali ilin kontraŭ multe da oro."

Ŝi diris kun mieno glimanta pro ĝojo: "Sinjoroj, eĉ se vi donos al mi Vesalion kaj ĝian tutan teron, mi ne fordonos tiun ĉi honoran regalon." La nobeloj kolere iris al la Budho kaj petis honoron oferi alian manĝon, sed la

Budho informis al ili, ke li jam akceptis la inviton de Ambapali.

En la sekva tago, Ambapali metis dolĉan laktan rizon kaj kukojn antaŭ la Budho kaj liaj sekvantoj, kaj servis ilin kun granda modesteco. Post kiam la Budho manĝis, Ambapali sidiĝis sur alia sidejo kaj diris kun kunmetitaj manplatoj: "Sanktulo, mi oferos la ĝardenon al la komunumo. Bonvolu akcepti ĝin se vi volas."

La Budho akcepis la donacon vidinte ŝian sincerecon. Li denove ĝojigis ŝin per la Darmo. Tio estis la turna punkto en la vivo de sinjorino Ambapali. Ŝi komprenis la Darmon kaj fariĝis virta virino. Post nelonge ŝi monaĥiniĝis kaj fariĝis arahanto kun granda saĝo en la menso.

Kiel lotuso kreskanta ne sur la seka tero, sed en nigra ŝlimo, Ambapali atingis altan spiritan disvolviĝon malgraŭ sia malbona pasinteco.

Post la okazo, la Budho kaj liaj disĉiploj iris al malgranda vilaĝo ĉe Beluvo proksime. Tuj antaŭ la pluva sezono, la Budho decidis pasigi la lastan pluvan sezonon en tiu ĉi vilaĝo.

**Ekzerco 50 estas sur paĝo 109**

## 51. ĜIVAKO, KURACISTO DE LA BUDHO

Ĝivako estis la plej eminenta kuracisto en Hindio dum la vivperiodo de la Budho. Lia patrino estis altklasa amoristino. Ŝi metis lin en lignan skatolon kaj forĵetis lin sur rubaĵon ĉe la vojo tuj post lia naskiĝo.

En la sama mateno kiam bebo Ĝivako forĵetiĝis, Reĝido Abajo, filo de Reĝo Bimbisaro, hazarde preterpasis la rubujon sur la vojo al la palaco. Kiam la reĝido trovis la bebon ankoraŭ vivanta, li ekkompatis ĝin kaj tuj ordonis, ke oni vartu ĝin kiel lian adoptan filon.

Kiam Ĝivako plenkreskis, li lernis medicinon de fama instruisto dum sep jaroj. Post nelonge, li famiĝis pro sia eksterordinara lerteco kiel kuracisto kaj kirurgo. Oni invitis lin kuraci reĝojn kaj reĝidojn inkluzive Reĝon Bimbisaro. Sed krom ĉiuj liaj prizorgataj eminentuloj, Ĝivako prizorgis ankaŭ la Budhon kun granda plezuro, kaj vizitis lin trifoje ĉiutage.

Ĝivako helpis al la Budho en multaj manieroj. Post kiam Devadato ĵetis ŝtonon kaj ĝia peceto vundis la Budhon je la piedo, Ĝivako kuracis la vundon.

Konsciante pri la avantaĝo havi monaĥejon ĉe sia domo, Ĝivako konstruigis monaĥejon en sia mangarba ĝardeno. Li invitis la Budhon kaj liajn disĉiplojn al la monaĥejo, oferis almozon kaj donacis la monaĥejon al la Budho kaj monaĥoj. Post la malferma ceremonio de la monaĥejo, Ĝivako atingis sotapanon, la unuan ŝtupon de sankteco.

Poste, kiam Reĝo Aĝatasato demandis, kien li iru peti religian helpon, Ĝivako gvidis lin al la Budho. Kvankam Reĝo Aĝatasato mortigis sian patron laŭ la malica admono de Devadato, li fariĝis eminenta laika sekvanto de la Budho kaj subtenis la unuan konsiliĝon pri budhaj instruoj post la morto de la Budho.

**Ekzerco 51 estas sur paĝo 110**

## 52. LA KVERELADO ĈE KOSAMBIO

En la naŭa jaro post sia iluminiĝo, la Budho vivis en Kosambio. Kiam li estis tie, okazis kverelado inter du grupoj da monaĥoj. Unu grupo konsistis el spertuloj pri disciplina kodo dum la alia el spertuloj pri la budhaj instruoj.

La Budho klopodis per multaj metodoj por ĉesigi la kvereladon, sed post kiam ĉiuj liaj klopodoj malsukcesis, li forlasis ilin senvorte kun siaj bovlo kaj roboj, kaj retiriĝis al Pailejaka Arbaro finfine.

Dum la Budho loĝis en la arbaro, elefanto zorgis pri liaj vivbezonaĵoj. Ĝi purigis liberan spacon en la arbaro, meze de kiu situis ŝtona kaverno. La elefanto alportis fruktojn kiel oferaĵojn al la Budho ĉiutage. Vidinte la agon de la elefanto, iutage ankaŭ simio alportis abelejon al la Budho kiel sian oferaĵon.

Trovinte, ke la Budho foriris sola al Pailejaka Arbaro pro la kverelado inter monaĥoj, la loĝantoj de Kosambio ne plu donis almozon al la kverelantoj. La informo pri tio atingis Anandon en Sravastio. En la fino de la pluva sezono Anando speciale vizitis la Budhon kaj informis al li, ke lian instruon deziras homoj, precipe tiuj en Sravastio. Tiel la Budho revenis al Sravastio konvinkite kaj post iom da tempo, la kverelantaj monaĥoj venis peti pardonon de la Budho. Pro la kverelado en Kosambio, la Budho faris instruon, en kiu li diris:

"Oni devas resti kun saĝaj homoj, sed ne la malsaĝaj.

Estus pli bone vivi sola se ni ne povas trovi bonajn amikojn.

Ne kunestu kun malsaĝuloj."

**EKZERCO 52 ESTAS SUR PAĜO 110**

## 53. LA BUDHA SINTENO KONTRAŬ ALIAJ RELIGIAJ INSTRUISTOJ

Upalio* estis milionulo kaj la plej bona disĉiplo de alireligia instruisto Niganto-Nataputo, kies instruo estis malsama de la Budho. Upalio ankaŭ lertis pri debato kaj iutage lia instruisto proponis, ke li debatu kun la Budho je iuj vidpunktoj pri leĝo de kaŭzo kaj efekto. Post longa kaj komplika diskutado, la Budho konvinkis Upalion, ke la vidpunkto de ties instruisto estas erara.

La instruo de la Budho tiel impresis Upalion, ke li tuj petis, ke la Budho akceptu lin kiel disĉiplon. Li tute surpriziĝis kiam la Budho konsilis: "Upalio, vi ja estas famulo. Estu certa, ke vi ne ŝanĝas vian religion nur pro via ŝato al mi aŭ pro la influo de viaj emocioj. Plene esploru mian instruon kun malferma menso antaŭ ol vi decidos fariĝi mia disĉiplo."

Kompreninte la sintenon de la Budho pri libera esplorado, Upalio des pli plezuriĝis kaj diris: "Sinjoro, estas mirinde, ke vi proponis al mi pripensi tion atente. Aliaj instruistoj akceptus min senhezite, gvidus min sur la stratoj en parado kaj asertus, ke la milionulo el sia religio jam konvertiĝis al ilia religio. Jes, mi estas vere certa, kaj bonvolu akcepti min kiel vian disĉiplon."

La Budho konsentis akcepti Upalion kiel sian laikan disĉiplon, kaj konsilis al li plue: "Kvankam vi jam fariĝis mia disĉiplo, Upalio, vi devas praktiki toleremon kaj kompatemon. Daŭre donu almozon al viaj antaŭaj religiaj instruistoj kiam ili ankoraŭ dependas de via subteno. Vi ne rajtas ignori ilin kaj rezigni la kutiman subtenon al ili."

Tiu budha konsilo pri toleremo, libera demando kaj akcepto al liaj instruoj ne pro emociaj kaŭzoj fariĝis nova rekordo en budhisma historio. En budhisma rondo neniam estas religia fanatikulo, kiu devigas al homoj akcepti la religion per torturo aŭ timigo de puno. Budhismo disvastiĝas per pacaj metodoj ĉefe pro ĝiaj beleco kaj bona volo.

(Rimarko: En la teksto temas pri alia Upalio. Li ne estas tiu Upalio, kiu estis barbiro antaŭ la monaĥiĝo kaj respondis la demandojn pri disciplinaj reguloj je la unua konsiliĝo pri budhaj instruoj.)

**Ekzerco 53 estas sur paĝo 110**

## 54. MONAĤO STREBANTA TRO PENE

Sonao estis filo de riĉa komercisto. Li plej ŝatis aŭskulti muzikon de liuto kaj ludi la instrumenton. Li plenkreskis en riĉeco kaj lukso, do lia haŭto estis tre mola kaj delikata. Oni eĉ diris, ke haroj kreskis el la haŭto de liaj plandoj. La onidiro tiel furoris, ke Reĝo Bimbisaro speciale invitis lin al la palaco por rigardi la eksterordinarajn piedojn, pri kiuj li aŭdis multe.

Sonao vivis ĉe Vultura Montpinto en Raĝagaho, kie la Budho restis dum kelkaj pluvaj sezonoj. Iutage Sonao iris al Vultura Montpinto kaj aŭskultis la budhan instruon pri la feliĉa sperto de senkroċiĝo al mondaj deziroj. Sonao deziris ĝui tian feliĉon, do li petis la Budhon ordini lin kiel monaĥon.

Fariĝinte monaĥo, li lernis la metodon de piedira meditado. Li ege entuziasmiĝis pri tio. Ĉiutage li piediradis tien kaj reen meditante en la monaĥejo ĝis iutage liaj piedoj havis vezikojn kaj sangis.

Sed anstataŭ feliĉon, Sonao spertis nur doloron kaj malesperon post ĉiuj siaj klopodoj. Sopiroj al mondaj aferoj ankoraŭ aperadis en lia menso. "Tute senutile," Sonao diris al si mem. "Mi jam pene strebis, sed ankoraŭ ne atingis la deziratan celon. Estas pli bone por mi reveni al mia laika vivo kaj ĝui la kutiman feliĉon per almozdonado."

Kiam la Budho aŭdis pri tio, li iris viziti Sonaon. "Sonao," li diris, "mi aŭdis, ke vi ne atingis bonan rezulton en via medita praktikado kaj volis reiri al la laika vivo. Ĉu vi volas resti kiel monaĥo kaj denove provi se mi klarigos al vi, kial vi ne havis bonan rezulton?"

"Jes, mi provos, Sinjoro" respondis Sonao.

"Sonao, vi estis muzikisto kaj kutime ludis liuton. Diru al mi, ĉu vi faras bonan muzikon kiam la kordoj estas bone agorditaj, nek tro streĉe nek tro malstreĉe?"

"Mi povas fari bonan muzikon, Sinjoro," respondis Sonao.

"Kio okazas se la kordoj estas tro streĉaj?"

"Mi ne povas fari bonan muzikon, Sinjoro," diris Sonao.

"Kio okazas se la kordoj estas tro malstreĉaj?"

"Mi povas fari nenian muzikon, Sinjoro," respondis Sonao.

"Sonao, ĉu vi scias, kial vi ne spertis la feliĉon de rezignado al mondaj avidoj? Vi strebis tro pene en via meditado. Do faru tion en maniero modera, sed ne tro malstreĉa. Provu alifoje kaj vi havos bonan rezulton."

Sonao komprenis tion. Li restis en la monaĥejo kiel monaĥo kaj atingis sanktecon post nelonge.

**Ekzerco 54 estas sur paĝo 110**

## 55. MONAĤINA KOMUNUMO

En la kvina jaro post sia iluminiĝo, la Budho restis en Vesalio kiam li aŭdis, ke lia patro Reĝo Sudodano malsaniĝis. Li tuj faris longan vojaĝon al Kapilavasto por denove vidi la patron kaj instrui la Darmon al li. Aŭdinte la Darmon, la reĝo tuj atingis arahantecon kaj forpasis trankvile post sep tagoj. Ĝuste en tiu jaro fondiĝis la monaĥina komunumo laŭ la peto de Maha Praĝapati Gotami, la onklino kaj duonpatrino de la Budho.

Maha Praĝapati Gotami iris al la Budho trifoje kaj petadis, ke li ordinu ŝin kiel monaĥinon, sed la Budho rifuzis ĉiufoje sen mencii la kialon. La Budho vojaĝis al Vesalio post mallonga restado en Kapilavasto.

Maha Praĝapati Gotami estis firmvola kaj ne volis cedi tiel facile. Ŝi jam decidis kiel atingi sian celon. Ŝi fortranĉis siajn harojn, surmetis flavan veston kaj piediris 150 mejlojn de Kapilavasto al Vesalio, akompanate de multaj Ŝakjaj sinjorinoj. Kiam ŝi atingis Vesalion, ŝiaj piedoj ŝveliĝis kaj la korpo estis kovrita de polvo. Kun larmoj sur la vizaĝo, ŝi staris ekster la halo, en kiu estis la Budho, ankoraŭ esperante, ke la Budho ordinos ŝin kiel monaĥinon.

Anando surpriziĝis vidinte ŝin en tiu ĉi situacio. "Gotami, kial vi tiel staras ĉitie?" li demandis.

"Estimata Anando, la Honorulo ne permesas virinojn fariĝi monaĥinoj," ŝi respondis.

"Atendu ĉitie, Gotami. Mi petos la Honorulon pri tio." Anando diris al ŝi. Kiam Anando petis, ke la Budho permesu al Maha Praĝapati Gotami fariĝi monaĥino, la Budho rifuzis. Anando petis tri fojojn kaj la Budho rifuzis ĉiufoje.

Do Anando petis en malsama maniero. Li respektoplene demandis al la Budho: "Sinjoro, ĉu virinoj kapablas atingi diversajn ŝtupojn de sankteco fariĝinte monaĥinoj?"

"Jes, ili kapablas, Anando," respondis la Budho.

"Se tio estas vera, Sinjoro, estus pli bone, ke virinoj povas fariĝi monaĥinoj," diris Anando, kuraĝigite pro la respondo de la Budho.

"Anando, se Maha Praĝapati Gotami ankaŭ volontas observi kromajn ok regulojn speciale por monaĥinoj, ŝi estos ordinita monaĥino.

Kiam Anando parolis pri Ok Specialaj Reguloj al Maha Praĝapati Gotami, ŝi ĝojplene konsentis observi ilin kaj fariĝis monaĥino per si mem. Nelonge poste ŝi fariĝis arahanto. La aliaj Ŝakjaj sinjorinoj ordinitaj ankaŭ atingis arahantecon.

La fondiĝo de monaĥina komunumo kun reguloj estis oportuno, kiun la Budho provizis al virinoj unuafoje en la monda historio. Neniu el aliaj religiaj estroj donis tiel altan religian pozicion al virinoj.

**Ekzerco 55 estas sur paĝo 111**

## 56. LA BUDHA SINTENO PRI KASTISMO

Kastismo jam firme establiĝis en Hindio en la vivperiodo de la Budho. Laŭ la kasta sistemo, la sociaj pozicioj estas deciditaj de homaj naskiĝoj kaj oni ne povas ŝanĝi ilin en la tuta vivo. Ekzistas kvar homaj kastoj en la socio:

La bramanoj aŭ pastroj, kiuj deklaras, ke ili estas la plej puraj homoj kaj el la plej alta kasto.

La militistoj

La komercistoj

La elpelituloj, kiujn oni opinias el la plej malalta kasto. Ili fariĝas laboristoj kaj servistoj, faras ĉiujn fizikajn laborojn kaj estas rigardataj kiel sklavoj.

La Budho kondamnis la kastismon, kiun li opiniis maljusta. Li asertis, ke en ĉiu kasto troviĝas homoj malicaj kaj kruelaj, kaj ankaŭ homoj virtaj kaj bonkoraj. Ĉiu homo farinta malbonon estas punata laŭ sia karmo malgraŭ la kasto, al kiu li apartenas. Li diris, ke oni rigardas iun el alta aŭ malalta kasto laŭ ties bonaj aŭ malbonaj kondutoj. Do la Budho opiniis, ke la boneco de kondutoj decidis la homan kaston anstataŭ la naskiĝo.

La Budho prezentis la ideon de plialta valoro je homaj moraleco kaj egaleco anstataŭ en kiu familio aŭ kasto la homo naskiĝis. Tio ankaŭ estis la plej frua klopodo nuligi malestimon kaj sklavecon en la homa historio.

Neniu estas elpelitulo laŭ sia naskiĝo;

Neniu estas bramano laŭ sia naskiĝo;

Oni estas elpelitulo laŭ siaj kondutoj;

Oni estas bramano laŭ siaj kondutoj.

**Ekzerco 56 estas sur paĝo 111**

## 57. LA SPEGULO DE LA DARMO

La Budho ekvojaĝis al la nordo de Raĝagaho akompanate de Anando kaj multaj aliaj monaĥoj. Ili kutime haltis en ĉiu urbo kaj vilaĝo, kaj restis tie dum iom da tempo, por ke la Budho instruu la Darmon al la lokanoj.

Ili haltis ĉe loko nomata Halo Briko en malgranda vilaĝo Nadioko. Hazarde okazis, ke en la vilaĝo forpasis kelkaj monaĥoj kaj laikaj budhanoj, do Anando volis scii la estontan staton de tiuj mortintoj.

La Budho diris, ke ili ĉiuj jam atingis almenaŭ unu el la ŝtupoj de sankteco ĉar ili jam praktikis tion, kion ili lernis. Li daŭrigis: "Morto estas tute natura por homoj. Sed vi lacigus min se vi farus tian demandon ĉiufoje kiam mortas homoj. Do mi donos al vi kurson nomatan 'La Spegulo de la Darmo' per kiu nobla disĉiplo povas prediki por si mem: 'Por mi estas ne plu suferoj, nek statoj malbonaj kaj malaltaj. Mi estas sotapano anstataŭ viktimo, kiu estas destinita refali en malaltajn statojn. Mi certas pri la fina iluminiĝo.' "

"Anando, kio estas la Spegulo de la Darmo? Nobla disĉiplo havas absolutan kredon je la Budho, Darmo kaj Samgo. Pro la kredo, li elspezas multe da tempo por konsideri aŭ pensi pri la grandaj kvalitoj de la Tri Juveloj. Tiuj pensoj helpos lin disvolvi la grandajn kvalitojn en si mem kaj la povon koncentri sian menson. Tiuj rezultoj helpos lin atingi sotapanon, kiu estas la unua ŝtupo de sankteco."

"Posedante la Spegulon de la Darmo, nobla disĉiplo povos prediki por si mem, ke li ne plu falos al malaltaj statoj, kiaj infero, mondoj de besto, malsata spirito kaj aliaj estaĵoj suferaj kaj malfeliĉaj."

Post la kurso ĉe Nadioko, la Budho kaj liaj disĉiploj daŭrigis la vojon al Vesalio.

**EKZERCO 57 ESTAS SUR PAĜO 111**

## 58. LA BUDHA SINTENO PRI MIRAKLOJ

Kiam la Budho vivis en Nalando ĉe Pravarika Arbaro, viro nomata Kevado iam iris al li, esprimis sian estimon kaj proponis: "Sinjoro, Nalando estas evoluinta urbo. La lokanoj estas prosperaj kaj ili havas fortan konfidon al la Honorulo. Estus pli bone se vi ordonus al monaĥo montri miraklon de supernatura povo, por ke la homoj de Nalando konfidu al la Honorulo pli forte."

La Budho respondis: "Kevado, mi ne instruas la Darmon al la bikŝuoj tiamaniere." La Budho respondis same kiam Kevado petis lin en la dua kaj tria fojo. Poste la Budho diris, ke ekzistas tri specoj de supernaturaj povoj:

Estas miraklo de supernatura povo aperigi multajn homojn, trapasi murojn, flugi en la aero kaj iri sur la akvo. Ĉio ĉi estas fizikaj agoj ne plenumeblaj por ordinaraj homoj.

Estas supernatura povo legi la menson de aliaj homoj.

Estas supernatura povo gvidi homojn per taŭgaj metodoj laŭ iliaj mensaj disvolviĝoj por iliaj propraj bonoj.

Se oni prezentas la antaŭajn du supernaturajn povojn por impresi homojn, tio similas al prezentado de magiistoj. Monaĥo, kiu praktikas tiajn mondajn miraklojn, suferas de honto, humileco kaj malŝato. Tiaj aktivadoj povas impresi kaj gajni konvertojn kaj sekvantojn, sed ne kondukas homojn al la iluminiĝo por liberigi ilin el la suferado.

La tria speco de supernatura povo, kvankam tiel nomata "miraklo", helpas homojn liberiĝi el la suferado. Tio estas la nura supernatura povo taŭga por praktiki.

La nuraj mirakloj, kiujn oni devas prezenti estas jenaj: Kiam vi vidas iun plena de pasio, avido kaj deziro, vi instruas al tiu, kiel sin liberigi el la pasio, avido kaj deziro; kiam vi vidas, ke iu estas sklavo de malamo kaj kolero, vi uzas viajn povojn por helpi al tiu regi siajn koleron kaj malamon; kiam vi renkontas iun, kiu estas malsaĝa kaj ne povas kompreni la veran naturon, ke ĉio estas efemera, sufera kaj sendependa en la mondo, vi uzas viajn povojn por helpi tiun forigi sian sensciecon. Tio estas taŭgaj "mirakloj", kiujn vi povas prezenti.

Tiu admono al Kevado ankaŭ kondukis disciplinan regulon, kiu detenas monaĥojn apliki miraklojn por impresi homojn kaj gajni konvertojn sen helpi ilin al iluminiĝo. Tio estis klara en la okazo de Pindolo.

Arahanto Pindolo Baradŭaĝo famiĝis pro siaj supernaturaj povoj. Kun intenco, ke tiu ĉi monaĥo montru siajn magiajn povojn, riĉulo metis belan bovlon sur la pinton de altega loko kaj instigis al ĉiuj sanktuloj depreni la

bovlon. Se iu povos tion fari, tiu rajtos posedi la bovlon.

Pindolo Baradŭaĝo flugis supren kaj deprenis la bovlon tre facile. Li tion faris por montri al la riĉulo, ke ekzistas sanktuloj en la mondo, pri kio tiu ne kredas. Kiam la Budho informiĝis pri la okazaĵo, li ordonis al Pindolo Baradŭaĝo alporti la bovlon. La Budho rompis la bovlon en pecetojn antaŭ la monaĥa amaso, dirante: "Mi malĝojas pro via montrado de fizikaj povoj. Vi ne plu rajtas tion fari nur por impresi homojn simplajn kaj sensciajn."

**Ekzerco 58 estas sur paĝo 111**

## 59. LA LASTA MALSANO DE LA BUDHO

La Budho subite malsaniĝis nelonge post kiam li venis al Beluvo en la pluva sezono. Lin ege atakis la mortigaj doloroj de grava malsano. Sed li eltenis tion senplende per la pura menso kaj memregado. Li pensis: "Mi devas prediki al la disĉiploj kaj adiaŭi la komunumon antaŭ mia morto. Mi subigu la malsanon per mia forta volo." Li subigis la malsanon kaj ĝi cedis.

Kiam li ekresaniĝis, li iris el la monaĥejo, kaj sidiĝis sur la sidejon pretigitan por li. Anando iris al li, sidiĝis apude kaj diris: "Mi jam vidis, kiel suferas la Honorulo. Je la vido de tio mia korpo tiel senfortiĝis kiel plektokreskaĵo. Sed mi estas iom trankvila, pensante, ke la Honorulo ne forpasos antaŭ ol doni la lastan instruon al la komunumo."

"Do, Anando, ĉu la komunumo ion deziras de mi?" diris la Budho. "Nun la Perfektulo ne opinias, ke li gvidos la komunumon aŭ ke ĝi dependos de li. Anando, mi jam maljuniĝis kaj venis al mi la vivfino. Finiĝos mia homa vivo. Do Anando, ĉiu el vi devas fari la Darmon via insulo kaj rifuĝu en nenio alia. Post mia forpaso, kiuj ajn faros la Darmon siaj insulo kaj rifuĝejo, tiuj fariĝos insuloj al si mem kaj estos miaj plej bonaj disĉiploj."

Malgraŭ siaj maljuneco kaj senforteco, la Budho daŭre instruis la Darmon al siaj disĉiploj, utiligante ĉiujn okazojn. Li ankaŭ almozpetis kiam ne estis privataj invitoj de vilaĝanoj en Beluvo.

La Budho sin vestis frue iumatene, kaj iris en Urbon Vesalio kun bovlo por almozpeti. Kiam li revenis, li diris al Anando: "Prenu maton, Anando. Ni iru al Sanktejo Ĉapalo por pasigi la tagon."

Ili sidiĝis sur maton kaj la Budho parolis pri la plezuraj ĉirkaŭaĵoj de ĉiuj sanktejoj en Vesalio, kaj diris al Anando poste:

"Kiam iu ajn jam praktikis kaj disvolvis la kvar metodojn de atingo, li povas vivi tre longe se li deziras. Mi jam tute mastris la kvar metodojn de atingo, do se mi tiel deziras, mi povas vivi pli longe."

Kvankam la Budho donis klaran sugeston, Anando ne kaptis la aludon kaj sekve petis la Budhon vivi pli longe per lia kompatemo kaj por la bono, profito kaj feliĉo de multaj vivestaĵoj. Tiam Anando preterlasis la okazon pro konfuziĝo en la menso.

La Budho diris al li: "Vi povas forlasi min por momento." Anando eliris kaj sidiĝis sub proksima arbo.

La Budho iris eksteren. Li instruis la serĉantojn de la Vero kiel vidi la veran naturon de aferoj, kaj montris al ili la vojon sin liberigi el ĉiuj suferoj de la vivo. La Budho pensis pri siaj longjaraj instruoj, kiujn li donis

por plenumi sian devon. Li sentis, ke li jam donis ĉiujn necesajn instruojn al siaj sekvantoj monaĥaj kaj laikaj. Ili ne nur sekvis liajn instruojn, sed ankaŭ kapablis instrui aliajn. Li do decidis ne plu vivi longe, kaj anoncis al Anando, ke li forpasos post tri monatoj.

Nur tiam Anando ekmemoris, kion diris la Budho antaŭe, kaj tuj petis, ke la Budho vivu pli longe por la bono kaj feliĉo de ĉiuj vivestaĵoj.

"Jam sufiĉe, Anando, kaj ne petu min plu. Jam pasis la tempo por fari tian postulon. Ni iru al la halo kun pinta tegmento en Granda Arbaro," diris la Budho.

Kiam ili iris en Grandan Halon, la Budho diris: "Anando, iru kaj alvenigu ĉiujn monaĥojn loĝantajn en Vesalio. Petu ilin kolektiĝi en Halo Servo." Kiam ĉiuj monaĥoj alvenis, li diris al ili: "Lernu kaj praktiku ĉiujn miajn instruojn, por ke la sankta vivo restu por la bono kaj profito de multaj vivestaĵoj."

"Ĉiuj vivestaĵoj devas maljuniĝi kaj morti. Laboru diligente por via liberiĝo. Forpasos la Honorulo ĉe la fino de tri monatoj. Mia aĝo plene maturiĝis; mia vivo jam venis al la fino. Estu diligentaj, atentemaj kaj virtaj. Gardu vian propran menson. Kiu diligente observos la Darmon kaj Disciplinon, tiu forlasos la cirklon de renaskiĝoj kaj liberiĝos el la sufero."

Ĉiuj disĉiploj de la Budho tristiĝis aŭdinte la malĝojan informon pri la baldaŭa forpaso de la Budho. Ili ĉiuj iris al la Budho por esprimi sian lastan estimon krom monaĥo nomata Damaramo. Neniu sciis, kial li ne venis, kaj ĉiuj suspektis, ke li estas nek lojala nek fidela al la Budho.

Oni raportis tion al la Budho. La Budho alvenigis Damaramon por ke li ekspliku al la aliaj, kial li ne alvenis. Damaramo klarigis, ke la Budho forpasos post tri monatoj, do li pensis, ke estos la plej bona metodo honori la instruiston, se li atingos arahantecon antaŭ la forpaso de la Budho.

"Bonege, bonege! Ĉiu, kiu amas min, devas sekvi la ekzemplon de Damaramo. Li honoras min plej multe ol tiuj, kiuj praktikas mian instruon plej bone," laŭdis la Budho.

La Budho decidis daŭrigi sian lastan vojaĝon en la sekva mateno. Lia nova celloko estis malgranda vilaĝo de Pavao.

**Ekzerco 59 estas sur paĝo 112**

## 60. LA LASTAJ TAGOJ DE LA BUDHO

Oni notis multajn okazaĵojn en la vivo de la Budho sen preciza tempo post lia aĝo de 55 jaroj, sed la okazaĵoj en lia okdeka jaro notiĝis kaj datiĝis en Maha Parinibana Sutro.

Kiam la Budho atingis la okdekan jaron, li sentis, ke baldaŭ finiĝos lia vivo. Kvankam li suferis de maljuneco kaj malsanoj kiel ĉiuj aliaj homoj, tamen li estis malsama ol ordinaruloj. Li povis subigi la dolorajn sentojn de sia korpo per la mensaj povoj disvolviĝintaj en la supera trejnado. Lia menso ĉiam brilis kiel radianta diamanto eĉ se lia korpo malfortiĝis.

En la lasta jaro de sia vivo, li decidis pasigi siajn lastajn tagojn en kvietaj kaj simplaj ĉirkaŭaĵoj de Kusinago, malgranda vilaĝo en norda Hindio. Li preferis forlasi grandajn kaj prosperajn urbojn kiaj Raĝagaho kaj Sravastio, kiuj estas plenaj de homoj, komercistoj kaj reĝoj.

Li ekvojaĝis de Raĝagaho, la ĉefurbo de Magadho. Li iris piede, akompanate de Anando kaj multaj disĉiploj. La vojo estis tre longa kaj ili trapasis multajn urbojn kaj vilaĝojn dum la vojaĝo. Tiam, jam forpasis Rahulo kaj Jasodara, kaj ankaŭ Mogalano kaj Ŝariputo, ambaŭ ĉefaj disĉiploj de la Budho.

En la vojaĝo, la Budho turnis sian penson al la bonstato de la monaĥa komunumo. Multaj instruoj de la Budho temis pri la admono, kiel la monaĥoj kondutu por garantii, ke la komunumo iros bone post lia forpaso. Li rememorigis siajn disĉiplojn pri ĉiuj instruoj al ili.

Li memorigis la disĉiplojn pri la instruo praktiki sep ŝtupojn de iluminiĝo. Lia alia instruo temis pri la kvar metodoj, por ke oni kontrolu, ĉu iu instruo vere devenis de la Budho, komparante ĝin kun la Vinajo, kiu estas la disciplina regularo por la komunumo, kaj la sutroj, kiuj estas la instruoj de la Budho.

La instruo, kiun la Budho donis fojfoje dum multaj restadoj en la lasta vojaĝo, estis prediko pri la fruktoj el sekvado al la tri partoj de Nobla Okera Vojo — moraleco, koncentrado kaj saĝo, kiuj povos helpi al liaj disĉiploj atingi liberiĝon el ĉiuj suferoj.

**Ekzerco 60 estas sur paĝo 112**

## 61. LA LASTA MANĜO DE LA BUDHO

Post kiam la Budho kaj liaj disĉiploj venis al Pavao, Cundo, la filo de vilaĝa forĝisto, invitis ilin al manĝo nomata sukaramadavo aŭ "porka plezuro". Iuj kleruloj opinias, ke la manĝaĵo estis bongusta kaj speciala plado el fungoj, dum aliaj kredis, ke ĝi estis plado el viando de sovaĝa porko.

La Budho konsilis, ke Cundo servu al li nur per sukaramadavo pretigita de si kaj al aliaj monaĥoj per aliaj manĝaĵoj. Post la manĝo, la Budho diris al Cundo: "Cundo, enterigu la restan manĝaĵon de sukaramadavo. Mi certas, ke en la mondo neniu krom la Budho povos digesti la manĝaĵon."

"Jes, Sinjoro," respondis Cundo kaj li tuj enterigis la restan manĝaĵon. Li iris al la Budho, esprimis sian estimon kaj sidiĝis apude. La Budho instruis la Darmon al li kaj ankaŭ laŭdis lin, ke lia manĝaĵo refreŝigis la Budhon post lia vojaĝo. Sed post nelonge, la Budho eksuferis pro atako de lakso, je kio li malsaniĝis antaŭe. Pikaj doloroj ege turmentis lin, sed li povis elteni la suferon per forto de sia volo. Kvankam la Budho estis ege malforta, li decidis daŭrigi la vojaĝon al Kusinago malproksime je iom pli ol ses mejloj. Post la dolora klopodo, li atingis la arbaron de sala-arboj ekster la urbo.

La Budho sin banis lastafoje en Rivero Kakuto. Ripozinte momenton, li diris: "Nun eble iuj faros Cundon bedaŭri pro la manĝaĵo, kiu malsanigis min. Anando, se tio okazos, vi devos informi lin pri via rekta aŭdo de la Budho, ke oferi manĝajon estas meritoplena afero por li. Diru al li, ke per du oferoj al la Budho oni akiras same grandan meriton. Tio estas la oferado de manĝaĵo ĝuste antaŭ la perfekta iluminiĝo kaj forpaso de la Budho. Jen la lasta naskiĝo de la Budho.

Poste li diris: "Anando, bonvolu pretigi por mi kuŝejon kun la kapo al la nordo inter du sala-arboj. Mi estas laca kaj volas kuŝiĝi."

Ĝuste tiam tiuj du sala-arboj kovriĝis de disflorantaj floroj pro la agado de ĉielanoj kvankam ne estis la flora sezono. Ili disĵetis florojn sur la Budhon kvazaŭ por esprimi sian respekton al li. La Budho diris al Anando: "Anando, ambaŭ grandaj arboj disĵetas florojn sur min kvazaŭ ili esprimus sian respekton. Sed tio ne estas la plej bona metodo esprimi respetkon kaj honoron al mi. Anstataŭe, la monaĥoj, monaĥinoj kaj laikaj sekvantoj, kiuj vivas laŭ mia instruo, povos respekti kaj honori min pli bone."

Momenton poste oni rimarkis, ke Anando estas nenie videbla. Li iris en budon kaj ploris, sin apogante al la porda riglilo. Li pensis: "Mi estas ankoraŭ lernanto, kiu devas labori por sia propra perfektiĝo. Min forlasos la instruisto tiel bonkora!"

La Budho alvenigis Anandon kaj diris al li: "Jam sufiĉe, Anando! Ne ploru pro malĝojo. Ĉu mi ne ofte diris al vi, ke nepre okazas disiĝo al ĉiuj karaj kaj amataj? Kiel la naskiĝinta afero povas nur havi komencon sed ne finon? Neeble ekzistas tia afero."

"Anando, vi jam servis min per viaj kondutoj, vortoj kaj pensoj bonkoraj, helpemaj, plezuraj kaj sinceraj. Vi jam gajnis meriton, Anando. Daŭrigu la klopodon kaj baldaŭ vi forigos ĉiujn viajn mankojn. Ankaŭ vi fariĝos arahanto en mallonga tempo."

"Nun vi povas iri, Anando. Sed iru en Kusinagon kaj diru al ĉiuj homoj, ke en la lasta momento ĉinokte la Budho forpasos nirvane. Venu kaj vidu la Budhon antaŭ ties forpaso."

Anando akceptis la ordonon de la Budho kaj tuj iris al Kusinago por informi homojn, akompanate de alia monaĥo. Aŭdinte la informon, oni ege malĝojis. Ĉiuj homoj de Kusinago iris al la du sala-arboj por vidi la Budhon. Familie post familio ili sin klinis antaŭ li por adiaŭi lin.

Ekzistas kvar lokoj inspirantaj fidelajn budhanojn. Ili ĉiuj estas sanktejoj honoritaj pro la rilato kun la Budho. Ili estas:

1. Lumbinio, la naskiĝloko de la Budho

2. Bodgajo, kie la Budho iluminiĝis

3. Sarnato, kie la Budho donis sian unuan instruon kaj turnis la Darman radon unuafoje

4. Kusinago, kie la Budho atingis nirvanon kaj finan liberiĝon.

**Ekzerco 61 estas sur paĝo 112**

## 62. SUBADO, LA LASTA DISĈIPLO DE LA BUDHO

Vaganta ermito Subado hazarde restis en Kusinago kaj decideme iris al la Budho kiam li informiĝis, ke la Budho baldaŭ forpasos. Subado havis problemojn ne solveblajn, sed li estis certa, ke la Budho povos respondi liajn demandojn kaj forigi liajn dubojn.

Do Subado iris en la sala-arbaron kaj demandis al Anando, ĉu li rajtas vidi la Budhon. Anando respondis: "Amiko Subado, la Budho estas tre laca, do ne ĝenu lin."

Subado petis trifoje, sed Anando respondis ĉiufoje en sama maniero.

La Budho kaptis vortojn de ilia parolo. Li vokis Anandon al si kaj diris: "Ne detenu Subadon de vizito al mi, Anando. Lasu lin alveni. Kion ajn Subado demandos al mi, tion li faros nur pro deziro al scio sed ne por ĝeno al mi. Kaj li povos rapide kompreni, kion ajn mi diros por respondi liajn demandojn. "

Akirinte la permeson, Subado proksimiĝis al la Budho, salutis lin kaj diris: "Gotamo, multaj famaj religiaj instruistoj donas instruojn diferencajn de la viaj. Ĉu ili ĉiuj trovis la veron kiel ili asertis? Aŭ ĉu nur iuj el ili trovis la veron dum aliaj ne?"

"Sufiĉe, Subado," respondis la Budho, "Vi ne bezonas maltrankviliĝi pri la instruoj de aliuloj. Aŭskultu min kaj atentu, kion mi diras. Mi sciigos vin pri la vero."

"Se en iu ajn doktrino aŭ instruo ne ekzistas la Nobla Okera Vojo, ankaŭ ne ekzistas tiuj, kiuj jam fariĝis sotapano, sakadagamio, anagamio aŭ arahanto, la kvar niveloj de sankteco. Sed en tiuj instruoj, kie estas la Nobla Okera Vojo, ankaŭ troviĝas la sanktuloj sotapano, sakadagamio, anagamio kaj arahanto. En mia instruo troviĝas la Nobla Okera Vojo, do ankaŭ troviĝas la sanktuloj sotapano, sakadagamio, anagamio kaj arahanto. En neniu skolo de aliaj religiaj instruistoj oni povas trovi tiajn sanktulojn. Nur se miaj disĉiploj vivas prave kaj observas miajn preceptojn aŭ trejnajn regulojn, en la mondo neniam mankas geniaj arahantoj."

Poste Subado petis, ke la Budho akceptu lin al la monaĥa komunumo, kaj la Budho konsentis pri tio. Tiel Subado fariĝis la lasta konvertiĝinto kaj disĉiplo de la Budho kiel Kondano estis la unua konvertiĝinto kaj disĉiplo en Cerva Parko ĉe Benareso antaŭ 45 jaroj.

Subado fariĝis arahanto en mallonga tempo per sia honesta kaj diligenta klopodo laŭ la instruo de la Budho.

**EKZERCO 62 ESTAS SUR PAĜO 113**

## 63. LA LASTAJ VORTOJ DE LA BUDHO

Post la parolado al Subado, la Budho denove diris al Anando: "Anando, eble iuj el vi diros, 'Neniun instruiston ni havos sen la Budho, la supera instruisto.' Ne, Anando, ne tiel pensu. Kia ajn doktrino kaj disciplino instruita kaj konigita de mi estos via instruisto post mia forpaso."

Poste, la Budho diris al aliaj monaĥoj: "Se iu el vi havas dubojn pri la Budho, Darmo aŭ Samgo, demandu min en la nuna tempo, por ke vi ne bedaŭru poste pro tio, ke vi ne demandis min dum mi ankoraŭ vivis kun vi."

Sed la monaĥoj nenion diris. Neniu havis demandojn kaj ili ĉiuj sin tenis silentaj. La Budho tiel diris al la monaĥoj trifoje, sed ricevis neniun respondon.

La Budho diris: "Eble vi nenion demandis al mi pro via respekto al la instruisto. Do unu el vi diru tion al alia." La disĉiploj ankoraŭ silentis.

Tiam Anando diris al la Budho: "Bonege, mirinde, Sinjoro! Mi kredas, ke ĉiuj monaĥoj ĉitie havas neniom da dubo kaj demando pri la Budho, Darmo kaj Samgo, aŭ pri la vojo kaj metodo de trejnado kaj konduto."

"Por vi, Anando," diris la Budho, "tio eble estas la afero de fido kaj kredo. Sed, Anando, mi bone scias, ke neniu monaĥo veninta ĉitien havas dubon aŭ demandon pri tiuj aferoj. La plej postiĝinta el ĉiuj 500 monaĥoj ĉitie estas sotapano, anstataŭ viktimo falonta al malsuperaj statoj de ekzisteco, kaj ili ĉiuj certas pri sia destino al la iluminiĝo."

Poste, la Budho ekparolis al ĉiuj monaĥoj refoje, kaj faris la lastan instruon:

"Atentu, monaĥoj. Jen mia lasta instruo al vi. Ĉiuj komponaĵoj en la mondo estas ŝanĝiĝemaj. Ili ne daŭras longe. Pene laboru por atingi vian propran liberiĝon."

Poste, la Budho enmeditiĝis pli kaj pli profunden de unu nivelo al alia. Sekve li elmeditiĝis lastafoje kaj forpasis en nirvanon, lasante nenion kaŭzi lian renaskiĝon en tiu ĉi aŭ aliaj vivoj.

La forpaso aŭ fina nirvano de la Budho okazis en la jaro 543 a.K, en la dekkvina de majo, la fama Vesako laŭ hinda kalendaro.

**Ekzerco 63 estas sur paĝo 113**

## 64. LA UNUA KONSILIĜO PRI BUDHAJ INSTRUOJ

Post la forpaso de la Budho konsiliĝo okazis por konservi liajn instruojn.

Kompreneble, la forpaso de la Budho estis granda perdo por multaj sekvantoj, precipe por tiuj kun atingoj, do multaj disĉiploj dronis en profunda malĝojo. Sed iu, kiu monaĥiĝis en maljuneco, ege ĝojis pro la forpaso de la Budho.

"Ne malĝoju, fratoj," li diris, "Ne ploru. Ni liberiĝis de la granda asketo. Li senĉese nervozigis nin, dirante, 'Tio estas taŭga kaj tio estas ne taŭga.' Nun ni estas tute liberaj por agi laŭ nia plaĉo." La neatenditaj vortoj de la maljuna monaĥo hazarde kaŭzis al Maha Kasapo, la tria ĉefa disĉiplo de la Budho, kunvenigi la ĉefajn arahantojn por konservi kaj protekti la budhajn instruojn. La aliaj prestiĝaj monaĥoj konsultiĝis pri tio, kaj ĉiuj subtenis la proponon.

Kiam Reĝo Aĝatasato informiĝis pri la decido de la monaĥa komunumo, li faris ĉiujn necesajn aranĝojn, por ke la monaĥoj kunvenu ĉe la enirejo de Kaverno Satapano en Raĝagaho.

Oni pretigis kvin cent sidejojn en la granda halo, sed nur 499 famaj arahantoj kolektiĝis por la konsiliĝo. La malplena sidejo konserviĝis por Anando, kiu estis nur sotapano en tiu tempo.

Baldaŭ estis nur unu tago antaŭ la komenco de la konsiliĝo. Anando pensis: "La konsiliĝo okazos morgaŭ. Estas ne dece por mi partopreni nur kiel lernanto anstataŭ arahanto. Mi devas labori pene por purigi mian menson en la resta mallonga tempo."

Por purigi sian menson, li elspezis multe da tempo en la nokto praktikante korpan kontempladon, unu el la meditaj ekzercoj instruitaj de la Budho. Kiam estis preskaŭ tagiĝo, li decidis: "Mi kuŝiĝos momenton," sed dume, li ankoraŭ tenis sian atenton sur la korpo. Apenaŭ lia kapo ektuŝis la kapkusenon post kiam liaj piedoj forlasis la teron, ĉiuj liaj restaj malpuraĵoj malaperis el lia menso. Li arahantiĝis kaj partoprenis en la konsiliĝo kiel arahanto.

La kunsido komenciĝis en la tria monato post la forpaso de la Budho. Oni rigardis tion kiel la unuan budhisman konsiliĝon.

Maha Kasapo prezidis la unuan konsiliĝon. Oni elektis Upalion por respondi demandojn pri Vinajo, la disciplina regularo por monaĥoj kaj monaĥinoj. Anando, kiu havis eksterordinarajn memoron kaj honoron aŭdi ĉiujn predikojn de la Budho, elektiĝis por reciti ĉiujn predikojn de la Budho kaj respondis demandojn pri la budhaj instruoj.

Dum la unua budhisma konsiliĝo oni kolektis kaj kunigis budhajn instruojn kiel Palian tripitakon, kiu pasas de generacio al generacio de gemonaĥoj. En la antaŭa periodo de budhismo troviĝis neniu skriba noto de budhaj instruoj. La monaĥoj kaj monaĥinoj parkeris ĉiujn instruojn kaj transdonis ilin al la sekva generacio en la sama maniero. Jen la buŝa tradicio.

En 82 p.K. konsiliĝo de arahantoj okazis en Srilanko dum la regperiodo de pia sinhala reĝo Vato Gamanio Ahajo, kaj tie oni unuafoje skribis la instruojn de la Budho en Ola-folioj.

**Ekzerco 64 estas sur paĝo 114**

## EKZER COJ

### EKZERCO 1. LA SONĜO DE REĜINO MAHA MAJA

1. kiu estis Sudodano?
2. Kie li regis?
3. Kiu estis la reĝino?
4. De kiu regno ŝi venis?
5. Kio estis ŝia sonĝo?
6. Kion ŝi faris en la sekva mateno?
7. Kion la reĝo faris informiĝinte pri la sonĝo?
8. Kial la reĝo kaj reĝino ĝojis pro la sonĝo?
9. Kion faris la reĝo por esprimi sian ĝojon?

### EKZERCO 2. LA NASKIĜO DE LA REĜIDO

1. Kial Reĝino Maha Maja volis forlasi Kapilavaston?
2. Kie estas la palaco de ŝia patro?
3. Kiel la reĝo sendis ŝin?
4. Kial la reĝino haltis en la parko?
5. Kio estis la nomo de la parko?
6. Kiam naskiĝis la bebo?
7. Kion la legendo diris pri la naskiĝo?
8. Ŝajne la bebo diris ion. Kion li diris?

### EKZERCO 3. LA NOMDONA CEREMONIO

1. Kiu estas Asito?
2. Kial li iris al la palaco?

3. Kion la reĝo faris post kiam Asito sidiĝis en la palaco?
4. Kio okazis kiam la reĝo montris la bebon al la sanktulo?
5. Ĉu Asito malĝojis pro la okazaĵo?
6. Kion faris Asito post la okazaĵo?
7. Kion Asito diris pri la reĝido?
8. Kion Kondano diris?
9. Kio estis la nomo donita al la reĝido?
10. Kion signifas tiu ĉi nomo?

## EKZERCO 4. LA EDUKADO DE LA REĜIDO

1. Kiu estis Praĝapati?
2. Kian rilaton ŝi havis kun Maha Maja?
3. Kiu estis la unua instruisto de Sidarto?
4. Ĉu la reĝido estis inteligenta knabo?
5. Kion li lernis?
6. Kial la instruistoj amis lin?

## EKZERCO 5. BONKORECO DE REĜIDO SIDARTO

1. Kiu estis Devadato?
2. Kiu estis pli bonkora?
3. Kion Devadato faris kiam li vidis flugantan cignon?
4. Kiel Sidarto savis la cignon?
5.Ĉu la knaboj sciis antaŭe, ke la cigno vivas?
6. Plenigu la blankojn: "Vivaĵo devas aparteni al tiu, kiu ________, sed ne al tiu, kiu volas ________. La cigno apartenas al ____, ne al ____."
7. Kial Sidarto ricevis la cignon?

## EKZERCO 6. LA EDZIĜO DE REĜIDO SIDARTO

1. Kion faris la patro de Sidarto por ĝojigi lin?
2. Kial la reĝo ĉiam donis al li junajn servistojn?
3. Kion la Reĝido ĉiam faris?
4. Kion la reĝo demandis al la saĝuloj?
5. Al kiu la reĝido edziĝis?
6. Je kiom da jaroj la reĝido edziĝis?

## EKZERCO 7. LA KVAR MENCIITAJ: MALJUNULO

1. Kial la reĝido estis malfeliĉa en la palaco?
2. Kion la patro diris kiam la reĝido petis permeson iri el la palaco?
3. Kion li vidis kiam li iris en la urbo?
4. Kion la maljunulo diris?
5. Pri kio la reĝido demandis la ĉariston?
6. Kion la ĉaristo respondis al li?
7. Ĉu la reĝido vidis multajn maljunulojn antaŭe? Kial?
8. Ĉu vi opinias, ke vi ankaŭ maljunuĝos kiel tio?
9. Kion la reĝo denove faris por ĝojigi lin?

## EKZERCO 8. LA KVAR MENCIITAJ: MALSANULO

1. Ĉu la reĝo volis lasi sian filon iri el la palaco? Kial?
2. Kiel la reĝido iris al la urbo tiufoje?
3. Kion homoj faris tiam?
4. Kio faris lin malĝoja tiufoje?
5. Kion li diris kiam li vidis viron kuŝanta sur la tero?
6. Kion li faris al li?
7. Kial Ĉano ne permesis al li fari tion?

8. Kial la reĝido miris vidinte lin tia?
9. Kion vi faras kiam vi vidas tian malsanulon?
10. Ĉu vi opinias, ke vi ankaŭ malsaniĝos iutage?

**EKZERCO 9. LA KVAR MENCIITAJ: MORTINTO**

1. Kion Reĝido Sidarto vidis ĉifoje?
2. Kio faris lin pli malĝoja?
3. Pri kio li demandis Ĉanon?
4. kion li pensis post tio?
5. Kion li volis trovi?

**EKZERCO 10. LA KVAR MENCIITAJ: MONAĤO**

1. Kion la reĝido vidis ĉifoje?
2. Ĉu li ĝojis vidi lin? kial?
3. Kion Ĉano diris pri la monaĥo?
4. Kiel nomiĝis la filo de Reĝido Sidarto?
5. Kion Sidarto aŭdis kiam li revenis al la palaco?
6. Kion li pensis pri tio, kion li aŭdis?

**EKZERCO 11. LA REĜIDO FORLASIS SIAN HEJMON**

1. Kiujn la reĝo invitis al la vespera festeno?
2. Kion la reĝido faris dum la festeno?
3. Kion li vidis kiam li vekiĝis?
4. Kien li iris kviete?
5. Kion li petis Ĉanon fari?
6. Kion li petis Ĉanon fari trapasinte Riveron Aromo?

7.Kion Kantako faris?

## EKZERCO 12. LA OFERO DE REĜO BIMBISARO

1.Kien la reĝido iris de Aroma rivero?
2. Kio oni nomis lin post kiam li fariĝis monaĥo?
3. Kiel li havigis al si manĝaĵon?
4. Kiu estis Bimbisaro?
5. Kion li diris al la reĝido?
6. Kion Gotamo diris al la reĝo?
7. Kial oni estis feliĉaj donaci manĝaĵon al li?

## EKZERCO 13. LA UNUAJ INSTRUISTOJ DE LA BUDHO

1. Kiu estis la unua instruisto de Gotamo?
2. Kial li forlasis lin?
3. Kion la instruisto diris al Asketo Gotamo?
4. Kiun li vizitis sekve?

## EKZERCO 14. KLOPODO EN SES JAROJ

1. Kiam la Asketo Gotamo vivis en la arbaro dum ses jaroj? Kial li fariĝis tiel maldika?
2. Kia estis lia korpo?
3. Kio estis la metodoj por ke li torturu sian korpon?
4. Kiom longe li faris tion?
5. Kial li fine rezignis tion?
6. Kial la kvin amikoj forlasis lin?

## EKZERCO 15. LA ORA BOVLO

1. Kio estis la nomo de la virino, kiu donis manĝaĵon al Asketo Gotamo?

2. Kion ŝi deziris de la arba feo?

3. Kiel ŝi preparis la laktan rizon?

4. Kion ŝia servistino vidis sub la banjana arbo?

5. Kion faris la Asketo Gotamo manĝinte la laktan rizon?

## EKZERCO 16. KLOPODO POR ILUMINIĜO

1. Kien iris la Asketo Gotamo manĝinte la laktan rizon de Suĝata?

2. Kiel vi nomas la arbon, sub kiu li meditis?

3. Kian decidon li faris sub la arbo?

4. Kiaj pensoj venis al lia menso?

5. Kion li eksciis en la unua parto de la nokto?

6. Kion li komprenis en la dua parto de la nokto?

## EKZERCO 17. BRILAS LA SUNO DE ILUMINIĜO

1. Kion la Budho vidis en sia profunda meditado?

2. Kio kaŭzas la ĉenon de ekzisteco?

3. Ekspliku la signifon de la verso, kiun la Budho recitis tuj post lia iluminiĝo.

## EKZERCO 18. SEP SEMAJNOJ POST LA ILUMINIĜO

1. Kion la Budho faris dum la unua semajno post sia iluminiĝo?

2. Kion la Budho faris dum la tria semajno?

3. Kiu vizitis la Budhon dum la kvina semajno?

4. Kiom longe li fastis?

5. Kio estas la koloroj de la budhisma flago, kaj kion signifas ĉiu koloro?

6. Kiuj fariĝis la unuaj du laikaj disĉiploj de la Budho?

### EKZERCO 19. LA UNUAJ KVIN MONAĤOJ

1. Al kiu la Budho volis paroli unue?

2. Kien li iris?

3. Kion liaj kvin amikoj volis fari?

4. Ĉu ili faris tion?

5. Kion la Budho diris al ili?

6.Ĉu ili kredis lin?

### EKZERCO 20. LA UNUA INSTRUADO DE LA BUDHO

1. Kio estas la nomo de la unua instruado de la Budho?

2. Al kiuj okazis la unua predikado?

3. Kio estas la du ekstremoj, kiujn la Budho petis siajn aŭskultantojn rezigni.

4. Kio estas la vojo, kiun la Budho admonis sekvi?

5. Kio estas la Kvar noblaj veroj?

6. Kio estas la ok partoj de la Nobla Okera Vojo?

7. Koncize priskribu la tri grupojn, el kiuj konsistis la ok faktoroj.

### EKZERCO 21. SERPENTA REĜO

1. Kiuj estis la tri fratoj?

2. Kiom da sekvantoj ĉiu el ili havis?

3. Kie ili vivis?

4. Kion faris la Budho por subigi la serpentan reĝon?

5. Kion Uruvelo Kasapo trovis en la sekva mateno?

6. Kion faris la aliaj fratoj kaj iliaj sekvantoj kiam ili informiĝis, ke Uruvelo Kasapo jam fariĝis budhano?

## EKZERCO 22. REVENI HEJMEN

1. Kie estis la Budho kiam la reĝo sendis senditojn?

2. Kiom da mesaĝoj li sendis?

3. Kial ili ne donis la mesaĝojn al li?

4. Kiu donis la mesaĝon al li?

5. Kie la reĝo aranĝis por li ripozi?

6. Kion faris la pliaĝuloj kiam ili venis vidi lin?

7. Kion faris la Budho?

8. Kial la reĝo ne estis feliĉa?

9. Kio estis la "kutimo", kiun diris la Budho pri la reĝo?

## EKZERCO 23. LA RAKONTO PRI REĜIDINO JASODARA

1. Kion faris la homoj kiam la Budho havis sian manĝon?

2. Kiu ne ĉeestis?

3. Kion Jasodara faris kiam ŝi vidis la Budhon veninta vidi ŝin?

4. Kion la reĝo diris?

## EKZERCO 24. LA RAKONTO PRI REĜIDO NANDO

1. Kiu estis Nanda?

2. Kion faris la Budho kiam li finis sian tagmanĝon?
3. Kion Nanda faris?
4. Ĉu Nanda estis feliĉa pri la monaĥa vivo? Kial?
5. Kiel la Budho feliĉigis lin?

## EKZERCO 25. LA RAKONTO PRI REĜIDO RAHULO

1. Kiu estis Rahulo?
2. Kiom aĝa estis Rahulo kiam la Budho vizitis Kapilavsaton?
3. Ĉu la Budho donis al li tion, kion li petis?

## EKZERCO 26. DU ĈEFAJ DISĈIPLOJ

1. Kiu estis Sariputo kaj Mogalano?
2. Kio estis la nomo de la dramo, kiun ili rigardis?
3. Kiu estis ilia unua instruisto?
4. Kio estis ilia promeso?
5. Kiu vidis la duan instruiston?
6. Kiu estis la nomo de la dua instruisto kaj kion li diris al Sariputo?

## EKZERCO 27. LA RAKONTO PRI MALRIĈA ŜOPAKO

1. Kio estis la nomo de la malriĉa knabo?
2. Kial liaj duonpatro volis mortigi lin?
3. Kiel li provis mortigi la knabon?
4. Kion faris la Budho por savi la knabon?

## EKZERCO 28. LA RAKONTO PRI SINJORINO PATAĈARA

1.Al kiun Pataĉara edziniĝis?

2. Kial la edzo de Pataĉara ne volis iri al domo de ŝiaj gepatroj?

3. Kion Pataĉara diris al siaj najbaroj kiam ŝi forlasis al la gepatra domo?

4. Kiel ŝi provis porti siajn infanojn trapasi la riveron?

5. Kio okazis al ŝia edzo?

6. Kiel la Budho helpis ŝin?

## EKZERCO 29. ANGULIMALO, LA BANDITO

1. Kiom da homoj Angulimalo mortigis?

2. Kio estis lia vera nomo?

3. Kial li nomiĝis Angulimalo?

4. Kion faris la Budho por helpi lin?

5. Kiu ankaŭ volis savi Angulimalon?

6. Ĉu la Budho timis la mortigiston?

## EKZERCO 30. ŬAKALIO KAJ LA BUDHO

1. Kial Ŭakalio volis fariĝi monaĥo?

2. Kial Ŭakalio malesperiĝis?

3. Kion li volis fari?

4. Kiel la Budho helpis lin?

## EKZERCO 31. LA PURIGISTO SUNITO

1. Kiu estis Sunito?

2. Kial li estis tiel mizera?
3. Kion la Budho diris al li?

## EKZERCO 32. LA BUDHO KAJ MALSANA MONAĤO

1. Kiu helpis la malsanan monaĥon?
2. Kial la Budho riproĉis la aliajn monaĥojn?
3. Kion li diris kiam li konkludis sian parolon?

## EKZERCO 33. LA ĈIUTAGA RUTINO DE LA BUDHO

1. Kiom da partoj estas en nokto laŭ la itinero de la Budho?
2. Kiam la Budho ellitiĝis kaj kiam li enlitiĝis?
3. Kion li faris frue en la mateno?
4. Kiom da horoj li dormis en la tago?
5. Kion li faris post tagmanĝo?
6. Kiom da jaroj li instruis?

## EKZERCO 34. LA MONAĤIĜO DE JAŜO

1. Kiu estis Jaŝo?
2. Kio estis "bikŝuo"?
3. Kiom da sekvantoj estis en mallonga tempo?

## EKZERCO 35. LA PATRONO REĜO BIMBISARO

1. Kio estis la promeso de Asketo Gotamo al Reĝo Bimbisaro?
2. Kial homoj konfuziĝis pri omaĝo al la Budho kaj Kasapo?

3. Kiel la Budho sciigis al la homoj, ke li estas la instruisto?

4. Kio estis la kvin deziroj de Reĝo Bimbisaro?

## EKZERCO 36. VISAKA, GRANDA SUBTENANTINO DE BUDHISMO

1. Kio estis Visaka? Kaj kiomaĝa ŝi estis kiam la Budho vizitis ŝian naskiĝlokon?

2. Kion la avo admonis al Visaka, informiĝinte pri la vizito de la Budho?

3. Kion Visaka posedis?

4. Al kiu Visaka edziniĝis?

5. Kio estis la dek admonoj, kiujn ŝia patro donis al ŝin en ŝia edziniĝa tago?

6. Kion Visaka diris al la bikŝuo?

7. Kial la bopatro ne ŝatis ŝin?

8. Kiel Visaka pruvis sian senkulpecon?

10. Kio okazis al ŝia bopatro post kiam li aŭdis la instruon de la Budho?

## EKZERCO 37. DEVADATO MALAMIKA AL LA BUDHO

1. Kio estis Devadato?

2. Kun kiu li eniris la komunumon de monaĥoj?

3.Pri kio li famiĝis en siaj fruaj tagoj?

4. Ĉu li povis atingi staton de sankteco?

5. kio okazis al li poste?

6. Kion Devadato pustulis de la Budho? Ĉu la Budho akceptis ĝin? Kial?

7. Kiu estis la ĉefa subtenanto de Devadato?

8. Ĉu Devadato sukcesis mortigi la Budhon?

9. Kio estis lia unua provo mortigi la Budhon?

10. Kiel Devadato klopodis mortigi la Budhon per si mem?
11. Kiel Nalagirio kondutis al la Budho?
12. Kio estos Devadato en la estonteco?

## EKZERCO 38. LA BUDHO KAJ REĜINO KEMA

1. Kiu estis Kema?
2. Kiuj estis la ĉefaj Disciplinoj de la Budho?
3. Kiu konstruigis la monaĥejon por la Budho?
4. Kion la Budho faris kiam li sciis, ke Kema aŭskultas lin?
5. Kio okazis al la bela knabino dekses-jara?
6. Skribu viajn komentojn pri tiu ĉi leciono.

## EKZERCO 39. LA BUDHO KAJ MILIONULO.

1. Kio estis la rezulto de la malavareco de Anatapindiko?
2. Kial li konstruigis Ĝetavanan Monaĥejon?
3. Kiom da pluvaj sezonoj la Budho pasigis en la Ĝetavana Monaĥejo?
4. Kio estis la kvar specaj feliĉoj, kiujn homoj povas ĝui?
5. Kio okazis al Anatapindiko kiam li vidis la Budhon unuafoje?

## EKZERCO 40. LA BUDHO KAJ FARMISTO

1. Kion la bramano diris kiam li vidis la Budhon?
2. Kion respondis la Budho?
3. Kion diris kaj faris la bramano kiam li konsciis pri sia eraro?
4. Ĉu la Budho akceptis la manĝaĵon? Kial?

## EKZERCO 41. RANKORO DE MAGANDIĜA

1. Kiu estis Magandiĝa kaj kiel ŝi aspektis?

2. Al kiu ŝi volis edziniĝi?

3. Kien iris la Budho rimarkinte la gepatrojn de Magandiĝa?

4. Kio okazis al la patro de Magandiĝa kiam li vidis la Budhon kaj kion li diris?

5. Kion la Budho faris aŭdinte la patron de Magandiĝa?

6. Kion la edzino de la bramano diris vidinte la piedsignon de la Budho?

7. Kion la Budho diris kiam la bramano proponis la edziniĝon de sia filino al la Budho?

8. Kio okazis al la bramano kaj lia edzino post aŭskultado al la Budho?

9. Kion Magandiĝa pensis kaj diris kontraŭ la Budho?

## EKZERCO 42. LA DEMONO ALAVAKO

1. Kie vivis Alavako kaj kia li estis?

2. Kiu kaptis la reĝon kiam li iris ĉasi en la arbaro?

3. Kio estis la lasta peto de la reĝo?

4. Kial la Budho iris al la kaverno de la demono?

5. Kion la Budho petis de la pordisto?

6. Priskribu, kiel la Budho venkis en la batalo kun la demono?

## EKZERCO 43. SUĜATA KAJ LA SEP SPECOJ DE EDZINOJ

1. Al kiu edziniĝis Suĝata kaj kiel ŝi kondutis?

2. Kion la Budho aŭdis kiam li vizitis Anatapindiko?

3. Kiom da edzinaj specoj ekzistas laŭ la priskribo de la Budho?

4. Kion Suĝata sentis aŭdinte la instruon de la Budho? Kial?

5. Kiun preferis Sunĝata el la sep specoj de edzinoj?

## EKZERCO 44. ANANDO, LA LOJALA HELPANTO

1. Diru la nomojn de iom da monaĥoj, kiuj servis al la Budho dum lia frua tempo.

2. Kio estis la rezulto de malobeemo al la Budho fare de Nagasamalo?

3. Kiomaĝa estis la Budho kiam li petis la bikŝuojn elekti lian servanton?

4. Kio estis la rilato de Anando al la Budho?

5. Por kio la Budho rekonis Anandon unue?

6. Kio estis la aliaj kontribuoj de Anando?

7. En kiom da jaroj forpasis Anando?

## EKZERCO 45. LA TRAGEDIO DE REĜO BIMBISARO

1. Kies filo estis Reĝido Aĝatasato?

2. Kial li klopodis mortigi sian patron?

3. Kio estis la respondo de lia patro al lia mortiga klopodo?

4. Kiel lia patrino donis manĝaĵon al Reĝo Bimbisaro?

5. Kiel Aĝatasato mortigis sian patron?

6. Kia penso venis al Aĝatasato kiam li aŭdis, ke filo naskiĝis al li?

7. Priskribu la amon de Reĝo Bimbisaro al Aĝatasato.

## EKZERCO 46. PRI DOLORO DE AMO

1. Kio ests la rilato inter Reĝo Pasenadio kaj Reĝo Bimbisaro?

2. Kiu estis Malika? Ĉu ŝi estis bona edzino?

3. Kio estis la kvar aferoj, kiujn oni ne rajtas malestimi pro ilia juneco?

4. Kio estis la sinteno de la Budho al virinoj?

5. Pro kio la Budho diris, ke karuloj alportas suferon?

6. Kiu estis la filo de Reĝo Pasenadio?

## EKZERCO 47. EKSCIO PRI LA VERA KARAKTERO

1. Kion vi lernis de tiu ĉi parto de la rakonto?

## EKZERCO 48. KLOPODO KALUMNII LA BUDHON.

1. Kial la asketoj ĵaluzis la Budhon?
2. Kio estis ilia plano malhonorigi la Budhon, uzante Sundari?
3. Kio estis la admono de la Budho al siaj disĉiploj?
4. Kiel oni pensis pri la Budho kaj liaj disĉiploj post la observado al ili?

## EKZERCON 49. KULTADO AL ĈIUJ DIREKTOJ.

1. Kial Sigalo adoris al ĉiuj direktoj?
2. Kio estis la klarigo de la Budho pri adoro al ĉiuj direktoj?
3. Kiajn kvar malbonajn kondutojn oni devas eviti?
4. Kio estis la evitindaj ses metodoj malŝparantaj ies riĉaĵon?

## EKZERCO 50. DONACO DE AMBAPALI

1. Kiu provizis la ĝardenon de Mangoj al la Budho por ripozi, kaj kie ĝi estis?
2. Kion Ambapali vidis kaj sentis kiam ŝi proksimiĝis al la Budho unuafoje?
3. Kian postulon faris la nobeloj de Vesalio al Ambapali kaj kion ŝi respondis?
4. Kiel Ambapali estis komparita kun la lotusfloro?
5. Kie la Budho pasigis sian lastan pluvan sezonon?

## EKZERCO 51. ĜIVAKO, KURACISTO DE LA BUDHO

1. Kiu savis infanon Ĝivako?
2. En kiu kampo Ĝivako fariĝis spertulo?
3. Kiel Ĝivako helpis Aĝatasaton?
4. Kio estas la atingo de Ĝivako?

## EKZERCO 52. LA KVERELADO ĈE KOSAMBIO

1. Kiuj du partioj kverelis?
2. Kiu prizorgis la Budhon kiam li estis en Pailejaka Arbaro?
3. Kion faris la homoj en Kosambio?
4. Kio estis la admono de la Budho?

## EKZERCO 53. LA BUDHA SINTENO KONTRAŬ ALIAJ RELIGIAJ INSTRUISTOJ

1. Kion la religia instruisto postulis Upalio fari?
2. Kion la Budho konsilis al Upalio kiam li petis, ke la Budho akceptu lin kiel disĉiplon.
3. Kion admonis la Budho, akceptinte Upalion kiel sian disĉiplon?

## EKZERCO 54. MONAĤO STREBANTA TRO PENE

1. Kiel kreskis Sonao?
2. Kial Sonao monaĥiĝis?
3. Kio estis la kaŭzo, ke Sonao ne gajnis bonajn rezultojn de sia meditado?
4. Kiel la Budho komprenigis al Sonao?

## EKZERCO 55. MONAĤINA KOMUNUMO

1. Kiu estis Maha Paĝapati Gotami?
2. Kial ŝi proksimiĝis al la Budho?
3. Kion ŝi faris kiam la Budho rifuzis fari ŝin monaĥino?
4. Kial establiĝo de monaĥina komunumo estis historia evento?

## EKZERCO 56. BUDHA SINTENO PRI KASTISMO

1. Ĉu ekzistis kastismo dum la vivoperiodo de la Budho?
2. Kio estis la kvar kastoj?
3. Kiu fariĝas supera aŭ malsupera laŭ la Budho?
4. Skribu la historian aserton faritan de la Budho.

## EKZERCO 57. LA SPEGULO DE LA DARMO

1. Kial la forpasintaj monaĥoj kaj laikaj sekvantoj estis sotapanoj?
2. Kiu ne plu naskiĝos en malsuperaj statoj?
3. Kiel homo atingas sanktecon?
4. Kie kaj al kiu la Budho donis instruon "La spegulo de Darmo"?

## EKZERCO 58. LA BUDHA SINTENO PRI MIRAKLOJ

1. Kiu petis la Budhon asigni monaĥon por ludi miraklojn?
2. Kiomspecaj mirakloj estis?
3. Kia supernatura povo helpas homojn fini la suferadon?
4. Priskribu la okazon de mirakla povo montrita de Pindolo.

## EKZERCO 59. LA LASTA MALSANO DE LA BUDHO

1. Kiel la Budho subigis sian malsanon?
2. Kial Anando pensis, ke la Budho ne forpasos?
3. Kio devas esti la homa rifuĝo post la forpaso de la Budho?
4. Kion la Budho aludis al Respektinda Anando?
5. Kial Damaramo ne venis esprimi sian respekton al la Budho?
6. Kiu honoris la Budhon plej multe?

## EKZERCO 60. LA LASTAJ TAGOJ DE LA BUDHO

1. Kio estis notita en la Maha Parinibana sutro?
2. Kie la Budho decidis pasigi siajn lastajn tagojn?
3. Kiuj grandaj disĉiploj de la Budho forpasis antaŭ la Budho?
4. Kio estis la kutimaj insturoj de la Budho en sia lastaj tagoj?

## EKZERCO 61. LA LASTA MANĜO DE LA BUDHO

1. Kiu oferis la lastan manĝon al la Budho?
2. Kio estis la nomo de la manĝo preparita de Cundo?
3. Kio estis la admono de la Budho al Cundo pri la resta manĝaĵo?
4. Kio okazis al la Budho post lia manĝo?
5. Kion la Budho diris al Anando pri la manĝo de Cundo?
6. Kial Anando ploris?
7. Kian mesaĝon la Budho sendis per Anando al la homoj en Kusinago?
8. Kio estas la kvar lokoj vizitindaj por la fidelaj sekvantoj de la Budho?

## EKZERCO 62. SUBADO, LA LASTA DISĈIPLO DE LA BUDHO

1. Kial Subado vizitis la Budhon?

2. Kion la Budho diris al Anando kiam tiu volis deteni Subadon de proksimiĝo al la Budho?

3. Kie troviĝas la arahantoj kaj sanktuloj?

## EKZERCO 63. LA LASTAJ VORTOJ DE LA BUDHO

1. Kiu estas nia instruisto post la forpaso de la Budho?

2. Ĉu iu ajn havis dubon por peti klarigon?

3. Kial?

4. Kio estis la lastaj vortoj de la Budho?

5. Kiel kaj kiam la Budho forpasis?

## EKZERCO 64. LA UNUA KONSILIĜO PRI BUDHAJ INSTRUOJ

1. Kiu kaŭzis al Maha Kasapo okazigi la konvenon?

2. Kiu faris aranĝon por la unua konsilio? Kie?

3. Kiom da arahantoj elektiĝis?

4. Kion faris Anando por atingi arahantecon?

5. Kiu estis prezidanto de la unua budhisma konsilio?

6. Kiuj elektiĝis por respondi demandojn pri la Vinajo kaj Darmo?

7. Kiel Tripitako pasis de generacio al generacio?

8. Kiam oni eknotis la Tripitakon skribe?

## NOMOJ DE LA PERSONOJ KAJ LOKOJ

| Esperanta | Angla | Ĉina |
|---|---|---|
| *1 | | |
| Maha Maja | Maha Maya | 摩诃摩耶 |
| Sudodano | Suddhodana | 净饭（王） |
| Kolijo | Koliya | 拘利（国） |
| Ŝakja | Sakya | 释迦（族） |
| Kapilavasto | Kapilavatthu | 加毗罗卫（国） |
| Anĝano | Anjana | 善觉（王） |
| Ŝakjano | Sakyas | 释迦族人 |
| Anota | Anotatta | 阿努达（湖） |
| *2 | | |
| Vesako | Vesak 卫塞节 | |
| *3 | | |
| Asito | Asita | 阿私陀（仙人） |
| Sidarto | Siddhartha | 悉达多 |
| *4 | | |
| Praĝapati Gotami | Prajapati Gotami | 波阇波提（夫人） |
| Sarvo Mitro | Sarva Mitra | 沙尔瓦•米特罗 |
| *5 | | |
| Devadato | Devadatta | 提波达多 |
| *6 | | |
| Jasodara | Yasodhara | 耶输陀罗 |

*7

| | | |
|---|---|---|
| Ĉano | Channa | 车匿 |

*10

| | | |
|---|---|---|
| Kisagotami | Kisagotami | 积撒 . 苟答弥 |

*11

| | | |
|---|---|---|
| Rahulo | Rahula | 罗睺罗 |
| Kantako | Kanthaka | 犍陟 |

*12

| | | |
|---|---|---|
| Anomo | Anoma | 阿诺玛（河） |
| Raĝagaho | Rajagaha | 摩揭陀国 |
| Bimbisaro | Bimbisara | 频婆娑罗（王） |
| Ŝakjamunio | Sakyamuni | 释迦牟尼 |
| Gotamo | Gotama | 乔达摩 |

*13

| | | |
|---|---|---|
| Alaro Kalamo | Alara Kalama | 阿罗逻迦蓝（仙人） |
| Udako | Uddaka | 郁陀罗摩子（仙人） |

*14

| | | |
|---|---|---|
| Kondano | Kondanna | 憍陈如 |
| Badijo | Bhaddiya | 跋提 |
| Vapo | Vappa | 頞鞞（马胜） |
| Mahanamo | Mahanama | 摩诃男 |
| Asaĝio | Assaji | 阿说士 |

*15

| | | |
|---|---|---|
| Senanio | Senani | 塞那尼 |
| Suĝata | Sujata | 苏迦塔 |
| Nerangaro | Neranjara | 尼连禅河 |

*16

| | | |
|---|---|---|
| Gajo | Gaya | 伽耶 |
| Marao | Mara | 摩罗（魔王） |

*18

| | | |
|---|---|---|
| Tanha | Tanha | 唐哈；欲染 |
| Rati | Rati | 拉提；能悦 |
| Raga | Raga | 拉迦；可爱乐 |
| Raĝajatana | Rajayatana | 罗阇耶多那树 |
| Tapuso | Tapussa | 帝波须 |
| Keso Datuo | Kesa Datu | 科萨达图 |
| Baliko | Bhallika | 跋利迦 |
| Ŝuedagon | Shwedagon | 仰光大金塔 |
| Rangon | Rangoon | 仰光 |
| Muĉalinda | Mucalinda | 模迦琳达（蛇王名） |

*19

| | | |
|---|---|---|
| Benareso | Benares | 波罗奈国 |

*20

| | | |
|---|---|---|
| Cerva Parko | | 鹿野苑 |
| Isipatano | Isipatana | 仙人住处 |
| Sarnato | Sarnath | 鹿野苑 |
| Hindio | India | 印度 |
| Asalho | Asalha | 阿莎叻哈节 |

*21

| | | |
|---|---|---|
| Magadho | Magadha | 摩羯陀国 |
| Uruvelo Kasapo | Uruvela Kassapa | 乌留频螺迦叶 |
| Nadio Kasapo | Nadi Kassapa | 那提迦叶 |
| Gajo Kasapo | Gaya Kassapa | 迦耶迦叶 |

*22

| | | |
|---|---|---|
| Raĝagaho | Rajagaha | 王舍城 |
| Nigrodo | Nigrodha | 尼拘陀精舍 |
| Kaludajo | Kaludayi | 迦卢达已（人名） |

*24

| | | |
|---|---|---|
| Nando | Nanda | 阿难陀 |
| Ĝanapada Kaljani | Janapada Kalyani | 孙陀利（人名） |

*26

| | | |
|---|---|---|
| Upatiso | Upatissa | 优波帝须（地名） |
| Kolito | Kolita | 科利塔（地名） |
| Ŝari | Sari | 舍利（人名） |
| Mogali | Moggali | 目犍连（地名） |
| Ŝariputo | Sariputta | 舍利弗 |
| Mogalano | Moggallana | 目犍连 |
| Ŝanĝajo | Sanjaya | 桑加亚（人名） |
| Asaĝio | Assaji | 马胜（人名） |
| Girago Samapuĝo | Giragga Samapujja | 吉拉迦 萨玛普迦 |

*27

| | | |
|---|---|---|
| Ŝopako | Sopaka | 拉苏帕卡（人名） |

*28

| | | |
|---|---|---|
| Pataĉara | Patacara | 巴答吒拉（人名） |

*29

| | | |
|---|---|---|
| Angulimalo | Angulimala | 鸯掘摩罗（人名） |
| Bagaŭa | Bhaggawa | 奇角（人名） |
| Kosalo | Kosala | 拘萨罗（地名） |
| Mantani | Mantani | 曼塔尼（人名） |
| Ahinsako | Ahinsaka | 无恼（人名） |

*30

| | | |
|---|---|---|
| Ŭakalio | Wakkali | 瓦迦离（人名） |
| Vultura monto | Vultures moutain | 灵鹫山 |

*31

| | | |
|---|---|---|
| Sunito | Sunita | 苏妮塔（人名） |

*32

| | | |
|---|---|---|
| Anando | Ananda | 阿难（人名） |

*34

| | | |
|---|---|---|
| Jaŝo | Yasha | 耶舍（人名） |

*36

| | | |
|---|---|---|
| Visaka | Visakha | 毘舍佉（人名） |
| Punavadano | Punnavaddhana | 富楼那瓦达那(人名) |
| Migaro | Migara | 弥迦罗（人名） |

*37

| | | |
|---|---|---|
| Aĝatasato | Ajatasattu | 阿闍世（人名） |
| Nalgario | Nalagiri | 那罗几力（象名） |

*38

| | | |
|---|---|---|
| Kema | Khema | 差摩（人名） |
| Upalavana | Uppalavanna | 莲花色（人名） |

*39

| | | |
|---|---|---|
| Anatapindiko | Anathapindika | 给孤独长者 |
| Sadaria | Sadaria | 须达多 |
| Ĝeto | Jeta | 祇陀太子 |
| Ĝetovana Monaĥejo | Jetavana | 祇园精舍 |

*40

| | | |
|---|---|---|
| Ekanalo | Ekanala | 爱迦拿勒（村名） |
| Kasibaradvaĝo | Kasibharadvaja | 婆罗豆婆遮 |

*41

| | | |
|---|---|---|
| Magandiĝa | Magandiya | 摩犍地耶 |

*42

| | | |
|---|---|---|
| Alavako | Alavaka | 阿拉瓦卡 |

*43

| | | |
|---|---|---|
| Suĝata | Sujata | 苏耶妲 |

*44

| | | |
|---|---|---|
| Anando | Ananda | 阿难 |
| Nagasamalo | Nagasamala | 那伽波罗 |
| Nagito | Nagita | 那给达 |
| Upavano | Upavana | 优婆摩那 |
| Sunakato | Sunakhatta | |
| Cundo | Cunda | 纯陀 |
| Sagato | Sagata | 沙加特 |
| Radao | Radha | 拉达 |
| Megijo | Meghiya | 弥酰 |
| Ĉantu | Jantu | 彰徒 |
| Punao Mantaniputa | Punna Mantaniputta | 富楼那弥多罗尼子 |
| sotapano | sotapana | 须陀洹果 |

*45

| | | |
|---|---|---|
| Pasenadio | Pasenadi | 波斯匿王 |
| Malika | Mallika | 马利卡 |
| Vaĝira | Vajira | 瓦吉拉 |

| | | |
|---|---|---|
| *48 | | |
| Sundari | Sundari | 孙达丽（人名） |
| Ĝeta Arbaro | Jeta's Grove | 祇树给孤独园 |
| *49 | | |
| Sigalo | Sigala | 西迦罗 |
| *50 | | |
| Ambapali | Ambapali | 庵芭帕里 |
| *51 | | |
| Ĝivako | Jivaka | 耆婆 |
| Abaja | Abhaya | 无畏王子 |
| *52 | | |
| Kosambio | Kosambi | 乔赏弥 |
| Pailejaka Arbaro | Paileyyaka Forest | |
| *53 | | |
| Upalio | Upali | 优波离 |
| *54 | | |
| Sonao | Sona | 索南 |
| *58 | | |
| Nalando | Nalanda | 那烂陀寺 |
| Pravarika Arbaro | Pavarika Grove | 帕瓦里卡芒果林 |
| Kevada | Kevaddha | 给瓦嗒 |
| Pindolo Baradŭaĝa | Pindola Bharadwaja | 宾头卢波罗惰 |
| *59 | | |
| Beluva | Beluva | 白鹿瓦 |

| | | |
|---|---|---|
| Capala Sanktejo | Capala Shrine | 娑婆罗龛 |

*60

| | | |
|---|---|---|
| Maha Parinibana Sutro | Maha Parinibbana Sutta | 大般涅槃经 |

*61

| | | |
|---|---|---|
| sukaramadavo | sukaramaddava | 输卡拉马达瓦 |

*62.

| | | |
|---|---|---|
| Kusinaga | Kusinaga | 拘尸那伽城 |
| Subado | Subhadda | 苏跋达 |
| Sotapano | sotapanna | 须陀洹 |
| sakadagami | sakadagami | 斯陀含 |
| agami | anagami | 阿那含 |
| arahanto | arahant | 阿罗汉 |

*64

| | | |
|---|---|---|
| Maha Kasapo | Maha Kassapa | 摩诃迦叶 |
| Upalio | Upali | 优波离 |
| Sinhala | Sinhalese | 僧伽罗人 |
| Vata Gamani Ahaja | Vatta Gaman Abaya | 国王瓦塔伽马尼 |

La libroj esperantigitaj kaj publikigitaj de la Budana Retejo Esperantista:

1. Budhismaj Fabloj
2. Amo al la vivoj
3. Budhismaj rakontoj
   pri la antaŭaj vivoj de la Budho
4. La vivo de la Budho
5. Bonaj demandoj kaj bonaj respondoj.

La publikigota libro:

La sutro de cent paraboloj

La publikigitaj libroj estas elŝuteblaj ĉe la retejo http://www.budhano.cn